INFERIO

H.J. BULTHUIS

1075 F 40

H. J. BULTHUIS

INFERIO

Aan de Bibliotheca Regia
te Nijmegen
H. J. Bulthuis

Juni 1938.

De ĉi tiu libro dek ekzempleroj
estas presitaj sur luksa papero.

Ĉi tiu ekzemplero estas n-ro: 2.

38 1425

INFERIO

Rakonto originale verkita de

H. J. BULTHUIS, L.K.

(La bildojn desegnis Rico Bulthuis)

INTERNACIA CSEH-INSTITUTO
DE ESPERANTO
1938

Ĉiuj rajtoj rezervitaj.

ANTAŭPAROLO.

Inferio estas mondparto, kuŝanta nenie kaj ĉie. Ĝi havas vastajn urbojn kun admirinde belaj domoj, loĝataj de nur kelkaj milionuloj, kiuj de la naskiĝo ĝis la morto sin banas en pereiga lukso.

Inferio kontraŭe havas multajn domaĉojn kun arego da mizeruloj, el kiuj kelkaj konstante devas almozpeti aŭ ŝteli pro manko de honesta laboro, dum la aliaj sklave laboradas por ne morti de malsato.

Grandaj kontrastoj renkontiĝas en Inferio: en ĝiaj urboj etendiĝas paradize aspektantaj parkoj kun statuoj de jam longe mortintaj artistoj kaj herooj, aŭ famaj regintoj; tie serpentas ebenaj vojetoj kun ripoz-benkoj por promenantoj, sed ilin uzas ne la milionuloj, kiuj mem posedas parkojn ĉirkaŭ siaj vilaoj, sed nur kelkaj scivolemaj alilandaj vojaĝantoj, kiuj admiras kaj laŭdas ilin; kaj ..... senokupaj enlandanoj: ne por admiri kaj laŭdi, sed por pripensi sian mizeron, aŭ por tie sur soleca benko pasigi la nokton pro manko de propra hejmo kaj lito .....

En Inferio regas ŝovinismo anstataŭ amo al la tuta homaro; tie kontraŭ aliaj mondpartoj aŭ landoj oni konkuras pri fabrikado de kanonoj, militaj ŝipoj, militaj flugmaŝinoj kaj sufokaj gasoj; tie staras miloj da vastaj kazernoj por centmiloj da soldatoj, anstataŭ sanatorioj senpage uzataj de ĉiu, kiu ne povas pagi sian flegadon.

En Inferio oni ĉiam parolas pri mondpaco kaj amikeco al ĉiuj homoj, sed spite tion, oni pli kaj pli devige instruas al granda parto de sia popolo la armiĝon, por eventuale — sen propra kulpo! — militi kontraŭ alia mondparto aŭ lando, kiu siaflanke same laŭte, same energie parolis pri paco kaj reciproka amikeco.

En Inferio regas Civilizacio: Politiko, Diplomatio.

La Civilizacio devus ekzili la krudan barbarismon, sed, ho vel ..... ĝi kontraŭe grandskale ĝin enkondukis.

Pri Inferio, ĝia Civilizacio kaj multaj aliaj aferoj temas ĉi tiu rakonto.

La verkinto.

I

TRI MILIONULOJ DE SAIdumo antaŭ kvin jaroj volis flugi al Sydney, alivorte: de Inferio al Aŭstralio, kio estas la plej longa distanco trans la Grandan Oceanon.

Ili forlasis Saidumon kun tri falŝirmistoj, kiuj por tiri la ĝeneralan atenton al la flugado, devis salti el la aeroplano super Honolulu, la ĉefurbo de la Havaja insularo, kie feliĉe sendifekte ili atingis la teron. Triope la restintaj milionuloj poste daŭrigis la flugadon. Ili elektis la nomitan longan distancon por superi aŭ bati la rekordon de Lindbergh. Tamen ili malsukcesis, ĉar super alia insularo de la Granda Oceano, insularo, kiun la trio rigardis kiel la Samoajn insulojn, je du trionoj de la tuta distanco, ili devis interrompi la vojaĝon pro difekto en la motoro.

Al unu el tiuj insuloj, nome al la rondforma insuleto Rosa, ili devis sin direkti, ĉar ĝi estis la plej apuda; sed proksimiĝinte al ĝi je distanco de kvincent metroj, ili vidis, ke ĝia aspekto ne konformiĝas al la priskriboj en la geografia vortaro, antaŭe de

ili studita, ĉar sur la insuleto sub ili ne estis videbla haveno, nek urbo, sed preskaŭ seninterrompa montoĉeno kuranta laŭ la tuta insula konturo. Meze de tiu montoĉeno estis videbla platajo, sur kiu kuŝis speco de grandega kvadrato kun du diagonaloj, kiuj tamen sin ne tuŝis en la mezo de la figuro, ĉar sur la loko de la kruciĝo sterniĝis alia, multe pli malgranda kvadrato, kies lateroj kuris paralele kun tiuj de la granda. Fine, flanke de la tri sinsekvaj lateroj de la pli granda kvadrato kaj ekster ĝi, etendiĝis rektaj linioj el rondaj objektetoj, unu je matematika eta distanco de la alia.

La tri milionuloj miregis pri la nekonata kaj strange aspektanta insuleto sub si kaj kredante, ke ili eraris pri siaj observadoj, subite konvinkiĝis, ke ili flugis ne super la Samoa-Insuloj, sed super insuleto antaŭe ne rimarkita de ili sur la geografia karto; tamen devigate surteriĝi, ili malrapide kaj cirkle flugis malsupren, ĝis ili estis je distanco de cent metroj super la pli malgranda kvadrato.

Ili tiam vidis, ke la lateroj de ambaŭ figuroj konsistas el vojoj aŭ stratoj, faritaj el glataj rokpecoj, kaj ke la punktlinioj estas rondaj malaltaj kabanoj el bambuajo kaj larĝaj longaj arbfolioj.

La mirego de la aviadistoj kreskis, kiam ĉi tie kaj tie ili rimarkis kelkajn estajojn, laŭaspekte homojn, kovritajn de speco de manteloj el arbofolioj. Tiuj strangaj figuroj nun staris sen movo kaj kun levitaj kapoj, kvazaŭ ili rigardus kaj aŭskultus al la fluganta kaj laŭte ronkanta aeroplano super si. Subite ĉiuj ekrapidis sur la glataj stratoj kaj veninte en la mezon de la insulo, malaperis en vastan kabanon, kiu staris antaŭ la norda rokstrato de la pli malgranda kvadrato. Tuj poste la mistera insuleto ŝajnis tute forlasita.

— Kion ni faru? — demandis Jung, la piloto, post kiam ĉiuj estajoj malaperis.

— Ni tamen surteriĝu! — respondis doktoro Hartman. — Kion alian ni faros? Al ni ne restas alia elekto, ĉar se ni ne

baldaŭ surteriĝos, ni certe falos; rigardu nur, la helico jam komencas halti.

— Do, ni surteriĝu! — diris la piloto, kaj la flugmaŝino malrapide ŝvebis malsupren kaj post kelkaj sekundoj haltis meze de la pli malgranda kvadrato.

Ĉirkaŭrigardinte dum kelkaj momentoj, la trio elrampis el la aeroplano kaj ree komencis rigardi ĉirkaŭen.

Stranga sento ekregis ilin kaj vole-nevole ili pensis:

— Kien do ni trafis kaj kio al ni okazos ĉi tie?.... Kiaj homoj loĝas sur ĉi tiu insuleto?.... Ĉu ili estas sovaĝuloj aŭ eble kanibaloj?

Pensante pri tio, iliaj haroj pro teruro stariĝis sur la kapo, ĉar ili ne sciis, kiel sin defendi?

Ree ili ĉirkaŭrigardis, sed vidis nenion krom kelkaj novaj foliokovritaj estaĵoj, kiuj de ĉiuj flankoj proksimiĝis laŭlonge de la rokaj stratoj. La nove venintaj portis ĉiuj bastonon el bambuo, proksimume unu metron longan, tamen tiuj bastonoj tute ne aspektis kiel armiloj kaj ĉar la sintenado de la venantoj ne montris ion minacan, la trio baldaŭ iom kvietiĝis, kvankam ilia dubo pri danĝero ankoraŭ ne foriĝis, precipe pro subita zumado de voĉoj, venanta el la interno de la granda kabano, antaŭ kiu ili staris.

Iom post iom la homoj kun la kanoj venis pli proksimen kaj momenton poste aperis el la kabano kelkaj aliaj, el kiuj unu proksimiĝis al la aviadistoj. Li estis viro de meza alteco, kun brune blanka vizaĝo, same vestita kiel la aliaj insulanoj kaj ankaŭ portis saman rondan pintan ĉapelon, en kiu preskaŭ la tuta kapo malaperis. En lia mano estis tia sama bastono, kian portis liaj samgentanoj kaj kiam li estis proksime al la tri aviadistoj, li komencis paroli en tute fremda kaj stranga lingvo, kaj dume per sia bastono li pripalpis la ĵus venintojn.

La piloto unua respondis, sed lia respondo ne estis komprenata de la indiĝeno, kiu ŝajnis informiĝi pri la maniero, en kiu

ili venis sur la insulon. Verŝajne li pensis, ke ili por tio uzis iun gigantan birdon, ĉar parolante li imitis per la brakoj flugadon, dum el lia buŝo venis zum-sonoj kiel tiuj, kiujn li antaŭe aŭdis en la aero, kiam la giganta birdo flugis ankoraŭ super la insulo.

La situacio iĝis pli kaj pli implika, sed subite la doktoro mirigite ekkriis:

— Sed rigardu, tiuj estaĵoj ne havas okulojn!

La mistero pri la bastonoj per tio klariĝis, kaj samtempe la trio estis konvinkita troviĝi inter tute sendanĝeraj, kvankam tre strangaj homoj, pri kies ekzistado oni neniam aŭdis.

Intertempe aro de insulanoj kolektiĝis ĉirkaŭ la fremduloj, sed neniu indiĝeno ion diris, nek montris signon de timo.

Post kiam la ĉefo de la insulanoj sufiĉe pripalpis la fremdulojn, li iris al la aeroplano, pripalpis ankaŭ ĝin kaj sentinte, ke la birdego ne havas plumojn, sed estas malmola glata objekto, li ekparolis al siaj saminsulanoj. Farinte tion li reiris al la piloto, alkaptis ties brakon kaj kvazaŭ invitis lin per gestoj iri kun li en la grandan kabanon.

Timante plu nenion, la piloto cedis al la invito kaj sekvate de la du aliaj aviadistoj, la kvar eniris.

Interne de la kabano regis preskaŭ absoluta mallumo post kiam la ĉefo fermis post si la pordon; tial la doktoro ree ĝin malfermis kaj tiam malforta lumo kapabligis la fremdulojn vidi, ke en la fundo kaj tute laŭ la longo de la konstruaĵo staris kelkaj benkvicoj, dum granda spaco restis libera inter ili kaj la pordo.

La ĉefo eksidis sur la plej antaŭa benkvico kaj geste invitis siajn gastojn sekvi lian ekzemplon. Kiam ĉiuj sidis, la ĉefo ree komencis paroli kaj per gestoj kvazaŭ komprenigis, ke la gastoj estas bonvenaj. Poste li laŭte kunfrapis la manojn kaj tra la pordokadro venis insulano, al kiu li ordonis ion.

La inferianoj pacience, scivole atendis kelkan tempon, supozante, ke la foririnto baldaŭ revenos, kaj la piloto diris al la doktoro:

— Ĉu iam vi aŭdis aŭ legis pri homa gento, kiu estas blinda kaj tamen vivas en ordigita ŝtato?

— Ankoraŭ neniam, kaj nature oni ĝis nun kredis tion neebla, sed mi ekzamenos ĉi tiun strangan fenomenon pli proksime. Estas tamen rekomendinde, ke mi atendu, ĝis kiam la homoj konvinkiĝis pri nia amikeco al ili, kaj ke ni restu ĉi tie kelkajn tagojn antaŭ ol daŭrigi nian vojaĝon.

— Bedaŭrinde, ke ni ne kunportis kelkajn donacojn por gajni per tiuj la fidon de ĉi tiuj homoj.

— Ili tute ne malfidas nin, — respondis la doktoro, — tion klare montris ilia tuta sintenado, tamen mi donacos al la ĉefo mian horloĝon; eble li ŝatos ĝin kaj ni vidos, kion li faros kun ĝi.

Dirinte tion, li metis la horloĝon en la manon de la insulano. Ĉi tiu ĉiuflanke ĝin pripalpis dum kelka tempo, meditante levis la kapon kaj fine faris geston por diri:

— Mi ne komprenas, kio estas kaj al kio utilas tiu ĉi strangaĵo.

La doktoro reprenis la horloĝon kaj metis ĝin antaŭ la orelon de la ĉefo. Ĉi tiu mirigite kaj iom ridetante aŭskultis kelkan tempon, ree pripalpis la horloĝon kaj fine, levante la ŝultrojn, redonis ĝin.

Lia tuta mieno diris, ke li tute ne ŝatas tian unutonan muzikon.

— Li eble pensas, ke ĝi estas muzikilo — diris la piloto ridetante.

Sinsekve la ĉefo pripalpis monujon kaj monerojn, kiujn lastajn li videble ne trovis tre interesaj, poste libreton, kiun li foliumis, kaj fine tranĉilon.

La doktoro montris al li, kiel oni malfermas kaj fermas ĝin, kaj ke la klingo estas akra, kio tre mirigis la ĉefon.

Poste la doktoro klarigis, ke la horloĝo kaj la tranĉilo estas donacoj al li, kio tre ĝojigis la ĉefon. Li toleris, ke la horloĝon

oni metis ĉirkaŭ lian manradikon, kaj la tranĉilon li volonte akceptis, kiel donacon; tamen la monujon kun la moneroj li redonis, kiel ion sentaŭgan kaj senutilan.

Tra la porda kadro nun revenis la forsendito, li kunportis specon de plado, sur kiu kuŝis fruktoj aspektantaj kiel melonoj, bananoj kaj pomoj.

Kvazaŭ vidulo li iris senhezite al la benko kaj proponis la fruktojn. Laŭsajne li parkere konis la distancon inter la pordo kaj la benko, ĉar enirante kun la plado li ne uzis sian kanan bastoneton. Sentante, ke iu prenis la pladon, li sin turnis dirante nenion kaj eliris.

La melonoj enhavis dolĉan sukon kaj ilia karno estis bongusta. Oni povis oportune ĝin trinki kaj manĝi, ĉar la melonoj estis dividitaj en du duonojn, kiuj kiel duonglobetoj staris sur la plado. Ankaŭ la bananoj kaj la pomoj ŝajnis allogaj, sed ne estante malsataj la gastoj ne manĝis ilin, sed lasis ilin sur la plado, kiun antaŭe la doktoro starigis sur la benkon.

Iom manĝinte kaj trinkinte, la doktoro kiel eble plej bone dankis sian gastiganton, premante ties manon, pro kio la ĉefo ŝajnis esti tre mirigita. Tuj iĝis klare al la fremduloj, ke reciproka manpremo inter amikoj aŭ konatoj estas io stranga sur la insulo.

La piloto nun demandis:

— Kion ni poste faru?

— Ni esploru la insulon — respondis la doktoro, kaj li daŭrigis: — Tio ŝajnas al mi facila, unue pro ĝia malgrandeco, due pro tio, ke ĉi tie ne estos multe por esplori, ĉar ĉiuj kabanoj estas egalaj kiel ovoj de la sama birdo, kaj krom la stratetoj kaj tiuj kabanoj troviĝas ĉi tie nenio eksterordinara.

— Escepte de la homoj, kiuj ĉiuj estas blinduloj, — enĵetis la piloto.

— Kaj escepte de la montoĉeno, kiu ĉirkaŭas la insulon, — diris la doktoro, — sed ni baldaŭ ekzamenos ĉion.

La ĉefo, ne komprenante, kion diris liaj gastoj, ekstaris, ree alkaptis la brakon de la doktoro kaj montrante per sia bastono la pordon, eliris kun li el la kabano. La du aliaj gastoj sekvis, scivole, kion faros nun la ĉefo. Ĉi tiu, tute ne uzante sian bastonon, ĉar li tenis ĝin sub la brako, senhezite kaj kiel vidulo iris al la strato ĉirkaŭanta la internan kvadraton kaj veninte al la fino, sin duone turnis por poste sekvi la straton al la latero de la sama kvadrato. Atinginte ĝian okcidentan angulon, li duonturnis sin norden, iris kelkajn paŝojn kaj subite haltante, fingre montris al kabano, staranta precize meze en la vico de la aliaj, kiuj, kiel ni jam diris, staris ĉe ĉi tiu flanko de la figuro, kiun la aviadistoj ŝvebante ankoraŭ en la aero de supre vidis.

La indikita kabano ne diferencis de la aliaj, ne havis fenestrojn, sed nur unu pordon malfermiĝantan en la direkto al la rokeca strato, kie staris la fremduloj kun sia gastiganto.

Sciante, ke la doktoro kaj ties kunuloj lin ne komprenas, li dirante nenion, iris al la pordo, puŝe malfermis ĝin kaj eniris kun la doktoro, dum la aliaj du sekvis ilin.

Interne regis la sama mallumo, kiel en la granda kunvenkabano, kaj la piloto, kiu eniris lasta, tial lasis malantaŭ si la pordon larĝe malfermita.

Per unu ekrigardo oni povis travidi la tutan internon de tiu stranga loĝejo. Antaŭe, dekstre kaj maldekstre de si la fremduloj vidis specon de muroj el larĝaj longaj folioj, kaj en ĉiu muro estis pordeto; la cetera spaco estis tute malplena krom speco de tre larĝa benko, staranta en la mezo de la kabano.

En la spaco, kie nun ili troviĝis, estis tri benkoj kovritaj de folioj kaj verŝajne utilantaj kiel litoj.

La ĉefo diris nenion, sed montrante al la tri benkoj faris sian eblon por klarigi per gestoj, ke ili estas la tri litoj de liaj gastoj. Poste li eniris en la du flankajn segmentojn; ankaŭ tie staris benkoj sed sen arbfolioj. Estis al la inferianoj enigmo, por kio servis tiuj du kabanpartoj, sed ili konjektis, ke oni povas ripozi,

konversacii aŭ iel labori laŭ la propra deziro.

La ĉefo ree kunfrapis la manojn, sed ĉar ne sufiĉe baldaŭ venis insulano, li prenis el sia pinta ĉapelo fajfileton kaj fajfis. Post la penetranta sono, atinganta eble ĝis la plej fora loko de la insulo, baldaŭ eniris viro. La ĉefo duonordone diris al li ion, kaj la viro malaperis el la kabano.

La fremduloj ne komprenis, kion ĉio tio signifas, tamen post ĉirkaŭe kvaronhora atendo ili vidis, ke la foririnto revenas kun simila plado kun fruktoj, kian antaŭe oni alportis en la grandan kabanon.

La viro, nenion dirante, surbenkigis la fruktojn kaj tuj poste kun la malplena plado foriris, postlasante la ĉefon kun la tri fremduloj. La ĉefo fingre montris la lokon, kie staris la fruktoj, tuŝis per sia bastono sian ĉapelon, eble kiel signon de saluto kaj turnante la dorson al la trio, ankaŭ eliris el la kabano, metante neniun pluan atenton al siaj gastoj.

La piloto, sidiĝante apud la fruktoj, diris:

— Sendube ĉi tie estas nia dumtempa hejmo kaj kuŝejo, kaj mi kredas, ke de nun ĉiufoje unu el la insulanoj alportos ĉi tien nian manĝaĵon. Rilate al niaj vivrimedoj ni do ne bezonos maltrankviliĝi. Ankaŭ pri malamika trakto de la homoj ĉi tie ni tute ne devas timi .... sed kion ni faru nun?

La doktoro respondis:

— Estas ankoraŭ lume ekstere. Mi proponas, ke ni faru ekskurson por esplori, kia estas ĉi tiu stranga insulo kaj tiel plu; sed precipe mi intencas ekzameni la blindecon de la indiĝenoj; ĝi estas io tre eksterordinara kaj miriga, kvankam ĝi tute ne ĝenas la homojn, ĉar vidante, ke ili sin movas tute sen hezito, mi povas certe konstati, ke ili en ĉio agas kiel viduloj.

— Tio tamen ne estas stranga, — interĵetis Ingram, la amator-fotografisto, — iam mi vizitis blindulejon, kie ĉiuj sin movis same senhezite kaj senĝene, kiel tion faras ĉi tiuj blinduloj.

Dirinte tion li eliris el la kabano kaj lin sekvis liaj kunuloj. Ili

sin direktis orienten kaj post kvaronhoro ili troviĝis meze en la montoĉeno, ĉirkaŭanta la tutan insulon. Tie kaj tie leviĝis pintaj montetoj, kvindek ĝis cent metrojn altaj. Ĉar nenio stranga estis videbla ĉe ĉi tiu insula flanko, la trio reiris al la longa strato kaj ĝin sekvis norden ĝis la nord-orienta angulo de la ekstera kvadrato. De tie oni baldaŭ atingis la montoĉenon etendiĝantan ĉe tiu insulflanko, sed la montoj ne multe diferencis de la ĵus vizititaj.

Subite la doktoro, haltante kaj aŭskultante momenton, diris:

— Mi aŭdas bruon kvazaŭ de rapide fluanta rivero.

Ili iris en la direkto al la bruo, supreniris kaj malsupreniris kelkajn montetojn kaj jen antaŭ ili kuregis malsupren larĝa rivero sin direktanta okcidenten. La trio kiel eble plej bone sekvis la kuron de la rivero, kiu iom post iom kurbiĝis kaj poste kuris plu malsupren preskaŭ ĝis la suda insula strato; tie subite ĝi turniĝis okcidenten kaj kun tondra bruo sin ĵetis en la maron.

La akvo en la tuta longo de la rivero estis tre pura, kaj sen vivantaj estaĵoj; ĉar inter la fonto supre sur la plej alta monto kaj la enmariĝo estis distanco de nur kvar aŭ kvin mejloj.

La enmariĝa parto similis al larĝa roka ŝtuparo, kiu oblikve kondukis malsupren en la ondojn kaj kiu estis la sola interrompo en la cirkelforma montoĉeno de la insulo.

La fremduloj nun estis apud la orienta flanko de la suda strato, kiu unuigis tiun kvadrat-angulon kun la enmariĝo de la rivero.

Ĉio faris strangan impreson al la ne invititaj vizitantoj, sed plej multe frapis ilin la absoluta manko de bestoj aŭ brutoj.

La fremduloj rimarkis, ke la solaj vivantaj estaĵoj sur la insulo estas la tie loĝantaj homoj kaj kelkaj birdoj. Inter la lastaj estis marbirdoj, kiuj havis nestojn sur la montetoj, kaj kelkaj papagosimilaj, kiuj eligis akrajn penetrantajn kriojn, kiam la fremduloj tro proksimiĝis al ili. Tiuj birdoj loĝis sur arboj en la orienta parto de la insulo. Ŝajnis al la trio, ke en tiu parto etendiĝas

densaj arbaroj, sed ĉar subite mallumiĝis, la doktoro proponis al siaj kunuloj reiri al la kabano, kiun la ĉefo destinis por ili.

Trapasinte la sudan kaj okcidentan stratojn de la ekstera kvadrato, ili baldaŭ atingis sian loĝejon; tie ili kuŝiĝis sur la folio-kovritaj benkoj por dormi, decidinte daŭrigi sian ekskurson en la venonta mateno.

II

LA SEKVINTAN MATENON la piloto-milionulo vekiĝis unua. Li sidiĝis sur sia ne tre mola lito kaj rigardis ĉirkaŭ sin, sed estis malfacile distingi, kiu horo estis, ĉar pro la fermita pordo ĉie regis mallumo, kaj nur pro prilumita distanco inter la malsupra parto de la pordo kaj la tero oni povis vidi, ke la mateno jam venis.

La vekiĝinto rektiĝis, saltis sur la teron, kaj iris al la pordo por puŝmalfermi ĝin. Por fari tion li ne bezonis specialan forton, ĉar la pordo estis tre malpeza, kaj ĉe la unua puŝo cedis. Hela lumo tuj plenigis la tutan internon de la kabana dormejo, kaj la piloton trafis miro, kiam li vidis, ke antaŭ ĉiuj tri litoj estas metitaj tiaj ĉapeloj el folioj, kaj bastoneto, kiajn la antaŭan tagon li vidis sur la kapoj kaj en la manoj de la insulanoj. Li prenis la ĉapelon, kiu staris antaŭ lia lito, rigardis internen kaj vidis tie fajfileton inter la plektitaj folioj. Ekzamenante la du aliajn ĉapelojn, li vidis en ili saman muzikilon aŭ signalilon, ĉar la fajfiloj servis sendube por signalado.

Li surmetis la ĉapelon, kiu staris antaŭ lia lito kaj sentis, ke ĝi estas multe tro larĝa, ĉar ĝi atingis ĝis lia nazo, pro kio liaj okuloj tute malaperis en ĝia interno. La portanto do povis nenion vidi, kiam li surmetis tiun ĉapelon.

Li nun subite memoris, ke ankaŭ la ĉapeloj de la insulanoj, kiujn li vidis la antaŭan tagon, kovris la okulojn de la portantoj, sed tiam li ne pripensis tiun strangan cirkonstancon, kiu nun al li ŝajnis tre ordinara, ĉar la insulanoj estis ja blindaj.

La piloto fajfis per sia nova fajfilo kaj liaj kunuloj vekiĝis. Ili mirigite sidiĝis, kaj vidante la piloton kun la alta ĉapelo sur la kapo, ekridis, kaj ili ridis ankoraŭ pli laŭte, rimarkante la ĉapelojn antaŭ siaj litoj.

— Ŝajnas, — diris la fotografisto, — ke ankaŭ ni devas porti tian konuson: la naivuloj ne scias, aŭ ne pensas pri tio, ke ni havas okulojn.

— Sed al kio utilas tiuj fajfiloj? — demandis la doktoro.

— Eble por doni signalon aŭ por voki al ni insulanon, se ni bezonas ties helpon, — konjektis la piloto.

— Ni tamen ne devas palpserĉi nian vojon, — daŭrigis la doktoro, — kial do ili donis al ni tiujn bastonojn?

La trio nun jam levis sin kaj la doktoro volis doni la respondon, sed li tion ne faris, ĉar eniris unu el la indiĝenoj kun plado, sur kiu staris kiel tasetoj tri grandaj duonŝeloj de kokosnuksoj kun la freŝa suko.

— Ha! nia kafo! — ridante diris la piloto, kiu tuj senŝarĝigis la pladon kaj transdonis la „kafon" al siaj kunuloj. Post tio la indiĝeno foriris kun la malplena plado. Antaŭ ol foriri li aŭdeble tuŝis sian ĉapelon per sia bastono.

— Li salutas! — diris la piloto; ni do devas uzi nian bastonon por saluti!

La suko de la kokosnuksoj estis delikata kaj trinkinte kaj manĝinte la trio iris eksteren.

Estis nur ĉirkaŭ la oka horo en la mateno. La vetero estis

bela, la suno lumis, kelkaj birdoj en la aero flugis kaj ĉie regis absoluta kvieteco.

— Rigardu! — diris la doktoro, fingre montrante al la suda parto de la insulo, — tie svarmas aro de infanoj; ni esploru, kion ili faras.

La indikita insulparto, limigita de kvar stratoj kaj formanta paralelogramon, ŝajnis esti ludejo aŭ luda tereno por la infanoj.

La fremduloj, suden irante laŭ la plej longa latero de la ekstera kvadrato, haltis ĉe la okcidenta bazangulo de la paralelogramo, kaj de tie travidis la vastan ludoterenon, kie nun arego da infanoj ludis. Kelkaj el ili portis longajn foliomantelojn ĝis la genuoj. Escepte de tiu diferenco ĉiuj infanoj similis unuj la aliajn, kaj portis la saman konusforman ĉapelon sur la kapo kaj la saman bastonon en la manoj.

— Eble la knaboj portas la mallongajn mantelojn, — supozis la doktoro, — sed tion ni poste vidos; ni nun rigardu, kiel ili sin amuzas kaj ludas kune.

La infanoj estis dividitaj en du partojn; unu kun la longaj kaj la alia kun la mallongaj manteloj. Estis do klare, ke unu el la du aroj estis knaboj kaj la alia knabinoj.

En la mezo de ĉiu grupo estis altkreskulo, kiu gvidis la ludadon. La longmanteluloj amuzante sin sur la okcidenta flanko de la paralelogramo ludis pli brue, ol la alia sur la orienta flanko, el kio oni konjektis, ke la laste nomitaj estas knabinoj.

La knaboj saltis, saltetis, kuris, luktis, kaptis unu la alian, sed ĉio okazis nur post speciala laŭta komando de la viro, kiu gvidis la ludadon. La alia grupo, gvidata de virino, dancis en rektaj vicoj, kiuj regule proksimiĝis unuj al la aliaj kaj poste malproksimiĝis, dum la gvidantino takte brubatis la manojn.

Subite la knabinoj haltis, kaj ariĝinte ĉirkaŭ la gvidantino komencis kanti unutone. Intertempe la knaboj kolektiĝis ĉirkaŭ sia gvidanto kaj ludis sur speco de fluto el bambuo. La muziko, kiun ili faris, estis ankaŭ unutona kaj akompanata de

klaksonoj; eble de specialaj kastanjetoj aŭ klakiloj, uzataj de kelkaj knaboj, kiujn tamen pro la tro granda distanco la fremduloj ne povis distingi.

La atento de la tri rigardantoj nun direktiĝis al pli laŭta muziko, kiu proksimiĝis de la flanko de la granda kabano, do de la unua konstruaĵo, kiun la aviadistoj vizitis post sia surteriĝo sur la insulo. Ili aŭskultis pli atente. La muziko, farata per flutoj, ŝajnis esti speco de funebra marŝo. Iom post iom ĝi proksimiĝis kaj samtempe aro de viroj kun longaj manteloj, el kiuj kelkaj portis specon de brankardo, sur kiu kuŝis objekto, ŝajne kadavro volvita en mortvestaĵo el folioj; aliaj sekvis ludante sur longaj dikaj flutoj el bambubastonoj.

— Ni vidos enterigon, — rimarkis la doktoro, — ni iru iom flanken por lasi preteriri la procesion.

Ili flankeniĝis kaj malrapide kaj grave la muziko kaj la funebra procesio preteriris. Ŝajne nur viroj ĝin akompanis, ĉar ĉiuj kunirantoj portis mallongan mantelon. Atinginte la angulon de la ekstera kvadrato la procesio turniĝis orienten kaj laŭiris la tutan longon de la suda strato.

— Kie do estas la enterigejo? — demandis la piloto.

— Ni sekvos kaj vidos, — respondis la doktoro.

La trio sekvis je malgranda distanco, sed tombejo nenie estis videbla, kio estis tre miriga. La mistero tamen baldaŭ solviĝis. Irante ĉiam plu, la procesio haltis fine antaŭ la ŝtuparo de la mallonga strato, kuranta de la suda strato ĝis la enmariĝejo de la rivero. Veninte tien, la procesio haltis. La portantoj metis teren la brankardon, la muziko ĉesis, la portantoj alkaptis la kadavron kaj ekkriante kelkajn ŝajne solenajn parolojn, trenis ĝin sur la deklivon, flanke de la ŝtupoj kaj per unu forta ekpuŝo glitigis la mortinton en la maron, kie ĝi kun laŭta plaŭdbruo malaperis sub la ondojn. Tuj poste oni ree surŝultrigis la brankardon kaj la procesio komencis reiri sur la sama vojo. Sinsekve la homoj forlasis la procesion kaj malaperis en la kabanojn, kiuj

staris laŭlonge de la roka strato.

Volante vidi, kiel ĉio ĉi tio finiĝos, la aviadistoj sekvis je malgranda distanco, kaj kiam la portantoj fine malaperis en la grandan kunvenkabanon, en kiu la fremduloj la antaŭan tagon estis akceptataj, la ceremonio finiĝis.

— Stranga enterigo, — rimarkis la doktoro.

— Stranga enmarigo! — korektis la piloto.

La indiĝenoj do ne havis tombejon, sed konfidis siajn mortintojn al la maro.

Flanke de la kabanego, nome en la okcidenta paralelogramo de la insulo, troviĝis la ĝardenoj de la insulanoj; tion oni tuj vidis, starante sur la lateroj de la paralelogramo, kiu per kvar flankoj ilin ĉirkaŭis.

La aviadistoj eniris en la ĝardenon kaj miris pro la maniero, en kiu la blinduloj aranĝis la kulturadon sur sia insulo. La tuta kulturado estis tiel perfekta, ke ĝi ŝajnis esti la laboro de civilizitaj viduloj.

Flanke de la ĝardenoj, inter la kvar lateroj de la plej norda paralelogramo de la insulo, estis la fruktarboj, longaj vicoj de ĉiaj fruktoj, kaj la trio vidis multajn insulanojn, kiuj kolektis bananojn, kokosnuksojn kaj aliajn fruktojn.

La aviadistoj estis konvinkitaj, ke al la enloĝantoj de ĉi tiu tera paradizo neniam mankos manĝaĵo, kaj ankaŭ kredis, ke neniu sovaĝa besto minacas la blindulojn, ĉar ĝis nun la fremduloj vidis nur birdojn, sed tute ne kvarpiedajn brutojn aŭ bestojn, kio ekstreme mirigis ilin.

Estis nature, ke sovaĝaj bestoj ne estis sur ĉi tiu insulo, ĉar alie la vivo de blinduloj estus tie neebla.

Restis nur la kvara paralelogramo por ekzameni. Ĝi kuŝis ĉe la orienta flanko de la insulo, kaj same kiel la aliaj, estis limigita de kvar lateroj el stratoj aŭ vojoj el rokpecoj.

Ĉi tiun lastan parton de la insulo kovris plantaĵoj de bambuoj kaj larĝfoliaj arboj, kaj oni jam vidis, kiel utilaj ili estis por la

loĝantoj, kiuj faris el la bambuoj kaj folioj multajn objektojn, bezonatajn en ilia simpla vivo.

En duona tago la fremduloj faris la tutan esplorvojaĝon, kaj reiris al sia kabano por manĝi kaj trinki.

Dum ili tien iris, renkontis ilin multaj indiĝenoj kaj al la trio ree frapis la fakto, ke ĉiuj kvazaŭ salutis brubatante per sia bastono sian altan pintan ĉapelon. Kelkaj eĉ salutis per vortoj kaj la aviadistoj komprenis, kiel necese estos, baldaŭ iom lerni la lingvon, kio memkompreneble ne estos tre malfacila, ĉar pro la simpla vivmaniero kaj la malmultaj objektoj troviĝantaj sur la insulo, la lingvo ne povis esti malfacila kaj komplikita, kaj ke la tuta lingvo de ĉi tiu stranga popolo eble ne havas pli ol kelkcentojn da vortoj.

Vidinte kiom da kabanoj staras ĉe la tri flankoj ekster la pli granda kvadrato, la fremduloj povis kalkuli, ke la nombro de la enloĝantoj ne superas dumil, kaj rilate al la lingvo, la doktoro intencis kiel eble plej baldaŭ komenci siajn esplorojn.

La tuta insulo estis nur supraĵe ekzamenita kaj la fremduloj metis sian pluan atenton al la ludantaj infanoj. Ĉi tiuj, ludinte pli ol tri horojn, komencis promenadon laŭlonge de la ekstera kvadrato, dum ili vigle interparolis. Post la promenado iom post iom la promenantoj sinsekve eliris el la longa vico, kiun ili formis, sin direktante ĉiu al sia propra kabano, en kiu ili malaperis, kaj baldaŭ la stratoj estis senhomaj kaj regis ree silento sur la insulo.

Ankaŭ la laboristoj de la ĝardenoj kaj arbaro reiris hejmen, eble por manĝi aŭ ripozi, kaj la tri fremduloj restis tute solaj.

— Nia restado ĉi tie sendube estos terure unutona, — diris la piloto, — mi dezirus....

— Sed ĝi estas interesa, — interrompis lin la doktoro, kaj la fotografisto enĵetis:

— Ni ja ne bezonos loĝi ĉi tie pli longe, ol ni mem deziras; post la riparo de nia maŝino ni povos foriri eĉ morgaŭ.

— Ho ne! — opiniis la doktoro. — La afero estas tiel interesa, ke nepre ni foriros nur post kiam ni ĉion scios pri ĉi tiu stranga popolo, kaj jam morgaŭ mi volas ekzameni pri la lingvo de la insulanoj kaj precipe pri ilia blindeco, kaj ĉu tie ĉi ne estas unu vidulo; kio tre mirigus min.

Parolante plu, la trio reiris al sia kabano, tie ili manĝis kaj ripozis kelkan tempon, denove eliris por esplori, ĉu eble estas ankoraŭ io eksterordinara sur la insulo, aŭ io stranga, kion ili ankoraŭ ne vidis.

Denove ili iris sur montetoj kaj montoj, sed renkontis nenion strangan. Tie kaj tie ili trovis ovojn de marbirdoj kaj ili kolektis dekon por poste manĝi ilin en sia kabano, ĉar tio iom rompos la unutonecon rilate al la manĝaĵo kaj ankaŭ, ĉar viando estis nekonata ĉe la insulanoj.

En la semajno, kiu sekvis, la aviadistoj havis la okazon pristudi la tutan vivon kaj la karakteron de la indiĝenoj.

La vivo sur la insulo vere estis terure unutona por milionulo, sed por la blinduloj tiu vivo estis fonto de ĝuo kaj feliĉo. Ili estis egaluloj inter si: neniu el ili posedis pli multe ol la alia; kaj ĉiu eĉ hontus posedi pli, ol kiom la aliaj havas. Ŝtelistoj, murdistoj, intrigantoj, trompistoj, eĉ mensogantoj ne estis konataj ĉe la blinduloj, kaj ilia vivo fluis trankvile, glate kaj tute senzorge. Ĉiam unu, se bezone, helpis al la alia, kaj maldiligenteco ne ekzistis inter ili. La tuta popolo de la stranga insulo estis kiel unu grandega blindulejo, kiel unu granda familio. Ĉiu, kiu povis, laboris, kaj eĉ la infanoj, kiam ili ne ludis sur la ludejo, sin okupis plektante ĉapelojn kaj vestojn aŭ eĉ helpis en la ĝardenoj aŭ kolektis fruktojn.

Post unu semajno la inferianoj sciis jam la plej grandan parton de la lingvo, kiu konsistis nur el la vortoj nepre bezonataj inter la blinduloj.

Baldaŭ la doktoro notis la nomojn de ĉiuj objektoj uzataj en la insulo kaj eĉ la plej multajn verbojn li konis parkere, kaj

ankaŭ tiuj estis nur malmultaj. Estis iom malfacile ekscii, kiel la indiĝenoj nomis la abstraktaĵojn, sed la doktoro esperis iom post iom lerni ankaŭ tiujn vortojn. Konstante li estis en akompano de insulano por paroli kun li kaj ofte li miris pro la simpleco, kun kiu la blinduloj sciis esprimi siajn pensojn.

Post la paso de la dua semajno la blindulo, kiu kutime akompanis la doktoron ĉe ties promenoj, sciigis, ke estas malsanulo inter la indiĝenoj kaj jam sciante, ke la doktoro estas kuracisto, li petis lin ekzameni la malsanulon.

Duope ili eniris en la kabanon, kie kuŝis la malsana insulano, kaj la doktoron tuj ekregis la timo, ke lia neatendita paciento ne vivos plu longe. Lia timo baldaŭ realiĝis, ĉar jam la sekvintan tagon la indiĝeno mortis.

La unua afero de la doktoro estis ekzameni la kapon de la mortinto kaj speciale la lokon, kie ĉe ordinaraj homoj estas la vidorganoj.

Li pripalpis tiun lokon, atente esploris kaj rimarkis, ke la mortinto vere havas okulojn, sed ke ilin kovras nur unu palpebro kovranta la tutan okulon. Li faris tranĉaĵon tuj sub la orbito aŭ okulkavo, levis la palpebron, ŝovis ĝin supren kaj kun mirego konstatis, ke sub ĝi estas ordinara okulo. La saman li konstatis pri la alia okulo. Li atente ekzamenis la okulojn kaj diris al si mem:

— Sed tiu mortinto havas tute ordinarajn okulojn, per kiuj li sendube povus vidi, se nur la palpebro estus libera kaj ne kunkreskita kun la haŭto!

Li nun pripalpis la kapon de la insulano, kiu estis ĉe li, kaj sentis, ke sub ties palpebroj ankaŭ estas okuloj. Li pensis, ke eble li povus vidigi lin, se li nur volus permesi etan operacion, nome tratranĉadon de la haŭto.

Pripensinte kelkan tempon, li demandis al la indiĝeno:

— Ĉu vi povas diri, kio estas la diferenco inter la tago kaj la nokto?

— Mi ne bone scias, — respondis li, — sed al mi ŝajnas, ke en la tago io estas supre, tie super ni, kio malaperas, kiam komenciĝas la nokto.

— Kiel vi povas konstati tiun diferencon?

— Mi sentas, ke kelkfoje en la tago io piketas parton de mia kapo.

— Kiun parton?

La indiĝeno tuŝis siajn okulojn.

— Ĉu tiu sento neniam revenas en la nokto?

— Neniam.

— Ĉu estas io alia, kio kelkfoje piketas vian kapon sur la sama loko, kiun ĵus vi tuŝis?

— Ho jes, kelkfoje estas kolera vetero, tiam terura bruego ĉirkaŭas nin; tiu bruego ŝajnas veni de nekonata loko super ni, kaj tuj poste estas, kvazaŭ io ankoraŭ pli akra tuŝas aŭ frapetas ĉi tiun parton de mia kapo; kelkfoje mi ektimas post tiu akra ektuŝo, sed mi ne scias, kio ĝi estas.

— Ĉu la loĝantoj ĉi tie sentas ĉiuj saman ektuŝon?

— Ho jes, eĉ kelkfoje en la nokto dum kolera vetero kaj kiam ni aŭdas tiun grumblantan laŭtan bruon en la aero kaj ĉirkaŭ ni.

— Ĉu neniam vi parolis pri tio kun la ĉefo?

— La ĉefo pri tio scias pli multon, ol ni mem; ni kredas, ke en la aero super ni vivas mistera estaĵo, eĉ malica estaĵo, ĉar jam okazis, ke ĝi per sia ektuŝo mortigis unu el ni.

— Ĉu iam vi aŭdis pri organoj, per kiuj oni tre klare povas senti tiujn ektuŝojn?

— Mi ne komprenas vin, ho fremdulo.

— Nu, aŭdu kaj atentu bone! Vi povas senti per la fingro, kaj per la orelo, kaj per la lango; sed vi scias, ke tiuj sentoj estas malsamaj inter si.

— Tion mi bone scias.

— Nu, ekzistas ankoraŭ alia sento, kiun mi kaj miaj du kama-

radoj nomas la vidorgano aŭ okuloj; per tiuj okuloj ni povas ĉion senti kio moviĝas. Ni sentas jam de longa distanco, ke vi marŝas, manĝas, laboras. Ni per la okuloj sentas, kie ni iras kaj tial ni ne bezonas uzi bastonon por palpserĉi nian vojon.

— Tio estas stranga!

— Por vi, sed ne por ni, viduloj, kaj mi eĉ estas certa, ke ankaŭ vi kaj la aliaj loĝantoj ĉi tie, havas tiajn samajn sentorganojn, kiajn ni havas; kaj se vi deziras, mi volonte klopodos funkciigi tiujn organojn.

— Tio estas tre stranga, — ree diris la blindulo, kaj pripensante momenton li daŭrigis:

— Ĉu vi povas funkciigi tiun sentorganon ankaŭ al la ĉefo?

— Certe, kaj mi parolos pri tio kun li .... sed ĉu estus aliaj personoj ĉi tie, kiuj volus tion?

— Mi ne scias.... Ĉu tio igus ilin pli feliĉaj? .... pli bonaj?

— Mi vere ne povas certigi tion, sed ĉiukaze al vi mankas organo, kiun mi kaj miaj kamaradoj posedas, sen ili ni ja ne povus flugi tra la aero per nia flugmaŝino, kiun via ĉefo konsideris grandega birdo! .... Sen ili ni devus resti en nia lando kaj sen ili ni neniel povus veni al vi sur ĉi tiun insulon. Sed estas pli bone ne tuj paroli pri ĉio tio al via ĉefo, nek al iu alia; pli bone estas, ke mi mem faru tion.

— Mi ne parolos pri tio, tamen ĝi estas tre stranga! Sed, ho fremdulo, kiu povas flugi kiel birdo, ĉu vi povas klarigi al mi, kio estas tio, kio, tiel ofte piketas mian kapon, kaj kio estas tiu, por ni mistera forto, kiu jam mortigis kelkajn el ni dum la kolera vetero?

— Ho jes, ĉion tion mi facile povas klarigi. Tiu pikulo venanta ĉiumatene kaj malaperanta ĉiuvespere kaj kiu al vi kaŭzas la alternadon de tago kaj nokto, ĝi estas la suno. Ĝi estas grandega fajra globo konstante ĉirkaŭanta la tutan mondon, kaj kiu estas tiel malproksime de ni, ke nia flugmaŝino bezonus eble pli ol mil jarojn por atingi ĝin. Tiu globo tamen

ne estas la sola, ĉar ni per la okuloj ĉiuvespere kaj dum la tuta nokto povas vidi milojn kaj milojn da tiaj globoj super ni.

— Vi estas tre saĝa, vi scias multon, sed....

Li eksilentis kaj sidis senmove kaj kunplektis la fingrojn.

— Nu.... kion vi volis demandi?

— Ĉu vi per viaj specialaj sentorganoj.... aŭ okuloj, estas pli feliĉaj ol ni?

— Tion mi pridubas, tamen ni ne volonte perdus ilin. Ĉe ni nur malmultaj homoj ne havas okulojn, kaj ni nomas ilin blinduloj kaj malfeliĉaj.

— Via lando ŝajnas al mi stranga lando.

— Por vi ĝi estas stranga, sed ne por ni.

— Ĉu ĝi estas tute malsama ol ĉi tiu insulo?

— Ho jes; en ĉiuj rilatoj ĝi estas malsama.

— Ĉu vi povus kaj volus rakonti pli multe pri ĝi?

— Volonte, sed estas pli bone fari tion al ĉiuj homoj en la insulo. Eble mi povus fari tion en la granda kunvenkabano; tien povus are veni saminsulanoj, kaj al ili kune mi povus rakonti multon, kio ilin interesos. Ankaŭ povus esti, ke kelkaj el vi ŝatus ricevi la kapablon vidi kiel ni; sed pri tio mi parolos al via ĉefo, ĉar nur post lia konsento mi operacios.



III

PASIS DU PLUAJ SEMAJnoj, en kiuj speciale la piloto kaj la fotografisto terure enuis. Al ili mankis la ordinaraj festajoj, vojaĝoj kaj festenoj de ilia lando, kaj arde ili deziris kiel eble plej baldaŭ forflugi de la insulo.

La doktoro tamen persistis, ke ili restu, ĝis li ĉion scios pri la mistera insulo, por ke li povu post sia reveno en Inferion publikigi verkon kun ĉiuj eblaj detaloj pri la malkovrita Blindulujo.

Li jam image vidis en la inferiaj gazetoj longan artikolojn pri tiu nova insulo; li image vidis jam la libron de li verkitan kaj la salonojn, kie li aranĝos prelegojn; kaj se eble, li volus igi tiujn prelegojn ankoraŭ pli interesaj per du aŭ tri insulanoj, kiujn li intencis transporti kun si en la flugmaŝino; li volis montri ilin kiel pruvon de sia malkovro.

Li sciis, kian sukceson havis Kolumbo per siaj kunportitaj indiĝenoj el la Nova Mondo, kaj li atendis samspecan sukceson per siaj indiĝenoj de la mistera insulo, pri kiu ĝis nun ankoraŭ neniu aŭdis.

Dum tiuj du semajnoj li diligente daŭrigis sian studon pri ĉio sur la insulo kaj speciale pri la lingvo de la blinduloj, kaj tiun lingvon li nun sufiĉe bone komprenis kaj parolis, por fari simplan paroladon al la insulanoj, se tion la ĉefo povus kaj volus konsenti.

La ĉefo volonte konsentis, kaj jam en la sekvinta posttagmezo aro da insulanoj kunvenis en la kabanego, por aŭdi, kion la fremda doktoro volis al ili rakonti pri sia lando kaj pri ties moroj kaj kutimoj.

La kunveno komenciĝis tuj post la tagmanĝo de la indiĝenoj kaj iom post iom la kabanego pleniĝis de scivoluloj, grandparte konsistantaj el la plej aĝaj viroj, ĉar por ĉiuj enloĝantoj ne estis sufiĉa loko, pro kio la ĉefo malpermesis al la infanoj, kaj eĉ al kelkaj junuloj ĉeesti la paroladon de la fremda doktoro.

Ĉi tiu staris sur benko kaj liaj aŭskultantoj sidis sur la tero aŭ sur la benkvicoj antaŭ li.

La ĉefo, kiu reale ne estis komandanta ĉefo, sed nur la konsilanto de la insulanoj, kaj la du aliaj fremduloj sidis flanke de la doktoro kaj kiam la kabanego estis plena de aŭskultantoj, la doktoro ekrakontis jene:

— Miaj fratoj kaj amikoj, ĝis antaŭ kelkaj tagoj vi sciis nenion pri la tuta universo, en kiu via insulo estas nur tre malgranda parto. Vi sciis nenion pri homoj aŭ bestoj aŭ brutoj, vivantaj sur aliaj insuloj.

— Nun mi volas diri al vi, ke ekzistas kvin grandegaj insuloj aŭ mondpartoj kaj miloj da pli malgrandaj, kaj al la lasta grupo apartenas la via, kiu eĉ ne havas nomon. Ĉiuj tiuj insulegoj kaj insuloj estas ĉirkaŭataj de akvo kaj la tuton oni nomas „la mondo". Pri la mondo aŭ tero kaj pri la akvo nomata maroj, mi multe povas al vi rakonti. Trans unu el tiuj maroj flugis nia aeroplano aŭ flugmaŝino, per kiu ni venis al via insuleto.

— Ni venis de la insulego Inferio, sed ĝi estas tiel vasta, ke pri tio vi eĉ ne povas formi al vi ideon. Tiu mondparto kon-

sistas el multaj partoj, nomataj ŝtatoj, kaj ni venis el unu tia ŝtato en Inferio. Sur la aliaj insulegoj aŭ mondpartoj estas landoj kun diferencaj popoloj, kiuj parolas siajn proprajn lingvojn. Tiuj diferencaj lingvoj estas tiel malsamaj, ke la homoj loĝantaj en iu lando ne komprenas la loĝantojn de la aliaj landoj. Pri lingva diferenco vi por la unua fojo ricevis komprenon, kiam ni venis al vi, ĉar tiam neniu el via insulo sciis paroli kun ni, la fremduloj, kiuj parolas la inferian lingvon, tre disvastigitan, belan kaj la plej klaran el ĉiuj lingvoj.

— Feliĉe ni nun sufiĉe bone scias interparoli kun vi; tamen estas malfacile ĉiam tiel esprimi min, ke vi akurate ĉion komprenas, kion al vi mi diras. Tion kaŭzas la natura fakto, ke via lingvo havas nur malmultajn vortojn kompare kun la nia, kiu havas almenaŭ dudek vortojn, kie vi havas nur unu. Pro tio estas al mi malfacile fari ĉi tiun mian paroladon, ĉar ofte mi devas uzi vortojn pri objekto aŭ temoj, kiuj ĉi tie tute ne ekzistas. Mi do petas vin, ĉiufoje doni signon, kiam vi ne komprenas min, por ke tiam mi penu klarigi tiujn partojn de mia parolado, kiu por vi estas nekomprenebla.

La doktoro haltis momenton por vidi, kian efikon faris la komenco de lia parolado, sed nur la ĉefo, levante sin de la benko, diris:

— Mia frato, ni ne komprenas ĉion, kion vi diris, sed parolu plu. Ni komprenis pri la multaj insuloj kaj insuletoj, kaj pri la diferencaj lingvoj kaj pri kelkaj aliaj aferoj, kaj tio jam kontentigis nin. Mi do petas: parolu plu.

Li ree eksidis kaj la doktoro daŭrigis:

— En mia lando, aŭ ŝtato, la homoj povas vidi, tio estas: ili havas okulojn aŭ specialajn sentorganojn, per kiuj ili povas senti ĉion, kio moviĝas en ilia proksimo. Ekzemple miaj okuloj sentas aŭ vidas, ke vi estas ĉi tie, ili sentas, kion vi faras, kaj tion mi povas sen bastoneto, ĉar miaj okuloj kvazaŭ estas tiaj bastonetoj, kiuj atingas ĝis trans la tutan insulon.

— La granda diferenco ekzistanta inter ni kaj vi estas, ke vi ne povas vidi, aŭ ke vi estas blinduloj. Pri tiu via blindeco, kiu estas nur ŝajna, mi parolos poste pli multe.

— Mia mondparto tute diferencas de via insulo. Ĉi tie estas nur la samaj kabanoj; la loĝantoj portas la samajn vestojn kaj manĝas la samajn fruktojn kaj vi ĉiuj estas same eminentaj. Inter vi ne estas kelkaj, kiuj posedas pli multon ol la aliaj, kaj inter vi ne estas riĉuloj kaj malriĉuloj.

— En mia mondparto la domoj estas plejparte konstruitaj el brikoj, malmolaj kiel rokpecoj kaj kelkaj domoj estas tiel altaj, ke ni devus starigi centon de viaj kabanoj unujn sur la aliajn, por konstrui kabanegon same altan, kiel la ŝtonaj domoj, pri kiuj mi parolis.

— En mia ŝtato estas multaj vilaĝoj, urboj kaj urbegoj; alivorte: domaretoj, domaroj kaj domaregoj. La urbo, aŭ domarego, kie staras mia loĝejo, estas tiel vasta, ke ankaŭ pri tio vi ne povas formi al vi ĝustan ideon. Kontraŭ unu homo vivanta en via insulo, dumil homoj loĝas en mia urbego. Inter ili estas riĉuloj aŭ eminentuloj kaj malriĉuloj.

La ĉefo ree levis sin kaj demandis:

— Kio estas riĉulo kaj kio estas malriĉulo?

La doktoro pripensinte momenton daŭrigis:

— En via insuleto ne estas riĉuloj, nek malriĉuloj, ĉar neniu el vi posedas pli multon ol lia frato, sed en mia urbego kaj eĉ ĉie sur la aliaj insuloj kaj insuletoj la stato estas tute alia. Ĉe ni kelkaj eminentaj homoj kolektis tiom da mono, ke ili povis starigi fabrikojn aŭ laborejojn, en kiuj la malriĉuloj devas labori por la riĉuloj. Ree la ĉefo levis sin kaj demandis:

— Kio estas mono?

— Mi jam montris al vi monon en tiu tago, kiam ni alvenis, sed vi redonis ĝin al mi. La mono estas plata ronda objekto el metalo. Oni uzas ĝin por aĉeti, kion oni bezonas por vivi kaj por sin vesti.

— Kio estas aĉeti? — demandis la ĉefo, kiu restis staranta, ĉar la fremdaj vortoj iĝis tiel multaj, ke li opiniis, ke estas pli bone ne sidiĝi plu.

La doktoro respondis, iom ridetante pro la naiveco de la ĉefo:

— Aĉeti estas ŝanĝi moneron kontraŭ objektoj; ekzemple ĉiu, kiu volas havi objektojn, manĝaĵojn aŭ aliajn bezonaĵojn, devas antaŭe labori por havigi al si monerojn. La aĉetanto tiam estas paganto aŭ persono, kiu pagas per siaj moneroj, kaj la alia persono, de kiu li aĉetas, kaj al kiu li pagas, estas la vendanto. La vendanto havas specialajn domojn, kiujn oni nomas butikoj, kie ĉiu povas aĉeti ĉion, se li nur pagas por ili.

La ĉefo demandis:

— Sed kion do manĝas la malriĉuloj, kiuj estas malsanaj kaj tial ne povas labori?

— Ili devas pagi per ŝparita mono, tio estas: per mono, kiun antaŭe ili metis flanken, ĉar ordinare la laboristo perlaboras pli multe, ol li bezonas elspezi.

— Sed kio okazas, kiam la tuta ŝparita mono estas portita al tiu butiko?

— Tiam li povas eble pruntepreni de frato, aŭ eble lia familiano pagas por li.

— Kaj se li ne havas familianon por pagi?

— Tiam....

La doktoro pripensis momenton, poste li diris:

— Tio estas ekonomia temo kaj iom komplikita; mi nun ne povas klarigi ĝin; eble mi povos tion en alia parolado. Sed mi rakontu plu pri niaj urboj:

— Ili estas tre belaj kaj post la finita laboro la homoj povas viziti specialajn konstruaĵojn por sin amuzi. Tie ili dancas, aŭdas muzikon, rigardas komedion, boksadon....

— Kio estas komedio kaj boksado?

— Ho, la komedioj kaj boksadoj estas tre amuzaj; komedio estas io, kio tre ekscitas la ridon de la rigardantoj. Komedio

estas speco de ludo, en kiu partoprenas multaj ludantoj aŭ aktoroj. Ludante ili prezentas komikajn aŭ ridigajn personojn kaj eksterordinarajn amuzajn cirkonstancojn. La aktoroj povas ankaŭ prezenti dramojn, kiuj ofte igas la rigardantojn malĝoji kaj plori. Kompreneble la rigardantoj antaŭ ol eniri en la komediodomon aŭ teatron, devas pagi monerojn, kiuj estas por la aktoroj.

La ĉefo, konjektante, ke plori estas la malo de ridi, demandis:

— Ĉu oni devas doni monerojn por povi plori? Tio estas tre stranga, — kaj li ridetis.

La doktoro daŭrigis:

— Tio ŝajnas esti stranga, sed tion komprenas ĉiu, kiu kutimiĝis al niaj moroj kaj civilizacio, kaj konas la ekonomiajn problemojn. Mi povus plue paroli pri la operoj kaj pri la kinematografoj, kie oni aŭdas paroli kaj kanti pere de speciala aparato kaj en foresto de la aktoroj. Tio estas tre amuza kaj ĉiuvespere milionoj da rigardantoj vizitas tiajn konstruaĵojn por pasigi kelkajn agrablajn horojn. Sed nur vidulo povas tion kompreni, same kiel multajn aliajn aferojn, kiuj ŝajnas esti tre strangaj al blinduloj.

— La boksado estas pugnobatalo inter du boksistoj. La boksado estas amuza kaj utila, kaj kiu povas, tiu pagas multe por rigardi la famajn boksistojn, kiuj ofte en unu vespero perlaboras milojn da dolaroj, kio estas multa mono. Tiu batalo per la pugnoj, en kiu la boksistoj klopodas bati teren unu la alian, estas unu el la plej amuzaj tempopasigiloj.

La ĉefo ree ridetis kaj demandis:

— Ĉu tiuj rigardantoj vere sin amuzas tial ke du viroj tiel sin batas reciproke?

— Komprenu min bone, — respondis la doktoro, — ke la boksistoj batas unu la alian ne pro kolero, aŭ pro malamikeco; ili tion faras nur por montri, kiu el ambaŭ estas la pli lerta kaj forta. Post kiam la falinto ree sin levis, li amike premas

la manon de la kontraŭulo, por montri al li sian amikecon.

— Tia ludo estas ankaŭ io tre stranga, mia frato, kaj mi deziras scii, ĉu oni devas esti vidulo por kompreni tion?

— Nature, la viduloj havas aliajn kutimojn kaj aliajn opiniojn pri multaj aferoj ol blinduloj, kaj tial estas dezirinde, ke vi mem povu vidi ĉiujn aferojn, pri kiuj vi nun tiel miras.

— Mia frato sendube pravas, sed mi mem eĉ kiel vidulo ne ŝatus la boksadon; mi tamen volus viziti teatron, ne por malĝoji, sed por ĝoji kaj ridi; krom tio vi ne klarigis al mi, kio estas plori; ĉu tio estas malridi aŭ la malo de ĝoji kaj sin amuzi?

— Vidulo ploras, kiam lin trafis granda malfeliĉo, aŭ kiam li tre malĝojas; kaj li ploras per la okuloj; tiam el liaj okuloj fluas larmoj aŭ speco de akva fluidaĵo.

— Ne havante okulojn, mi ne povas kompreni tion, kvankam mi bone scias, kio estas la diferenco inter ĝoji kaj malĝoji.

La doktoro daŭrigis:

— En mia mondparto kaj ankaŭ en mia urbo estas ne nur homoj, sed ankaŭ bestoj. Bestoj estas vivantaj estaĵoj; ili povas manĝi, iri, dormi, sed ne pensi aŭ paroli; ili ne havas manojn, sed kvar piedojn kaj ilia korpo estas kovrita de haroj. Ili ne havas prudenton, kiel la homoj, sed ion, kion ni nomas instinkto, kiun havas ankaŭ la birdoj. En preskaŭ ĉiu domo estas bestoj, nomataj hundo aŭ kato. Precipe la hundo estas agrabla, amika kaj utila besto; ĝi tre amas sian mastron kaj eĉ, se bezone, defendas lin, se iu alia homo volas lin ataki; ĝi ankaŭ atakas ŝtelistojn aŭ murdistojn, kiuj kelkfoje en la nokto perforte eniris en la domon por forŝteli monon aŭ ion alian de alta valoro. Tiuj hundoj do estas tre ŝatataj. Oni nomas ilin „dombestoj".

— Sed kio estas ŝtelisto kaj murdisto?

— Ili estas malbonaj homoj; ili ruze aŭ perforte prenas la monon de aliulo, aŭ eĉ murdas lin.

— Kio estas murdi?

— Murdi estas krime mortigi alian homon. Murdistoj tial

estas la plej danĝeraj homoj en la ŝtato, kaj ili estas rigardataj kiel ŝtataj malamikoj.

— Sed, diru al mi, ho fremdulo: Kial do ili ŝtelas aŭ murdas?

— Ofte ili murdas por povi preni la monon de iu alia, se tiu alia kontraŭstaras; aŭ ili murdas por sin venĝi.

— Kio estas sin venĝi?

— Sin venĝi estas.... havigi al si kompenson pro suferita malbono, tio estas: refari la saman malbonon al iu, kiu faris malbonon al li.

— Strange! Ĉi tie neniu sin venĝas. Sed kial do ili ŝtelas?.... ankaŭ por sin venĝi?

— Mi ja klarigis tion: por akiri monon. Sed ilin kaj la murdistojn oni enŝlosas en malliberejon, se oni povas kapti aŭ aresti ilin, kaj specialaj oficistoj, aŭ ŝtataj servistoj, nomataj policanoj, plejparte sin okupas por kapti kaj malliberigi ilin.

— Vi parolas pri strangaj aferoj, mia frato; sed diru, ĉu en via mondparto ne estas sufiĉa nutraĵo.... sufiĉaj fruktoj?

— Kelkfoje eĉ tro multe, kaj ĉiukaze pli multe por ĉiu, ol en via insulo.

— Nu do.... kial tiuj ŝtelistoj kaj murdistoj ne kolektas fruktojn? Tio ja estas multe pli simpla kaj pli facila, ol ŝteli aŭ murdi!!

— Mi ja klarigis al mia frato, ke oni bezonas monon por aĉeti fruktojn, kaj tiuj fruktoj apartenas nur al specialaj posedantoj de la fruktoj!

— Via mondparto ŝajnas al mi tre komplikita: tamen mi dezirus okule senti aŭ vidi ĉiujn tiujn strangaĵojn, kvankam multaj el ili ne plaĉus al mi.

— Konante niajn kutimojn kaj morojn, vi sendube ŝatus ilin. Sed mi daŭrigu: En mia mondparto oni ne multe promenas, sed uzas ĉiajn veturilojn, per kiuj oni ĉien povas iri en oportuna maniero, sed antaŭe paginte; tio ankaŭ estas necesa pro la longaj distancoj.

— Vi nun komprenas, ho ĉefo kaj aliaj fratoj, ke la diferenco inter via insulo kaj aliaj insuloj kaj insulegoj estas tre granda, sed la plej granda diferenco estas, ke ĉe ni en Inferio kaj en ĉiuj aliaj landoj la homoj povas vidi kaj ke vi estas blinduloj. Kaj mi estas certa, ke multaj el vi tre ŝatus posedi la vidkapablon; havante ĝin vi povus akompani nin en nia flugaparato al mia urbo, por persone sperti tion, pri kio mi ĵus al vi parolis. Kaj mi finas mian paroladon certigante vin, ke vi ne plu estos blinduloj, se vi tion deziras. Mi nome ekzamenis mortinton, antaŭ ol vi ĵetis lin en la maron. Tiu mortinto havis okulojn, same kiel mi, tamen ili estis kovritaj de haŭto, kiu malebligas la vidadon. Tiun kovraĵon oni nomas palpebro. Antaŭ kelkaj tagoj mi proponis al miaj samlandanoj, ke ni konsentu al tri el via insulo flugi kun ni al Saidumo por tie konatiĝi kun la moroj kaj kutimoj de nia ŝtato; sed por ebligi tion, unu kondiĉo estas necesa, nome: ke tiuj tri viaj saminsulanoj antaŭe akiru la vidkapablon kaj tio estas ebla, ĉar mi povas deklari antaŭ vi ĉiuj, ke reale neniu el vi estas blindulo, ke vi ĉiuj havas okulojn kaj ke post malgranda, nedanĝera operacio vi povos vidi same bone kiel ni, viaj gastoj. Tial mi demandas, ĉu tri personoj inter vi, prefere junuloj, sentas la deziron akompani nin en nia aeroplano por flugi kun ni trans la grandan maron, al nia lando? Pripensu la proponon, kiun mi nun faras al vi, parolu pri ĝi kun via ĉefo, kaj se vi konsentas pri la malgranda operacio, kiu igos vin viduloj, ili iros kun ni kaj vidos, kiel aspektas nia lando, niaj urboj, niaj homoj kaj bestoj kaj ĉio, kio estas tie kaj kio en ĉio diferencas de ĉio, kio troviĝas sur via insulo....

— Jam morgaŭ mi volonte atendos ĉe mi en mia kabano la tri junulojn, kiuj konsentos akompani nin kiel viduloj al Inferio, al Saidumo. Kaj nun, miaj fratoj, mi kaj miaj samlandanoj foriros el ĉi tiu kabanego kaj lasos al vi la okazon priparoli mian proponon.

— Mi promesas, ke post kvin jaroj, tio estas: post kvin pluvosezonoj, mi revenos ĉi tien kun mia flugmaŝino por rekonduki la junulojn, kiuj konsentos akompani nin al Inferio, kiel viduloj.

Dirinte tion, la doktoro kun la du aliaj inferianoj forlasis la kunigitajn insulanojn.

Dum longa tempo ĉi tiuj diris nenion, sed pripensis. Multaj scivoliĝis post la malgranda parolado de la doktoro, sed ĉiujn iom timigis la tiel nomita operacio. Neniu el li antaŭe konjektis, ke li same kiel la fremduloj havas okulojn, sed nun pripalpante la lokon de sia vizaĝo, kie laŭ la certigo de la doktoro troviĝas tiuj organoj, ĉiu ekkredis pri la ebleco de tiu certigo.

Fine la ĉefo diris:

— Fratoj, la fremduloj, tion ni ĉiuj scias, havas specialan mirindan sentilon, nome okulojn, pri kiuj la doktoro parolis; mi mem sentis per mia fingro, ke malantaŭ la palpebro io kaŝiĝas, kaj sendube, tio estas sama palpilo, per kiu mi povas senti ĉion, kio okazas je kelka distanco. Mi kredas al la certigo de la fremdulo rilate al la okuloj, kaj se tri el vi kuraĝas submeti sin al la operacio, li diru tion: mi atendas.

Por la dua fojo regis longa silento kaj fine unu el la ĉeestantaj junuloj diris:

— Se la ĉefo permesas kaj konsentas al mi submeti min al tiu operacio por ricevi la vidkapablon, tiam mi estas inklina submeti min al ĝi, ĉar mi estas tre scivola pri ĉio, kion la fremdulo rakontis pri sia insulego, pri sia urbo kaj pri aliaj mirindaj aferoj.

Ree sekvis momento de silento, post kiu alia junulo sin prezentis kaj post li ankoraŭ kvin aliaj.

Sep insulanoj, instigitaj de la parolado de la doktoro kaj de propra scivoleco, decidis do sin anonci kiel kunvojaĝantoj por flugi kun la fremduloj trans la Grandan Oceanon al Saidumo.

— — — — — — — — — — — — — —

En la sekvinta mateno la sepo iris al la kabano de la inferianoj.

La doktoro estis konvinkita, ke troviĝas sur la insulo scivolemuloj, dezirantaj viziti alian landon, sed li ne atendis, ke tiel multaj sin anoncos, kaj ĉar nur tri personoj povis esti akceptataj, li foririgis kvar el ili kaj la tri aliajn, kiuj aspektis kiel dudekjaruloj, li sidigis en la antaŭa parto de la kabano. Supraĵe ekzameninte iliajn palpebrojn kaj sentinte, ke sub ili sin kaŝas okuloj, li prenis kun si unu el la trio al sia dormejo, nome al la malantaŭa parto de la kabano. La aliaj postrestis sur la benko, atendante, ke la doktoro vokos ilin.

Kiam li eniris kun la blindulo en la dormejon, li petis la du inferianojn eliri, por ke li ne estu ĝenata en sia operacio.

Estante sola kun la blinda junulo, li diris al li:

— Kiel vi nomiĝas, amiko?

— Mi nomiĝas *Du-kvar-du;* tio estas: La dua el la kvara de la dua.

— Stranga nomo!

— Tute ne: mi estas la dua infano de gepatroj, loĝantaj en la kvara kabano de la dua domvico.

— Ho, nun mi komprenas; sed kiel do nomiĝas la du homoj, kiuj nun atendas malantaŭ tiu foliomuro?

— Ili nomiĝas: *Unu-sep-du,* nome la unua el la sepa de la dua kaj *Sola-lasta-unu,* aŭ la sola el la lasta el la unua.

— Tion mi ankaŭ komprenas, sed mi opinias, ke tiaj nomoj estas iom malklaraj.

— Tute ne, almenaŭ ne por ni.

— Povas esti, sed en mia lando ĉiu persono havas specialan propran nomon ne dependan de la loko, kie li loĝas, ĉar tio estus neebla. Sed diru al mi: Kiel do nomiĝas via patro kaj via patrino?

— Tre nature ili nomiĝas: Patro de kvar-du, aŭ: La patro

de la kvara kabano de la dua domvico, kaj la patrino: Patrino de kvar-du.

— Ankaŭ tio nun estas komprenebla, sed ĉu ĉiam oni uzas inter vi tiujn longajn nomojn?

— Ho ne, nur por indiki ilin, se ni parolas pri ili; inter ni kaj dum interparolo ni nomas nin simple: frato, patro, patrino.

— Sed kiel vi alparolas filon de najbaro?

— Li ja estas ankaŭ mia frato!

— Vi pravas, tamen mi nomos vin kaj viajn du tie sidantajn fratojn per inferiaj nomoj. Vin mi nomos Eduardo; ĉu vi povas memori tiun nomon?

— Mi povas.

— Bone; kaj viajn fratojn, kiuj tie atendas, mi nomos Petro kaj Karlo; do estonte vi ne estos plu la tioma el la tioma de la tioma, nek Tiom-tiom-tiom, sed Eduardo, Petro kaj Karlo; tion mi diros ankaŭ al viaj fratoj.

La blindulo ridetis, sed videble li konsideris tiun nomŝanĝon superflua kaj eĉ stranga.

— Ĉu vi do konsentas pri la operacio? — demandis la doktoro.

— Mi konsentas; mi volonte vizitos vian landon.

— Bone.... Nun kviete kaj senmove sidu; mi bezonas nun fari tranĉon sub viaj okuloj kaj levi la palpebrojn; jen ĉio; sed komprenu, ke en la unua tempo post la operacio vin ekregos strangaj sentoj kaj impresoj, ĉar unue viaj okuloj ne kutimiĝis al la lumo, due en la komenco vi vidos en iom stranga maniero, ĉar vi ne tuj povos distingi la objektojn ĉirkaŭ vi; tion vi povos nur post kelkaj tagoj kaj tial necesas, ke vi restu en ĉi tiu kabano ĝis vi povos vidi, kiel mi kaj la aliaj fremduloj.

— Mi atendos.

— Do, sidu senmove kaj ne timu; mi kaŭzos al vi iom da doloro, sed ĝi estas elportebla; ne kriu, alie vi povus timigi Petron kaj Karlon.

La blindulo, aŭdante tiujn nomojn, ree ridetis.

La operacio daŭris nur kelkajn sekundojn. Farinte la trančojn la doktoro ŝovis supren la du palpebrojn de Eduardo kaj ĉi tiu eligis krieton de miro.

— Kvietiĝu! — admonis la doktoro, forviŝante kelkajn sangogutojn de la palpebroj.

— Nun restu ĉi tie sidante kaj mi operacios la du aliajn.

Li vokis al si unu el la du atendantoj. Post kiam ĉi tiu eniris en la dormejon de la doktoro, ĉi tiu sidigis ankaŭ lin kaj diris al li:

— Eble vi aŭdis, ke via frato, kiu unua venis al mi, nun estas nomata Eduardo, ĉu ne?

— Mi aŭdis.

— Kaj vin ni de nun nomos Petro; ĉu tiu nomo povas kontentigi vin?

— Mia nomo estos Petro.

— Interkonsentite!

La operacio de Petro baldaŭ finiĝis kaj ankaŭ li eligis krieton de miro.

— Nun restu kviete sidanta, por ke mi venigu Karlon, admonis la doktoro.

Karlo jam sciis, ke de nun tio estos lia nomo; ankaŭ li pacience lasis sin operacii.

— Nun restu ĉi tie, ĝis mi kondukos vin eksteren en la lumon, — diris la doktoro, — ĉar vi nun ankoraŭ ne povas elteni la sunradiojn, ne eĉ la krepuskon; nur post kelkaj tagoj vi tion povos kaj tiam vi spertos, kia trezoro estas la okuloj!

— Ni restos ĉi tie.

IV

SURDULO NEATENDITE

ricevinte la aŭdkapablon poste rakontis pri tio, ke en la komenco li sentis sin tre malfeliĉa pro la multaj eksentoj, kiujn ĉe li kaŭzis tiu nova kapablo.

Li kvazaŭ sin sentis ĉirkaŭita de ĉiaj demonoj, kiuj de li iom malproksimiĝis nur, kiam li ŝtopis siajn orelojn. La plej malforta bruo ĝenis lin kaj la laŭtaj terure lin turmentis, speciale kiam ili are lin atakis.

Li rakontis plue, ke daŭris kelkan tempon, antaŭ ol li kutimiĝis al la diferencaj bruetoj kaj bruoj, kiuj eĉ ne permesis al li dormi.

Nur post multaj tagoj, iom post iom, li rekvietiĝis, sentis sin kiel en sia surdeco, sed ne povis ankoraŭ bone diferencigi la malsamajn sonojn; li eĉ dum longa tempo komprenis nenion pri ĉio, kion al li oni diris, kaj daŭris multajn tagojn, antaŭ ol li estis kapabla kompreni, kiel iu, kiu de sia naskiĝo estis aŭdulo.

Se la tri insulanoj devus priskribi sian staton post kiam iliaj palpebroj estis ŝovataj supren, ili dirus, ke subite ili kvazaŭ transiris en tute alian mondon.

En ilia blindeco ĉio ĉirkaŭ ili daŭre estis nigra, kaj nur hela taglumo iom ŝanĝis tiun koloron donante al ĝi kelkan malfortan helan nuancon. Sed post kiam iliaj okuloj malfermiĝis kaj subite la blinduloj sin sentis lokitaj en specon de krepusko, kiu sufiĉe klare konturis la ilin ĉirkaŭantajn objektojn, ili kun ektimo kelkajn fojojn sinsekve mallevis kaj levis la palpebrojn, okulumante kaj rigardante antaŭ sin, kvazaŭ ili vidus fantomojn. Plej multe timigis ilin la figuro de la sin movanta doktoro, la unua homa estaĵo, kiun por la unua fojo ili vidis.

Liaj movoj estis al ili io mistera, nesolvebla. Blinduloj, subite ricevinte la vidkapablon, vidas ĉiujn objektojn kaj precipe la moviĝantajn en tute alia maniero, ol iu, kiu vidis de sia naskiĝo. La doktoro tion sciis kaj tial li diris:

— Ne timu, miaj amikoj, sed kviete rigardu min kaj miajn movojn. Komence ĉio estas al vi io mistera, sed baldaŭ tio ŝanĝiĝos. Vi nun estas en duonlumo, ĉar la sunradioj nun pro la fermita kabanpordo povas penetri nur sub ĝi kaj tial ili povas nur malforte prilumi la internon, sed eĉ tiu malforta lumo estas ankoraŭ doloriga por viaj okuloj. Krom tio vi ankoraŭ tute ne povas klare distingi la objektojn, kaj ankoraŭ pli malbone la moviĝantajn. Vi eĉ ne povas vidi, ke io proksimiĝas al aŭ malproksimiĝas de viaj okuloj, ĉar por ili la objektoj iĝas pli grandaj aŭ pli malgrandaj, depende de la fakto, ĉu ili iras al vi aŭ foriras de vi. Ekzemple rigardu mian manon; mi ĝin movos en la direkto al via kapo, kaj ŝajnos, ke ĝi pligrandiĝas... jen rigardu!... Kaj nun, dum mi retiras mian manon, ĝi ŝajnas iom post iom pli malgrandiĝi. Ankaŭ vi ne povas ankoraŭ distingi la kolorojn. La koloro, kiun vi ĝis nun vidis, estas la nigra, sed ekzistas multaj aliaj, kiujn iom post iom vi poste povos diferencigi; kaj nur tiam vi ĝuos la vidkapablon, kiu nun tute ne plaĉas al vi. Tial havu paciencon, restu ĉi tie, ĝis mi permesos al vi iri eksteren, unue en vespero kaj mateno dum krepusko kaj nur poste, kiam la suno staros sur la ĉielo.

— Ni atendos, — kviete respondis Eduardo.

Li pacience atendis kaj ankaŭ liaj du samsortuloj. Ili ricevis sian manĝaĵon en la kabano, restis sidantaj sur la benko, en la nokto kuŝis sur la lito kaj en la sekvinta mateno eĉ iris kelkajn paŝojn en la kabano.

Iom post iom la okuloj de la novaj viduloj kutimiĝis al sia nova stato, kaj la sepan tagon post la operacio la doktoro kondukis siajn pacientojn eksteren.

Estis vespere, la krepusko falis kaj kvapore, la doktoro kaj la tri insulanoj, promenis laŭlonge de la stratoj, kaj haltis antaŭ la ŝtuparo, kie la rivero ĵetiĝis en la maron.

La doktoro diris:

— Ĉi tio estas la deklivo, kie viaj fratoj lasas gliti la mortintojn en la maron; kaj tie, rekte antaŭ vi, etendiĝas la maro, kiu ĉirkaŭas la tutan insulon. Jen, rigardu..., kaj tie speguliĝas la luno, kiu mem staras tie supre sur la ĉielo. Tiu luno daŭrigos sian iron, ĝis kiam post kelkaj horoj ĝi kuŝiĝos post la ŝajna fino de la maro, nomata horizonto. Vi lernos kaj spertos post kelkaj tagoj, ke tie, malantaŭ la horizonto, la maro kurbiĝas malsupren; tial ni vidas nur malgrandan parton de la vasta Oceano, kies vastecon vi ankoraŭ ne povas kompreni. La distanco de ĉi tie ĝis la horizonto estas nur malmultaj mejloj.

La junuloj kun miro rigardis la maron, kiu pro la bona vetero nur malforte moviĝis, kaj ili vidis la du lunojn, el kiuj unu ŝajne kuŝis sur la ondoj, dum el ĝi fluis tremetantaj lumstrioj.

— Estas malfacile kompreni, — diris la doktoro, — ke tiu lasta luno reale tute ne ekzistas, sed estas nur la reflektaĵo de la vera luno, tie supre sur la ĉielo. Post kelkaj horoj vi vidos tie supre aron da tre malgrandaj lunoj; ili estas steloj, pri kiuj poste mi pli multon rakontos al vi. Nun ni eniru en la montetojn, kiuj etendiĝas tute ĉirkaŭ via insulo. Tiuj montetoj estos al vi tre strangaj, ĉar ĝis nun neniam iu kun vi parolis pri ili. Ni iros laŭlonge de tiu blanka bendo, kiu nun moviĝas kaj kiel giganta

serpento rampas de alta monto kaj daŭrigas sian vojon inter la montetoj ĝis ĉi tiu loko, por unuiĝi kun la maro. El tiu longa serpentanta bendo vi ĉiutage ricevas vian akvon, kiu havas alian guston ol tiu de la maro, kiu estas sala kaj ne trinkebla.

Atente la trio aŭskultis al ĉio, kion diris la doktoro, kiu dum la promeno tra la montetoj montris ĉiajn altaĵojn kaj poste la deklivon kaj la marbirdojn, kiuj kun ektimo forflugis, kiam la promenantoj tro multe proksimiĝis al ili.

— Jen, tie kuŝas birdonesto kun ovoj — diris la doktoro, — mi montros al vi la ovojn. — Li iris al la nesto kaj la trio sekvis.

— Elprenu ovon — diris li, — sed estu singarda: ili estas facile rompeblaj.

Eduardo demandis:

— Kio do estas ovo?

— La birdo naskas ovojn kaj naskinte tri aŭ kvar, sidiĝas sur ili por elkovi ilin per la varmo de sia korpo, ĝis kiam el la ovoj venas la idoj, la junaj birdoj. En Inferio oni manĝas ovojn, kio eble ŝajnas al vi stranga, ĉar sur via insulo vi manĝas nur vegetaĵon; sed nun rigardu ĉirkaŭ vin. Malantaŭ vi estas parto de la insula montoĉenaro, kaj tie malsupre etendiĝas la stratoj, kaj staras la kabanvicoj; vi vidas nur iliajn tegmentojn kaj ĉio ŝajnas tre malgranda pro la distanco inter ni kaj ili, sed ju pli ni proksimiĝos al ili, des pli ili ŝajne pligrandiĝos. Al ĉio tio vi baldaŭ kutimiĝos, kaj post kelkaj tagoj ĝi estos al vi tre natura fakto.... Nun rigardu la lunon, vi vidos, ke ĝi ne staras plu sur la sama loko, kie vi ĝin vidis antaŭ du horoj; tio montras, ke ŝajne tre malrapide ĝi iras sian vojon. Tiu luno revenas en kelkaj sinsekvantaj vesperoj kaj en ĉiu vespero ĝi ŝajnas pli malgranda ol nun, ĝis fine ĝi tute malaperos. Estas, kvazaŭ mistera forto tie supre ĉiuvespere trančas pecon de ĝi, sed en realo io tute alia kaŭzas tiun plimalgrandiĝon; sed mi nun ne povas klarigi tion, eble post kelkaj tagoj mi povos. Post

kiam tiu luno forestis dum kelkaj noktoj, ĝi iom post iom reaperos, komence nur unu longa maldika peco de ĝi estos videbla, sed tiu peco en ĉiu sekvanta vespero estos pli granda, ĝis fine la luno ree aperos en sia tuta grandeco; tiam ni nomas ĝin la plena luno. Ofte okazas tamen, ke pro la nuboj ŝvebantaj sur la ĉielo ni ne povas vidi la lunon kaj la stelojn. Nun ni vidas en la okcidento nur kelkajn nubetojn, sed eble morgaŭ la tuta ĉielo estos kovrita de multaj pezaj nigraj nuboj; kaj kelkfoje tiel multaj kovras la ĉielon, ke en la tago ni eĉ ne povas vidi la alie tiel helan sunon, kiu en bela vetero ordinare prilumas la teron.

— Sed nun mi ne parolos plu pri tiaj aferoj, kiel ajn interesaj ili eble estas por vi, ĉar ni devas reiri hejmen. Morgaŭ mi kondukos vin denove eksteren, se la sunlumo ne estos tro brila, ĉar tro helan sunlumon viaj okuloj ankoraŭ ne povas elteni. Tuj kiam vi povos tion, ni kune kun miaj du inferiaj amikoj entreprenos nian returnan flugon trans la Oceanon al Saidumo, mia loĝurbo.

La sekvintan tagon la suno preskaŭ ne lumis, pro kio la doktoro tiam povis fari novan promenon kun la junuloj. Post la paso de ses pluaj tagoj ĉi tiuj sufiĉe kutimiĝis al sia nova stato, tiel, ke oni povis jam pensi pri la transflugo.

Intertempe la insulanoj tre miris pro la miraklo, ke subite tri el ili povas vidi, same kiel la fremduloj, kaj multe oni parolis pri la estonta forvojaĝo de la flugmaŝino.

Estis decidite, ke la tri insulanoj kunprenu siajn insulajn vestojn kaj eĉ la altajn pintajn ĉapelojn. Ili povus utili kiel pruvo, ke la inferianoj, kvankam ilia transflugo de Saidumo al Sidney malsukcesis, ne vane entreprenis sian vojaĝon, ĉar ili meze en la Granda Oceano malkovris misteran insulon kun same misteraj enloĝantoj. Pri tiu insulo, kiu eble ĝis nun estis rigardata kiel giganta elstaranta roko aŭ estingiĝinta vulkano, de neniu maristo vizitata, longaj artikoloj estis aperontaj en la saidumaj ĵur-

naloj, kaj la doktoro intencis fari prelegojn, se eble en universitatoj, kie li intencis montri la tri estintajn blindulojn, vestitajn per iliaj insulaj vestoj.

Fine la tago de la forvojaĝo proksimiĝis. Jam frue en la mateno ĉiuj insulanoj are kolektiĝis ĉirkaŭ la aeroplano por aŭdi ĝin flugi for, kaj por adiaŭi siajn fratojn, kiuj iris renkonte al mirindaj aventuroj, pri kiuj neniu sur la insulo iam sonĝis aŭ pensis.

En la mateno je la deka horo laŭ la horloĝo de la piloto, ĉio estis preta.

La junuloj salutis kaj adiaŭis siajn familianojn kaj la ĉefon. La doktoro faris malgrandan paroladon, en kiu li esprimis sian dankon al la insulanoj pro ilia gastamo; poste li adiaŭis speciale la ĉefon, kaj sincere promesinte, ke li revenos post kvin jaroj kun la forirantaj insulanoj, li eniris en la aeroplanon.

La helico ekturniĝis, komencis ronkadi kaj minuton poste la aeroplano leviĝis, direktiĝis poste nord-okcidenten kaj baldaŭ ne estis plu aŭdebla.

La insulanoj, kiel veraj pacienculoj, reiris al siaj kabanoj aŭ laboroj kaj sur la insulo refoje regis la sama kvieteco, kiel antaŭ la veno de la fremduloj.



V

POR MALLIBERULO KVIN jaroj estas longa tempo; ankaŭ al malpacienculoj tiu tempo ŝajnas longa, sed ne al pacienca homo, por kiu ĝi estas nur bagatelo, pasanta kiel unu palpebrumo. Same al la insulanoj, kies vivo kviete fluis plu, ne interrompata de eksterordinaraj okazaĵoj, la kvin jaroj, interkonsentitaj de la ĉefo kaj la doktoro-milionulo, jam pasis, antaŭ ol la blinduloj tion rimarkis, ĉar jen en unu bela antaŭtagmezo ili neatendite denove aŭdis super si tiun saman ronkadon de flugmaŝino, kiu antaŭ kvin jaroj rompis la kvietecon de ilia ekzistado. Subite ili rememoris pri la promeso de la fremda doktoro rilate al lia reveno kun la tri junaj fratoj, kaj scivole ili rapidis al la kabanego, antaŭ kiu ili ree atendis la surteriĝon de la aeroplano.

Farinte kelkajn cirklojn super la pli malgranda kvadrato, ĝi fine atingis la teron kaj haltis preskaŭ sur la sama loko, de kie ĝi forflugis antaŭ kvin jaroj.

La doktoro do plenumis sian promeson. Scivole la insulanoj

ariĝis ĉirkaŭ la stranga, kvazaŭ senpluma mistera birdego, kaj atendis, esperante fine ree havi en sia mezo la fratojn, kiuj nun revenis el foraj fremdaj regionoj, kaj eble baldaŭ rakontos al siaj samgentanoj pri la civilizacio, moroj kaj kutimoj, pri kiuj la doktoro jam antaŭe parolis al ili post sia unua alveno sur la insulon.

La renkontiĝo estis plej kora, kaj post kiam la aviadistoj elrampis el sia flugmaŝino, la insulanoj pripalpis ilin de supre malsupren, kaj ĉio montris ilian feliĉon kaj kontentecon pri la reveno de la viduloj, al kiuj nun apartenis ja ankaŭ iliaj tri junaj fratoj.

Ankaŭ la ĉefo bonvenigis ilin, kaj post kiam pasis la unua ĝojo pro la feliĉa, prospera reveno, li eniris en la kabanegon, kaj lin sekvis kelkaj pli aĝaj fratoj kaj la ĵus revenintaj aviadistoj.

La doktoro ekstaris sur benko kaj jene alparolis la insulanojn, kiuj staris antaŭ li:

— Fratoj, amikoj! .... Kiam antaŭ kvin jaroj ni foriris de via insulo, kunprenante kun ni tri el viaj fratoj, tiam mi estis certa, ke mi povos plenumi mian promeson rekonduki viajn tri fratojn post la interkonsentita tempospaco. Tiu tempo nun pasis, kaj jen ni kune revenis. Sed viaj fratoj revenas kiel tute aliaj viroj. Forflugante de ĉi tiu insulo, ili sciis nur iomete paroli la inferian lingvon, sed nun ili ĝin parolas kiel naskiĝintaj inferianoj, kaj pri tio mi mem, kaj ankaŭ ili fieras.

Tamen ne nur nian lingvon ili lernis, sed ili nun revenis kiel civilizitaj viroj, tio estas: kiel viroj, kiuj plene studis la kutimojn de civilizita lando, de la plej potenca lando de la tuta mondo. Eble ili iĝos anoj aŭ burĝoj de tiu lando, se ili ne restos ĉi tie.

Pri tio ni parolos poste plu, ĉar ilia restado ĉi tie aŭ ilia reiro al Inferio dependos de via propra decido kaj volo, kiun volonte mi ekscios post kelkaj tagoj. Sciu do, ke viaj tri fratoj multon spertis dum sia forestado; unu el ili, nome Du-kvar-du, kiun

ni en nia lando nomas Eduardo, kaj kiun ankaŭ poste mi nomos Eduardo, restis dum kvin jaroj en mia lando, pro kio li iĝis kvazaŭ vera inferiano. La dua frato: Unu-sep-du aŭ Petro, ankaŭ pasigis tiun tempon en Inferio kaj la tria: Sola-lasta-unu, aŭ Karlo, vivis dum tiuj jaroj plejparte sur insulo, kie li spertis tre strangajn aventurojn. Tiu insulo estas proksimume tiel granda, kiel la via, sed en ĉiuj aliaj rilatoj ĝi estas tute diferenca, speciale pri moroj kaj kutimoj. Mi nun ne diros pli multe pri tio, sed ili mem faros tion, kaj tial mi proponos al ili jene: Via frato Unu-kvar-du parolos ĉi tie en la kabanego, morgaŭ vespere antaŭ vi ĉiuj; tion saman faros postmorgaŭ Unu-sep-du, kaj en la tria vespero parolos Sola-lasta-unu. Post iliaj paroladoj la ĉefo povos decidi, kio estos pli bona por ili: estonte resti ĉi tie, aŭ denove forflugi kun ni trans la Oceanon por neniam reveni. Al vi do tiu decido!.... kaj ĝis morgaŭ vespere! —

La malgranda parolado de la doktoro finiĝis, kaj la ĉefo kun la insulanoj eliris el la kabanego.

La tri junuloj en tiu vespero faris promenadon tra la tuta insulo kaj eĉ suriris la montojn, kaj miris, ke ĉio sur la insulo estas ankoraŭ en la sama stato kiel ĉe ilia foriro.... Nenio ŝanĝiĝis.... Ĉiuj kabanoj staris ankoraŭ sur la sama loko, la legomaj ĝardenoj, frukta ĝardeno, la arbaretoj estis prilaboritaj kiel ĉiam antaŭe, la insulanoj portis ankoraŭ la samajn folio-vestojn, la samaj pintaj ĉapeloj kovris ankoraŭ ilian kapon ĝis la buŝo, la portantoj iris kun la samaj bastonoj kaj la infanoj la sekvintan matenon ludis kiel kutime la samajn ludojn, sur la sama ĝenerala ludejo, muzikante, kiel antaŭe dum la laboro en la kabanoj, kiel tio okazis jam dum nememoreblaj jaroj.

VI

LA SEKVINTAN VESPERON Eduardo, aŭ alinome Unukvar-du devis paroli al la insulanoj, kaj la kabanego ree estis plenplena de scivoluloj, dezirantaj aŭdi, kion la civilizita insulano rakontos al ili pri la granda insulo, kie li pasigis kvin pluvo-sezonojn.

La kabanego enhavis pli da homoj, ol iam antaŭe, ĉar la ĉefo konsentis ankaŭ al kelkaj geknaboj ĉeesti la kunvenon, kio nur tre malofte okazis. Inter tiuj geknaboj estis liaj du infanoj: knabo dek-du-jara kaj knabino dek-sep-jara, kiuj neniam antaŭe ĉeestis kunvenon de la insulanoj.

Unu-kvar-du staris sur la antaŭa benko, dum kelka tempo rigardis antaŭ sin kaj poste jene ekparolis:

— Gepatroj kaj gefratoj! La flugado de la insulo al Saidumo estas unutona kaj tute sen variado, ĉar la aviadistoj dum tia transflugo vidas ĉirkaŭ kaj sub si nur aeron kaj akvon. Dum la tuta vojaĝo oni rimarkas nur kelkajn insuletojn, kiuj malproksime sub la aeroplano ŝajne glitas malantaŭen, dum la flugmaŝino kvazaŭ restas en la sama loko.

Nur post tuta tago kaj post tuta nokto tiu unutoneco ĉesis, ĉar subite mi rimarkis ion tre strangan, nome la altajn domojn, kiuj staras ĉe la marbordo de Saidumo. Ili estis por mi io eksterordinara, kaj nur malfacile mi povis kompreni, kial homoj bezonas tiajn altajn konstruaĵojn. Mi cerbumis ankoraŭ pri la fakto, kiom da homoj povas loĝi en tiuj altaj domoj, kiam la aeroplano jam flugis super la tereno de surteriĝo.

Malrapide ĝi ŝvebis malsupren, subite tuŝis la teron, veturis ankoraŭ kelkan distancon kaj fine haltis.

Ni do estis en Inferio kaj scivole mi rigardis ĉirkaŭen.

La doktoro unua elrampis el la aeroplano, kaj lin tuj sekvis la piloto kaj la fotografisto.

Miaj du fratoj kaj mi sidis ankoraŭ kaj atendis, ĝis kiam la doktoro donos al ni la signon forlasi la flugmaŝinon.

Intertempe alkuris kelkaj fotografistoj, sed la doktoro petis ilin ankoraŭ ne funkciigi sian aparaton, ĉar li volis, ke ankaŭ ni eliru.

La fotografistoj laŭte ridis pri niaj vestoj, sed trovis nin tre, tre interesaj, same kiel aliaj viroj, venintaj por tuj verki artikolon pri ni por la ĵurnaloj.

Poste mi komprenis, ke la doktoro volis uzi tiujn artikolojn por anonci la prelegojn, kiujn li intencis fari en la urba universitato. Niaj foliaj kostumoj kaŭzis grandan miron kaj baldaŭ ni vidis ĉirkaŭ ni aron de scivoluloj.

La doktoro poste venigis veturilon, kiun li nomis aŭtomobilo, por kiel eble plej rapide forlasi la flugterenon. Same faris la piloto kaj la fotografisto.

Mi eniris en la aŭtomobilon kun la doktoro; miaj fratoj ĉiu en alian kun la du inferianoj kaj baldaŭ en la tri aŭtoj ni rapidis en la direkto al la urbocentro.

Mi esperis, ke ni ĉiuj veturos al la sama domo, sed tio je mia bedaŭro ne okazis, ĉar post kelkaj minutoj la du aliaj aŭtoj eniris en flankstraton kaj ni ankoraŭ longan tempon veturis

rekte antaŭen por fine halti antaŭ unu el la altaj domoj, kiujn mi jam tiel admiris de malproksime.

Kiam mi demandis al mia gvidanto, ĉu mi ne revidos miajn fratojn, li diris, ke tio okazos post kelkaj tagoj dum la unua prelego, kiun li faros en la urba universitato.

Ĉi tie la ĉefo subite interrompis la parolanton, dirante:

— Frato Unu-kvar-du; kun plezuro mi aŭdis ĉi tiun parton de viaj aventuroj; sed mi petas vin: parolu iom pli klare kaj pli simple; en via parolmaniero mi vere ne rekonas mian antaŭan fraton. Vi uzas tiom da vortoj, kiujn mi ne komprenas, ke mi devas peti klarigon pri multaj el ili. Ekzemple kio estas unutona, cerbumi, piloto, fotografisto, aparato, artikolo en ĵurnalo, urba universitato, kaj aliaj? Tiuj vortoj estas fremdaj al nia lingvo kaj neniu el viaj fratoj ilin komprenas.

Frato Unu-kvar-du klarigis la vortojn, sed ne sen peno; poste li rakontis plu.

— La domo, en kiun la doktoro kaj mi eniris, estis tre alta kaj ĉiurilate tre granda, same kiel ĉiuj domoj en tiu kvartalo aŭ urba parto.

La edzino de la doktoro tre admiris mian mantelon kaj mian ĉapelon; ŝi opiniis, ke ili estas interesaj. Ŝi mem ĝin surmetis kaj diris, ke ĝi estas iom simila al ĉapeloj, kiujn antaŭ multegaj jaroj portis la ĉefaj sinjorinoj en alia mondparto, pri kiu mi nenion scias. Ŝi tamen faris la rimarkon, ke pro la tro larĝa rando oni per neniu okulo povas vidi kaj ke ŝi, kiam ŝi portas sian plej novan ĉapelon, povas vidi almenaŭ per unu okulo.

La doktoro nun klarigis al sia edzino, ke miaj fratoj, kiuj loĝas sur la insulo, oportune povas uzi siajn ĉapelojn kaj jam dum nememoreblaj jaroj.

La doktoredzino tamen interkonsentis kun la doktoro, ke mi portos inferiajn vestojn kaj inferian ĉapelon.

Li venigis tuj kelkajn vestojn; mi surmetis tiun, kiu perfekte estis konvena al mi kaj ĝustmezura, kaj miaj mantelo kaj ĉapelo

estis metataj en ŝrankon aŭ vestejon, kie ili ankoraŭ nun pendas por uzi kiel pruvon pri ĉio, kion la doktoro en speciala libro skribis pri nia insulo kaj ĝiaj loĝantoj.

La sekvintan tagon unu el la servistoj de la doktoro montris al mi la tutan domon. En ĝi estis pli ol dudek salonoj, ĉambroj kaj aliaj apartaĵoj: en unu el la plej malgrandaj oni devis dormi, en aliaj manĝi aŭ fumi. Mi poste klarigos tiun lastan vorton; en ankoraŭ aliaj oni sin banis aŭ lavis, kaj tiel plu. Tiuj apartaĵoj tamen ne estis ĉiuj en la sama nivelo de la tero, sed unuj super aliaj, kaj por veni en la pli altajn apartaĵojn, oni bezonis ŝtuparojn, sur kiuj oni iras supren, aŭ oni uzas aparaton, kiun oni nomas lifto. Tiu lifto estas speco de aparta ĉambreto, kiu laŭ la volo de la liftoknabo supreniras kaj malsupreniras. Tiu liftoknabo ĉiam estas bele vestita, sed tute ne estas granda sinjoro; li estas nur servisto, tio estas persono, kiu servas la doktoron, kaj kiu ricevas pagon por tio.

En la nokto mi dormis en speciala kaj bela dormejo kaj la sekvintan matenon mi manĝis kun la doktoro kaj lia edzino, kiu rigardis kaj traktis min kiel interesan gaston, kiu, kiel ŝi diris, eble famigos ŝian edzon.

En la komenco mi ne komprenis tion, sed nur poste ĉio iĝis al mi klara.

Du tagojn post mia alveno en la vespero okazis la prelego en la urba universitato.

Ĉeestis tiom da aŭskultantoj, kiom antaŭe preskaŭ neniam oni vidis tie.

La doktoro rakontis pri nia insulo, pri la loĝantoj, kutimoj kaj moroj, sed precipe pri nia necivilizeco kaj blindeco, kiu lasta tamen estis ŝajna.

La piloto kaj la fotografisto kun miaj du fratoj ankaŭ ĉeestis kaj ni estis en nia insula kostumo. Miaj du fratoj kaj mi estis montrataj al la rigardantoj, kiuj opiniis, ke ni estas tre strangaj.

La doktoro estis tre kontenta pri la sukceso de sia prelego,

kaj la sekvintan vesperon li montris al sia edzino tre longan artikolon en gazeto pri sia malkovro. Tiam al mi ŝajnis, ke ŝi estis ankoraŭ pli kontenta kaj pli feliĉa ol ŝia edzo kaj la tutan vesperon ili parolis pri la sekvo de la prelego.

Post kelkaj tagoj la doktoro montris al mi grandan parton de la urbo, kie mi vidis objektojn, pri kies ekzisto vi eĉ ne povas formi al vi ideon, kaj kiujn mi tute ne povas klarigi.

Mi ne memoras plu, kiom da tagoj mi restis en la domo de la doktoro, sed fine en tre stranga maniero min trafis granda malfeliĉo, pro kiu mi ne havis plu belan dormejon por dormi, nek manĝejon por manĝi. Mi troviĝis en tute nekonata parto de la granda urbo Saidumo kaj en tiaj strangaj cirkonstancoj, pri kiuj neniu el vi iam aŭdis kaj kiujn vi eĉ rigardos neeblaj.

La doktoro havis filon samaĝan kiel mi kaj krom tio similan al mi.

Li estis studento de la urba universitato. Vespere li plej ofte estis hejme kaj tiam pasigis longan tempon en sia studoĉambro.

Kelkajn tagojn post mia veno en la domon de la doktoro haltis aŭto antaŭ la domo; eliris viro kaj sonorigis. La servisto, kiu ordinare malfermas la pordon, estis tre okupita en la manĝoĉambro; tial li petis min, iri al la pordo por rigardi, kiu sonorigis. Ĝuste en tiu momento mi vidis la filon de la doktoro, kiu ĵus venis hejmen kaj iris al sia ĉambro.

Mi malfermis kaj flanke de la pordo ekstere en la mallumo mi vidis viron; li diris al mi, ke en la aŭto sidas fraŭlino, kiu deziras tuj paroli kun mi.

Tio ŝajnis al mi tre stranga, ĉar neniam mi konatiĝis kun fraŭlinoj de la urboj. Mi vidis kelkajn dum la parolado en la universitato, kiuj kelkfoje ridetis al mi, kio ŝajnis al mi iom stranga. Mi pensis, ke eble unu el tiuj volas paroli kun mi, kaj mi tuj iris al la aŭto, kies flankpordeto malfermiĝis. Vere mi vidis fraŭline vestitan personon. Sed antaŭ ol ŝi diris eĉ unu vorton, la viro, kiu sekvis min al la aŭto, puŝegis min internen,

ĵetfermis la pordeton, saltis en la antaŭan parton de la veturilo kaj veturis for kun tia rapideco, ke mi preskaŭ ne povis min levi. Mi volis demandi al la fraŭlino, kion ŝi havas por diri, sed anstataŭ respondi, ŝi tenis antaŭ mi revolveron, flustrante: Silentu!

Mi jam sciis, kio estas revolvero; la doktoro jam antaŭe montris tian pafilon, kaj klarigis, al kio ĝi servas.

Mi konjektis esti en danĝero kaj restis surgenue, ĝis la aŭto haltis. Tio okazis post longa tempo, ekster la urbo sur izolita vojeto, kiu kondukis al speco de farmejo. Tie la fraŭlino flustris, daŭre tenante antaŭ mi la revolveron:

— Iru el la aŭto kaj al la pordo de la domo antaŭ vi, poste eniru en tiun domon, mi sekvos ĝis la pordo, obeu kaj ne rigardu malantaŭ vin!

Mi obeis, eniris en la domon kaj samtempe la pordo fermiĝis kvazaŭ per si mem kaj el ĉambro ĉe la fino de la koridoro mi aŭdis voki:

— Ĉi tien kaj tuj!.... Ne klopodu eliri el la domo, ĉar la pordo de ekstere estas ŝlosita; obeu kaj al vi okazos nenio malbona, sed se vi ne obeos, ni estos devigataj tuj mortigi kaj malaperigi vin.

En tiu momento mi pensis al mia insulo, al la kvieteco kaj al la sendanĝereco tie, kaj mi bedaŭris, ke mi forlasis ĝin. Sed, ĉar ankoraŭ neniu faris al mi malbonon en ĉi tiu nova lando, mi baldaŭ rekvietiĝis kaj iris en la ĉambron. Tie mi vidis tri virojn, kies vizaĝoj estis duone kovritaj per tuko. El tiu tuko rigardis min ses minacantaj okuloj. Ili, tio estas la viroj, indikis al mi seĝon kaj mi sidiĝis.

— Aŭdu! — diris unu el la viroj, — Ni kondukigis vin ĉi tien por...., li ne finparolis, sed daŭrigis: — Kiu vi estas? Ĉu vi ne estas la filo de doktoro Hartman? La viroj de la aŭto ja vidis vin eniri en vian domon.

— Tiu ne estis mi, sed la filo de la doktoro. Li eniris post

kiam oni sonorigis. Mi estas Unu-kvar-du —, respondis mi.

Unu el la viroj laŭte ridis; alia sputis sur la plankon, dirante „diablo!!" kio estas tre malbela vorto, kaj mi nun ne povas klarigi ĝian signifon; la tria viro demandis:

— Do vi ne estas la filo? — Li rigardis la aliajn kaj poste daŭrigis:

— Via nomo ne interesas nin, se vi ne estas la filo!

La dua viro tiam diris: — Ni maltrafis! Ĉu Petro estas tia stultulo, ke li eĉ ne vidis, ke ĉi tiu bubo ne estas la filo de la doktoro?.... Kion fari nun?

Alia viro respondis:

— Tuj forkonduki lin kaj kiel eble plej proksime de la urbo ĵeti lin sur la vojon.... poste li faru, kion li volos. Feliĉe, ke estas tiel mallume, ke li ne rekonos ĉi tiun domon.

Post mallonga tempo mi ree sidis en la aŭto. Unu el la viroj denove minacis per sia revolvero kaj la aŭto rapidis antaŭen, mi tute ne sciis, en kiu direkto. Fine oni haltis, la viro kun la revolvero malfermis la pordeton, puŝis min eksteren, tirfermis la pordeton, kaj baldaŭ la veturilo estis for.

Jen mi staris sur longa, malluma vojo. Mi vidis ankoraŭ la lanternon de la forrapidanta aŭto, sed subite ĝi turniĝis flanken kaj malaperis. Ree mi pensis pri mia insulo kaj ree mi bedaŭris mian foriron kun sento de forta elreviĝo post grandaj esperoj. Mi demandis al mi: Ĉu mi estas en tiel nomata civilizita lando? Kio do estas civilizacio?.... Ĉu ĝi estas lando kun veturiloj, el kiuj oni ĵetas ensidantojn sur la vojon por ne atenti plu pri ili? Ĉu en civilizita lando loĝas homoj, kiuj diras: „diablo"? Ĉu tie loĝas viroj, kiuj kondutas tiel strange al fremduloj, ke neniu povas klarigi tion? Kie mi estas nun? — Farante tiun lastan demandon, mi rigardis ĉirkaŭen, sed nenie estis iu, kiu povus respondi. Malluma ĉirkaŭaĵo, kun kelkaj arboj kaj konturoj de konstruaĵoj. Tuj apud mi ĉe mia flanko estis speco de barilo. Mi iris al ĝi, palpis ĝin, kaj rimarkis, ke ĝi ne estis

alta. Ĉe la transa flanko de la barilo, paralele, estis vojeto, kiu sendube kondukis al iu domo, ĉar mi antaŭe jam vidis multe da tiaj vojetoj, kiuj ĉiuj kondukis al iu konstruaĵo. Mi paŝis trans la barilon, staris sur la vojeto kaj ekmarŝis. Ĉe ĝiaj flankoj kreskis herbo, tion mi povis senti per la mano. Mi iris dum kelka tempo, ĝis kiam la vojeto turniĝis flanken kaj malproksimiĝis de la granda vojo. Post kelkaj paŝoj mi subite vidis, ke malantaŭ nigra nubo sur la ĉielo aperas la luno. Mi pensis, ĉu ĝi povas esti la sama luno, kiun mi vidis super kaj en la maro apud mia insulo. Sendube ĝi estis la sama, ĉar mi aŭdis nur pri unu tiel granda stelo. Ĝi donis al la domo, super kiu ĝi aperis, misteran aspekton, sed lumigis la vojeton antaŭ ĝi. Mi vidis dekstre kaj maldekstre de la domo dometojn pli malaltajn, sed pli longajn kaj ĉe unu el ili staris alta ronda turo sen pinto. Mi miris, haltis momenton por pli bone distingi ĉiujn objektojn, kiam el speco de kesto apud la senpinta turo, subite saltis nigra besto. Ĝi saltis en mia direkto, sed io tintanta retenis ĝin. La besto faris laŭtan bruon. Min nun trafis la penso, ke eble ĝi estas hundo, ĉar hundojn mi jam vidis, kvankam ili tute ne faris tian bruon, sed kviete kondutis kaj tute ne saltis al venantoj. Mi haltis kaj atendis, esperante, ke la besto foriros, sed anstataŭ foriri, ĝi bruadis ankoraŭ pli laŭte, penante al mi salti, sed feliĉe la tintanta objekto, al kiu ĝi estis ligita, retenis ĝin. Mi ne sciis, kion fari, sed atendis. Post kelka tempo iu pordo de la plej alta konstruaĵo malfermiĝis kaj el ĝi venis viro kun lanterno. Lin sekvis du knaboj, kiuj portis specon de bastono, dum la viro kun la lanterno havis revolveron en la mano; tion mi klare distingis en la lumo de la lanterno.

La viro kriis ion al la hundo kaj ĝi retiriĝis en sian keston; poste turnante sin al mi, li vokis:

— Kiu tie?

— Mi estas Unu-kvar-du!

Li ripetis sian demandon kaj kiam mi diris, ke mi estas Unukvar-du, li demandis:

— Kion vi volas? — Mi respondis:

— Mi ne scias, kion mi volas; oni ĵetis min el la aŭto kaj nun mi ne scias, kie mi estas.

— El aŭto? — li demandis — El kiu aŭto?

— Ankaŭ tion mi ja ne scias!

La viro nun staris antaŭ mi, rigardis min kaj miajn manojn, eble por vidi, ĉu mi havas bastonon aŭ revolveron; poste li diris:

— Sed diru do, kion vi volas?

— Iri hejmen.

— Kie do estas via hejmo?

— Mi ne scias; ĝi estas ie en Saidumo.

— Ĉu vi eĉ ne scias, kie vi loĝas?

— Mi loĝas tie nur mallonge.

— Kie do vi loĝis antaŭe?

— Sur mia insulo.

— Kiu insulo?

— Ĝi ne havas nomon.

La viro ree rigardis min, samtempe unu el la knaboj tiris lin je la jako; la viro rigardis antaŭ sin kaj la knabo flustris al li ion en la orelon.

La viro denove rigardis min, kaj diris:

— Venu kun ni en la domon, tie ni povos pli oportune paroli.

Mi kaj la du knaboj sekvis la viron en la domon.

La ĉambro, en kiun li kondukis min, estis tute diferenca de tiu de la doktoro. Mi ne vidis tapiŝon sur la planko, nek belajn meblojn, sed nur tablon meze de la ĉambro kaj ĉirkaŭ ĝi antaŭ la muroj kelkajn seĝojn kaj ŝrankojn. Kiam ni ĉiuj sidis ĉe la tablo, la viro denove ekparolis al mi kaj demandis:

— Ĉu vi ne scias, de kiu insulo vi venis? Tio estas stranga.

— Mia insulo ne havas nomon; la doktoro diris, ke ĝi estis

ĝis nun nekonata, same kiel la enloĝantoj, kiuj ĉiuj estas blinduloj.

— Blinduloj? — ekkriis la viro, kaj subite unu el la knaboj iris al ŝranko, kaj elprenis gazeton.

—Ho, mi scias; mi legis pri tio en nia gazeto. Jen.... rigardu mem!!

Li malfaldis la gazeton kaj montris bildon, sur kiu staris aeroplano kaj multe da homoj, inter kiuj miaj du fratoj kaj mi en mia insula kostumo.

— Ĉu tiu estas vi? — demandis la viro, montrante la gazeton.

— Tiu estas mi en mia insula kostumo, kiu nun pendas en la vestoŝranko de la doktoro.

— Kiel nomiĝas tiu doktoro?

— La viro en la domo, kie haltis la aŭto, nomis lin doktoro Hartman.

— Diru do...., kiel vi venis ĉi tien en tiu aŭto, kaj kio al vi okazis? — demandis la viro.

Mi rakontis ĉion. La viro atente aŭskultis kaj kiam mi fine eksilentis, li ekkriis:

— Nun mi komprenas: oni forrabis vin!

— Forrabis?.... Kio estis tio?

— Vi eĉ ne scias tion?? — Nu, oni intencis preni la filon de tiu doktoro, sed vidante, ke ili maltrafis, ili postlasis vin sur la vojo.

Li nun pripensis momenton kaj poste diris:

— Estos plej bone, ke vi restu ĉi tie dum la nokto; morgaŭ mi per mia aŭto veturos kun vi al la doktoro, pri kies adreso mi telefone informiĝos.... Kia feliĉo, ke ili maltrafis!!!... Kiel ĝojos la doktoro!!... Imagu, ke ili ne maltrafus kaj ke lia filo nun estus en la povo de tiuj rabistoj!!

— Sed, kio do estas rabisto? — demandis mi.

La viro klarigis tion al mi, dirante, ke kelkaj krimuloj en Inferio ruze ŝtelas infanojn aŭ plenkreskulojn por akiri monon

de la parencoj, kiuj pagas multe por rehavi sian infanon. Mi....

Unu-kvar-du volis rakonti plu, sed la ĉefo interrompis, dirante:

— Nia frato Unu-kvar-du parolas pri strangaj aferoj, eĉ pri tiel strangaj, ke mi preskaŭ dubas pri la vero. Kial do la homoj agas tiel freneze en tiu insulego? Nia frato rakontas tiajn aferojn, kiujn komprenas neniu el ni. Ĉu la civilizeco konsistas en tio, ke homoj kaptas kaj malliberigas unu la alian por akiri monon? Ĉu tio estas necesa? Mi ne dezirus, ke niajn insulanojn ataku tiu danĝera malsano, precipe tiu de la homrabado.

— Al mi ŝajnas, ke tiu civilizeco estas tiel malbona, ke niaj infanoj devas ne aŭdi pli multe pri ĝi kaj pri samspecaj aferoj; mi tial proponas, ke ili foriru.

La infanoj tuj forlasis la kabanegon, kaj la ĉefo diris:

— Nia frato rakontu plu, ni aŭskultas.

— La nokton mi pasigis en tiu izolita farmodomo; mi dormis en akompano de la du filoj de la farmisto en vasta dormoĉambro, kaj en la sekvinta mateno la farmisto, kiu eksciis la adreson de la doktoro, rekondukis min aŭtomobile al Saidumo. Tagmeze ni haltis antaŭ lia domo. La doktoro jam atendis nian alvenon. Kiam ni iris en lian familian ĉambron, li montris leteron al la farmisto, dirante:

— Ili postulas de mi centmil dolarojn, kiel elaĉetsumon por mia filo. Feliĉe ili prenis nian gaston, kiu do estas la kaŭzo de ilia eraro. Mi tre ĝojas, kaj esperas, ke la friponoj ne malbone traktis nian fremdan amikon.

Li baldaŭ konvinkiĝis, ke sendifekte mi revenis. Per tiu aventuro mi spertis, ke estas specialaj krimuloj aŭ malbonfarantoj en mia nova lando, kaj baldaŭ spertis, ke ekzistas ankoraŭ alispecaj; aŭskultu:

Restinte dum kelkaj semajnoj ĉe mia gastiganto, mi decidis foriri de li por serĉi laboron, ĉar la nenionfarado tedis min. Pro ĝojo, ke oni ne forrabis lian filon, la doktoro donacis al mi mil

dolarojn. Kun tiu mono en la poŝo mi forlasis lian domon, kun la promeso reveni post kvar kaj duono da jaroj. Li tiam kun mi kaj miaj fratoj reiros al nia insulo. Mi jam iom konatiĝis kun la urbo Saidumo, kaj ĉar mi volis vidi aliajn urbojn kaj fari vojaĝon tra Inferio, mi decidis iri al Delimono kaj resti tie por kelkaj monatoj. Mi ne faris tiun vojaĝon vagonare aŭ aeroplane, sed per belega aŭtobuso, nomata „Leporhundo". La vojaĝo, kiu daŭris du tagojn kaj noktojn, montris al mi, kiel aspektas la lando; kaj ĝi estas belega, ĉar preskaŭ senescepte mi veturis tra belaj regionoj, tra montoj kaj valoj, sur larĝa belega ebena vojo, kiu kiel rubando sterniĝas tra la tuta Nord-Inferio. Flanke de tiu vojo kuŝas grandaj urboj kaj ĉarmaj vilaĝoj aŭ domaretoj, arbaroj, terkulturejoj. La aŭtobuso haltis post ĉiu tria aŭ kvara horo antaŭ hoteloj aŭ manĝodomoj, kaj mi tre amuzis min, sed la kunvojaĝantoj parolis malmulte kaj ŝajnis mutuloj. Tamen inter ili estis agrable, amike aspektanta juna viro, kun kiu mi jam konatiĝis ĉe la komenco de la vojaĝo. Li sidis ĉe mia flanko kaj aŭdante, ke oni multe skribis pri mi en la ĵurnaloj, li iĝis tre scivola pri ĉio, koncerne al mia insulo. Kiel eble plej bone mi rakontis al li ĉion kaj ankaŭ, kiel oni forrabis min, kredante, ke mi estas la filo de riĉa doktoro, por kies elaĉeto ili postulis centmil dolarojn, kiujn kompreneble ili neniam ricevis. Ankaŭ mi rakontis, ke la doktoro, kiel signon de sia ĝojo pro la maltrafo de la rabistoj, donacis al mi mil dolarojn, per kiuj mi nun faras mian vojaĝon. Li demandis:

— Vi do ne kunportas tiun tutan monsumon?

Mi respondis, ke vere mi tion faras; li diris, ke tio estas tre danĝera pro la atakoj kontraŭ promenantaj kaj veturantaj personoj. Mi demandis, kio tio estas, kaj li klarigis, ke ofte krimuloj haltigas personon aŭ veturilon kaj forprenas lian tutan monon, kaj ke ili mortpafas tiujn, kiuj rifuzas transdoni sian monon, kaj al....

Ĉi tie la ĉefo ree interrompis la parolanton kaj indigne diris:

— Iom post iom mi iĝas certa, ke en tiu civilizita lando vivas ne nur rabistoj sed multaj alispecaj malbonaj homoj.

Sendube tiuj krimuloj estas ankaŭ atakataj de infekta malsano; mi tre ĝojas, ke tiu malsano ankoraŭ neniam regis en nia insulo, kaj la misteraj potenculoj, kiuj ĝis nun protektis nin, ĉiam estonte protektu kaj ŝirmu nin kontraŭ ĝi; ĉar la malicaj misteraj potenculoj, la ventego kaj alispecaj veteroj jam tro multe nin ĝenas kaj turmentas.... Nia frato nun daŭrigu.

Ĉi tiu rakontis plu:

— Estas vere, ke vivas multaj malbonaj homoj tie en Inferio, sed la plej multaj el ili iĝis krimuloj pro senlaboreco kaj malriĉeco....

— Kio do estas tiuj novaj turmentiloj? — demandis la ĉefo.

Unu-kvar-du klarigis tion, sed la klarigo havis malbonan efikon ĉe la ĉefo, kaj ankoraŭ pli indigne ol antaŭe li diris:

— Mi estas certa, ke tiu civilizita lando spite al ĉiuj agrablaĵoj ne estas sopirinda lando por loĝi; mi pli volonte vivas ĉi tie ol tie, kie por multaj homoj eĉ ne ekzistas la ebleco labori, kaj por povi aĉeti manĝaĵon; .... nun daŭrigu!

Unu-kvar-du parolis plu:

— Eble nia ĉefo pravas, tamen escepte de la malbonaj kutimoj en Inferio, mi en la lasta tempo tre volonte loĝis tie kaj ne volus interŝanĝi ĝin kontraŭ ĉi tiu insulo....

La ĉefo subite diris:

— Per tio mia frato pruvas, ke ankaŭ lin atakis iu mistera infekta malsano.

Unu-kvar-du rigardante la ĉeestantajn milionulojn de Inferio, ridetis al ili kaj la milionuloj levis la ŝultrojn kaj donis signon al Unu-kvar-du, ke li daŭrigu, kaj ĉi tiu parolis plu:

— Nia ĉefo estas tre saĝa kaj eble ree pravas, sed mi devas kontraŭparoli lin iomete kaj diri, ke li estas saĝa nur pri aferoj rilatantaj lian insulon; pri Inferio kaj ties civilizacio li komprenas kaj povos kompreni nenion; por povi tion, estas necese, ke oni

vivu dum kelkaj jaroj en tiu civilizita lando. Sed mi parolis pri kunvojaĝanto, kiu avertis min kontraŭ atakantoj. Li montris al mi ĉeklibreton — mi poste klarigos, kio ĝi estas — dirante, ke per tia libreto oni povas aĉeti kaj pagi ĉion sen mono; antaŭe oni deponas sian monon en banko, kiu interŝanĝe donas tian libreton, kiu havas valoron nur por la posedanto, tiel ke la krimulo tute ne deziras havi ĝin. Mia kunvojaĝanto nun proponis al mi, ke li deponu mian monon kontraŭ tia ĉeklibreto en Delimono tuj post nia alveno en tiun urbon. Jam timante la krimulojn, mi decidis akcepti lian proponon. Post nia alveno en Delimono ni iris duope per alia veturilo, nome strata tramo, al la granda banko. Mi atendis en vasta vestiblo aŭ antaŭsalono, kaj sidiĝis tie sur benko por atendi la revenon de mia kunvojaĝanto. Sed, ho ve! Mi atendis, atendis, suspektante nenion malbonan, sed post kelkaj horoj venis al mi sinjoro kaj diris, ke mi eliru el la Banko, kiu estos fermata je la kvina horo.

Mi diris, ke mi atendas mian kunvojaĝanton, kiu antaŭ kelkaj horoj eniris por ŝanĝi mian monon kontraŭ ĉeklibreto.

La sinjoro rigardis min dum momento kaj diris:

— Mi konsilas al vi iri al la polico, ĉar mi timas, ke via kunvojaĝanto foriris kun via mono kaj ke li neniam revenos.

Mi sciis, kiel aspektas policano; mi iris el la banko kaj ĉirkaŭrigardis, ĉu iu policano estas sur la strato. Feliĉe mi vidis unu, kiu per la mano montris dekstren kaj maldekstren por reguligi la trafikon, tio estas la preterirado de veturiloj kaj homoj, por eviti akcidentojn. Sed li ne havis tempon aŭskulti min ĝis la fino, kaj diris, indikante en la proksimo policejon:

— Iru tien!

Mi iris tien kaj detale rakontis al unu el la ĉefoj de la policanoj, kiel mi perdis mian monon.

Li notis ion en notlibreton kaj forsendis min dirante, ke mi revenu post du horoj. Du horoj estas longa tempo por atendi antaŭ policejo; tial mi promenis al parko, kiu etendiĝis je kelka

distanco, kaj sidiĝis sur benko sub granda arbo. Mi rigardis ĉirkaŭ min kaj entuziasmiĝis pro la beleco de la ĉirkaŭaĵo.

Ĉie serpentis glataj vojetoj en la parko, ĉie la birdetoj kantadis, ĉie regis lukso kaj kontenteco kaj eĉ feliĉego. Ne estis mirige, ke la tuto tiel impresis min, ke dum momento mi tute forgesis pri mia mono, kiu tiel mistere malaperis el la banko. Mi rigardis dekstren, maldekstren; la parko baniĝanta en la suno ŝajnis esti tera paradizo.

Subite mi vidis viron, tre malbone vestitan, kun sako sur la ŝultro kaj pluvombrelo sub la brako. Malrapide li proksimiĝis al mia benko kaj min trafis la granda kontrasto, kiun tiu proksimiĝanta viro faris kontraŭ tiu paradizo, kun kiu ĵus mi komparis la parkon.

Iom post iom, dum la birdetoj super mia kapo daŭrigis sian kantadon, la viro venis al la benko, kie mi sidis, kaj atinginte ĝin li sidiĝis, apenaŭ min rimarkante.

Kun miro mi rigardis la viron kaj precipe lian pluvombrelon, ĉar la vetero estis belega kaj pluvombrelo estis tute superflua objekto en tiu sunplena tago.

Mi respondis la malfortan kapklinon de la viro per la vortoj:

— Bonan tagon, ... sinjoro!

— Bonan tagon! — nun diris la viro, kaj li profunde ĝemis, dum li formetis de sia dorso la sakon kaj metis ĝin sub la benkon, sur kiu ni kune sidis.

— Ĉu vi laciĝis? — demandis mi, aŭdante la profundan spiron de la viro.

— Ne, sinjoro, kial mi laciĝus?

— Povus esti.

— Ho, ne, sinjoro, senlaborulo ja ne laciĝas pro la nenionfarado, ... ne povas laciĝi.

— Ho, vi estas senlaborulo? .... Ĉu estas senlaboruloj en ĉi tiu granda urbo?

— Kie ili nun ne estas?

— Pri tio mi ankoraŭ neniam pensis. — Ĉu vi jam longe estas senlaborulo?

— Jam dum ses jaroj.

— Kiel vi do povas vivi, se vi ne laboras?

— Per mia muzikilo.

— Kie estas tiu muzikilo?

— En mia sako, tie sub la benko.

Mi iĝis scivola: la afero interesis min kaj mi demandis plu:

— Kian muzikilon vi havas en tiu sako?

— Saksofonon.

— Kiam do vi ludas sur tiu saksofono?

— Ĉiuvespere; kaj mia kamarado ludas sur violono, kiam ne pluvas.

— Via kamarado?

— Jes...., li nun ne estas ĉi tie.... li sidas sur alia benko, eble en alia parko; ankaŭ li estas senlaborulo.

— Kie vi ĉiuvespere ludas?

— En la stratoj de Saidumo, sur la trotuaroj.

— Ĉu estas permesate fari tion?

— Nur al blinduloj tio estas permesata.

— Vi tamen ja ne estas blindulo!

— Feliĉe mi ne estas blindulo, sed en la vesperoj mi ŝajnigas esti blinda, same kiel mia kamarado. Tiam ni iras paŝon post paŝo kaj tre malrapide unu malantaŭ la alia sur la trotuaroj de Saidumo kaj ludas.... kaj ni havas paperaĵon sur la dorso kun la surskribo: „Blindulo".

— Strange!

— Tute ne, sinjoro; nur la blindulojn oni iom kompatas en Saidumo; nur al ili oni donas kelkan monon.

— Kie vi loĝas en Saidumo?

— Ĉie kaj nenie.

— Tion mi ne komprenas.

— Tamen tio estas tre klara, sinjoro.

— Ĉu vi ne havas domon por loĝi kaj dormi?

— Mi kunportas kun mi mian domon.... reale ĝi estas nur ĝia tegmento, kiun mi uzas en pluva vetero.

Dirante tion, la viro iom ridetante montris sian pluvombrelon. Mirigite mi demandis plu:

— Ĉu vi ne havas alian domon? Kie do vi dormas en la nokto?

— Sur ĉi tiu benko, se ne pluvas, kaj se policanoj ne forpelas min; alie sur izolita loko en la parko kaj sub mia tegmento.

— Ĉu en Saidumo ne estas domoj por personoj, kia vi estas, por pasigi la nokton?

— Jes, unu tia domo estas ĉi tie, sed ĝi ne havas sufiĉe multajn litojn: el dek senhejmuloj nur unu povas akiri liton, tial mi ne iras plu tien.... Sed ne nur tial, sed ankaŭ, ĉar mi devas iri tre longan distancon por veni al tiu domo.

Mi pli kaj pli miris, ĉar pri tia stato en tia bela urbo mi neniam pensis. Tial post kelka tempo mi daŭrigis:

— Saidumo estas bela urbo, ĉu ne?

— Mi ne scias.

— Ĉu vi ne scias?

— Ne, sinjoro.

— Vi tamen povas vidi, ke ĉio, kio ĉirkaŭas nin ĉi tie estas mirinde bela.

— Senlaborulo kun malplena monujo kaj sama stomako ne atentas belecon; li pli multe ŝatas manĝaĵon en kaduka kabano, ol malsaton en bela parko de bela urbo. Dirinte tion li ĝemis denove; poste li demandis:

— Ĉu iam vi estis senlaborulo, sinjoro?

— Mi!?

— Jes, vi.

— Ho ne; sur mia insulo mi ĉiam laboris, tie ĉiu laboras, kaj neniu malsatas, tie ĉiu posedas propran domon....

— Feliĉa insulo! — interrompis min la viro, kaj atente min rigardante li daŭrigis iom moke:

— Kie kuŝas tiu paradizo?

— Ĉe la transa flanko de la oceano.

— Kial vi ne restis tie?

— Mi volis rigardi ĉi tiun belan kaj civilizitan mondparton kaj poste.... studadi.

— Tio kostas multan monon....

— Mi havis multan monon, sed nun ĝi estas en la banko.... almenaŭ tion mi kredas.

— Kredas?

— Jes, — diris mi, kaj detale mi rakontis, kio okazis al mi kaj al mia mono.

La viro laŭte ridis kaj diris:

— Ĉu en via insulo ĉiuj homoj estas same plenfidaj kaj plenkonfidaj, kiel vi mem? Vi baldaŭ sciiĝos, ke oni ŝtelis vian monon; eble tiam vi povos, same kiel mi, kun malplena stomako pasigi la noktojn sur benko en ĉi tiu bela parko....

Mi ektimis, pensis pri mia eble perdita mono, subite ekstaris kaj iris for.

— Sinjoro! — kriis post mi la viro, — mi volas doni al vi bonan konsilon: Se restos al vi kelka mono, tiam aĉetu saksofonon kaj pluvombrelon kaj serĉu kamaradon....

Mi aŭdis nenion plu kaj rapidis al la policejo, kie baldaŭ mi staris antaŭ la sama ĉefo. Li diris:

— Ni faris nian eblon por aresti la ŝtelinton de via mono, sed vane! Estonte ne estu tiel fidema kaj ne konfidu plu monon al nekonata persono.

— Sed — respondis mi, — li estis tiel amika kaj servema, ke neniu rigardus lin malbona viro.

La ĉefo nun demandis al mi, ĉu mi jam longe loĝis en Delimono kaj post kiam mi ĉion rakontis pri mia insulo, pri mia

restado en Saidumo kaj tiel plu, li levis la ŝultrojn, konsilante al mi:

— Serĉu laboron! — kaj li donis al mi papereton, sur kiu li skribis kelkajn vortojn, dirante:

— Iru al la restoracio ĉi-apude kaj montru ĉi tiun rekomendaĵon, mi pensas, ke tie vi trovos okupon....

Ĝis nun mi nur malmulte pensis pri okupo, ĉar mi havis monon kaj tial ne estis necese....

La insula ĉefo denove interrompis jene:

— Do, ne nur rabistoj, atakantoj, sed ankaŭ alispecaj malbonuloj loĝas en tiu lando, kaj ankaŭ tia tria infekta malsano, la ŝtelado regas tie!.... Vere, Inferio estas tutalia ol nia insulo, ĉar tie ĉi krimuloj kaj ŝtelistoj ĝis nun estis nekonataj. Mi estas scivola, ĉu en civilizitaj landoj vivas ankoraŭ alispecaj krimuloj kaj mi tre timas, ke vere ili ekzistas.

Unu-kvar-du respondis:

— Nia ĉefo estas saĝa viro kaj li pravas rilate al tiuj aliaj krimuloj; pri ili mi rakontos ankoraŭ; sed antaŭe mi devas diri, kiel mi laboris, ĉar en tiu restoracio aŭ manĝodomo oni donis al mi laboron.

La estro aŭ ĉefo donis al mi grandan pladon, dirante:

— Portu al la kuirejo la malplenajn kaj malpurajn telerojn kaj tasojn, kiuj staras sur la tabletoj, kaj helpu lavi ilin tie en la kuirejo.

Ĉie en la restoracio staris tabletoj por la gastoj, kiuj venis regule por manĝi. Krom mi mem estis en la restoracio alia telerpurigisto kaj ni kune laboris ĝis la oka en la vespero. La alia helpanto post la laboro regule iris hejmen al sia edzino, sed mi ne havis edzinon nek hejmon. Mia kunulo tial indikis al mi altan domon, kiun li nomis hotelo. En tiu hotelo estis haveblaj ĉambretoj kun lito. Tiel laborante kaj dormante mi pasigis tre multajn tagojn; mia labormono aŭ salajro estis du dolaroj ĉiutage kaj devante ĉiusemajne pagi kvin dolarojn al la

hotelisto, restis al mi en ĉiu semajno naŭ dolaroj por aĉeti vestojn, ŝuojn, kaj aliajn bezonaĵojn, kaj mi tute ne pensis plu pri mia perdita mono.

En mia hotelo estis krom la dormejoj unu granda ĉambro, kie la ĉambroluantoj povis sidi post sia laboro. Tie mi konatiĝis kun multaj homoj. En iu vespero venis en la konversacian ĉambron unu el la luantoj en mirinda stato. Li ŝanceliĝis, parolis, strange agis kaj igis tintadi arĝentajn dolarojn, kiujn li havis en sia pantalona poŝo. Ridetante la aliaj vizitantoj lin rigardis kaj parolis kun li, kaj kiam fine li foriris al sia dormejo, ĉiuj laŭte ridis pri li. Kiam mi demandis, kial tiu viro agis tiel strange, oni respondis: „premio!", post kio ĉiuj ridis ankoraŭ pli laŭte. Mi ne komprenis tiun por mi novan vorton kaj miris, ke en la sekvintaj tagoj mi ofte aŭdis ĝin. Jam en la posta tago, kiam mi iris al mia restoracio, min preteriris virino kaj viro, laŭŝajne geedzoj, kaj ambaŭ kun peno povis iri: ili ŝanĉeliĝis, same kiel mia samhotela loĝanto. Mirigite mi postrigardis la ŝanceliĝantajn geedzojn, kiuj iris brakon sub brako kaj laŭte disputadis, dum per la aliaj brakoj ili faris larĝajn gestojn. Multaj promenantoj postrigardis ilin kaj unu el ili vokis: „premio!" La saman vesperon mi vidis alian ŝanceliĝanton kaj kiam al preterpasanto mi demandis, kial tiu viro tiel strange iras, la respondo estis: „premio!"

Irante plu mi vidis viron, kiu kuŝis sur la trotuaro. Li profunde dormis kaj laŭte ronkis, dum lia ĉapelo kuŝis je kelka distanco. Mi haltis por rigardi la kuŝantan viron. Preteriranta strata bubo laŭte ridante kriis: „premio!" Ĉiam pli kaj pli mi scivoliĝis, kion do signifas tio, kaj en la sama vespero oni klarigis ĝin al mi en mia hotelo. „Premio" signifas specialan mondonacon al estinta soldato aŭ militisto, kiu batalis en la milito....

— Kio estas soldato kaj milito? — interrompis la ĉefo.

— Soldato estas pagata militisto, viro, kiu batalas por sia patrujo kontraŭ militistoj de malamika lando. Batali estas tre

danĝere, ĉar ĝi estas speco de giganta boksado, ne per la pugnoj, sed per armiloj, nome per glavoj, lancoj, pafiloj, kanonoj, venena gaso kaj eĉ per flugmaŝinoj, el kiuj oni lasas fali bombojn sur la malamikojn. Mi jam klarigis, kio estas revolvero; nu, pafilo estas longa revolvero kaj kanono estas revolverego. Per unu pafo el tia kanono oni povas mortigi en unu sekundo dekojn da soldatoj.

La ĉefo konsternite diris:

— Mi nun kredas, ke nia frato Unu-kvar-du volas nin moki; estas ja neeble, ke iu ajn lando pagas al viroj, por ke tiuj mortigu la virojn de alia lando!! Se viro malbone traktas alian viron, tiam li estas jam krimulo. Mortigisto estas ankoraŭ pli granda krimulo kaj mi ne povas kredi, eĉ ne imagi, ke iu lando pagas siajn enloĝantojn por fari el ili mortigistojn. Mia frato sendube sonĝis malican sonĝon pri tiuj militoj kaj samspecaj aferoj, kiujn nur malbonaj, misteraj fortoj povas imagi kaj eltrovi. Iam mi estis malsana kaj en tiu stato mia imago spertis terurajn aferojn, tiel terurajn, ke mi eĉ ne kuraĝas rakonti ilin, timante, ke vi ĉiuj rigardus min mokulo. Mi tial petas vin, ne moku nin plu; nun daŭrigu, ni aŭskultas.

La vidkapablaj ĉeestantoj, iom maltrankviligitaj, rigardis unuj la aliajn kaj multaj el la insulanoj, kiuj kredis, ke ilia vidanta kaj civilizita frato nur sonĝis pri neeblaĵoj, scivoliĝis pri liaj pluaj aventuroj kaj atendis la daŭrigon.

Unu-kvar-du tamen anstataŭ fari tion diris:

— Ni ĉiuj scias, ke nia ĉefo estas tre saĝa viro, kiu ĉiam pravas, sed eĉ la plej saĝa viro povas erari, speciale pri aferoj, pri kiuj li ne estas kompetenta; mi petas lian pardonon, sed la ĉeestantaj inferianoj povas atesti, ke....

Kviete la ĉefo interrompis lin, dirante:

— Pri sonĝoj neniu povas atesti, tial rakontu plu, sed unue diru: Kiun rilaton tiu stranga premio havas kun tiu same stranga ŝanceliĝado, pri kiu vi parolis?

Unu-kvar-du ne insistis plu pri sia atesto, sed daŭrigis jene:

— La ricevintoj de tiu premio estis ĉiuj iamaj soldatoj kaj iom sovaĝiĝintaj pro la milito; ili ne vivas tiel kviete, kiel multaj aliaj homoj, sed elspezas sian premion, aĉetante brandon, specon de trinkaĵo, kiu igis ilin ŝanceli kaj plenumi ĉiajn strangaĵojn. Kelkaj, post la trinko de tiu brando, iĝas ĝojaj kaj gajaj, sed aliaj kontraŭe estas atakataj de kolero. Mi vidis premi-ricevinton, kiu trinkis kun sia edzino tro multan brandon, kaj tiel ĝojis kaj petolis kaj ŝanceliĝadis sur la strato, ke la postrigardantoj unuj al aliaj kriis: „premio". Tamen mi kontraŭe aŭdis pri du geedzoj, kiuj disputis pri la ricevita premio, ĉar la edzino postulis por si la duonan parton, dum la edzo volis havi por si la tutan premion. Li eliris kun ĝi, revenis hejmen ŝanceliĝante, falis sur sian liton kaj endormiĝis. Lia edzino poste kaptis lian revolveron kaj per ĝi mortpafis lin. Poste ŝi bedaŭris sian krimon, anoncis sin mem ĉe la polico, kaj estis kondukata en la malliberejon; tio estis des pli malfeliĉa kaj tragedia, ĉar hejme estis ses infanoj, kiuj ne sciis kiel akiri manĝaĵon kaj....

— Ĉu tion vi aŭdis image aŭ vere? — demandis la ĉefo.

— Mi vere aŭdis tion; ne sonĝis.

— Kial do la civilizitaj ĉefoj de Inferio ne malpermesis la vendadon kaj la faradon de tiu brando?

— Antaŭe ili tion malpermesis, sed tiam la premi-ricevintoj, kaj eĉ aliaj viroj trinkis ankoraŭ multe pli multe.

— Nekompreneble, mia frato!

— La kaŭzo estas, ke alispecaj krimuloj sekrete kaj krime faris tiun brandon, kaj vendis al specialaj domoj, kie oni kaŝe vendis ĝin.....

— Haltu, frato!.... Nun vi vere mokas, aŭ ŝercas!

— Vere ĉio tio okazis, mi mem spertis tion; do mi ne mensogis.

— Kio estas tiu nova vorto?

— Mensogi estas intence diri ion, kio en vero tute ne okazis.

La ĉefo komprenu, ke en aliaj landoj la homoj pro specialaj motivoj ofte mensogas.

— Ho-ho-ho!.... Ĉu tio estas necesa en civilizita lando? Imagu, ke ankaŭ ĉi tie oni estus atakata de tiu stranga malsano.... Feliĉe, sur nia insulo oni ne bezonas mensogi, oni eĉ ne konas tiun vorton. Daŭrigu!

— Tiu premio igis min deflankiĝi de mia rakonto, mia ĉefo; mi petas pardonon, sed ankaŭ la aliaj multaj interrompoj deflankigis min....

— Vi pravas; mi ne interrompos plu.

— Unu-kvar-du daŭrigis:

— Mi do laboris en tiu restoracio kaj ricevis regule mian salajron; parte mi elspezis ĝin, parte konservis. Mi laboris tie dum multaj semajnoj, kaj fine, same kiel la aliaj laboristoj, ĝuis mian libertempon, nome dum dek-kvar tagoj mi amuzis min, ne laborante. Mi faris ekskursojn aŭ vojaĝetojn tra la urbo.

Mi uzis la tramojn, ĉar la distanco estis tro longa por iri piede. Bone mi memoras ankoraŭ la unuan tramvojaĝon. Unue mi per aŭtomobilo iris al la nordo de la urbo, kie staras kelkaj kinoteatroj, kaj unu el ili mi vizitis. De tie mi iris al la bela larĝa vojo, nomata la ĉefvojo. Post duona horo tamen mi iris el la tramo por rigardi la Zoologian Ĝardenon. Efektive ĝi ne estas ĝardeno, sed vasta tereno kun belaj konstruaĵoj, kie oni povas vidi kaĝojn kun ĉiaj sovaĝaj bestoj. Pri tiuj bestoj alportitaj el aliaj landoj, kie ili vivas libere en arbaroj, vi ne povas formi al vi ĝustan ideon. Mi povus detale priskribi ilin, sed vi, kiel blinduloj, ne komprenus la priskribon; tial mi volas nomi nur la plej grandan specialecon de kelkaj el ili; tiuj estas tiel danĝeraj, ke ili mortigus kaj manĝus ĉiun homon, kiu enirus en ilian kaĝon. En kelkaj el la konstruaĵoj de tiu Zoologia Ĝardeno oni povas vidi ĉiajn birdojn kaj fiŝojn. Ĉiutage multaj homoj iras en la Zoologian Ĝardenon por rigardi.

Flanke de la ĉefaleo etendiĝas grandega lago aŭ enlanda

maro, kie ĉiam estas videblaj vaporŝipoj kaj remboatoj. En la varmaj tagoj centoj da viroj, virinoj kaj infanoj naĝas kaj sin banas en la lago. Ĉe la alia vojflanko staras altaj domoj, kaj ĉi tie kaj tie statuoj de eminentaj viroj, kiuj estas famaj en la historio aŭ alimaniere. Strange, ke neniam tie mi vidis statuon de virino, sed tiun strangaĵon mi ne povas klarigi. Veturinte plu oni venas al muzeoj kun belegaj pentraĵoj, sed pri ili mi ne parolos, ĉar por blindulo pentraĵo estas io tute nekomprenebla. Proksime al la pentraĵa muzeo staras la fama Centra Hotelo. Ĉiu persono povas senĝene iri en ĝin, eĉ tiuj, kiuj tie ne havas aferojn aŭ ne volas lui por si ĉambron. La tutan tagon kaj la tutan nokton oni povas sidi en ĝiaj longaj, bele ornamitaj koridoroj sur belaj, molaj benkoj kaj neniu al vi demandos, kial vi estas tie. Mi pasigis tie kelkajn horojn, kaj rigardis la venantojn kaj forirantojn, kiuj senhalte svarmas en la koridoroj kaj aliaj lokoj de la hotelo, kaj mi ne povis kompreni, kion ĉiuj tiuj vizitantoj faras tie.

La tuta hotelo estis por mi granda mistero, same kiel multaj aliaj aferoj en tiu grandega urbo. Mia libertempo tamen ne tre plaĉis al mi, kaj jam post la dua tago mi enuis; tial mi reiris al mia restoracio por labori; sed mia loko, mia ofico intertempe estis donata al alia persono, pro kio mi devis serĉi laboron aliloke. Sed kie? .... Mi konis neniun, tial mi reiris al la sama policejo, kien jam antaŭe mi iris por plendi pri la maniero, en kiu oni ŝtelis mian monon. Ĉi tiun fojon tamen la ĉefo de la policejo ne donis al mi skriban rekomendaĵon, sed nur la konsilon serĉi mem.

Tial mi serĉis, sed ne trovis.

Feliĉe mi ŝparis tiom da dolaroj, ke mi en la unuaj semajnoj senzorge povis dormi en mia hotelo kaj aĉeti manĝaĵon en butikoj aŭ kelkfoje en restoracio. Por pasigi la tempon mi ofte iris per tramoj, kelkfoje vizitis kinoteatron aŭ sidis en la hotelo ....

Iun tagon ree sidante tie, mi vidis, ke du viroj, aspektantaj kiel sinjoroj, atente min rigardis; fine ili venis al mi, sidiĝis sur la benko, kie mi sidis, kaj komencis paroli kun mi.

Ili baldaŭ rimarkis, ke mi ne estas inferiano. Mi diris, ke mi ne havas laboron, sed serĉis ĝin.

Ili demandis, ĉu mi scias paroli france. Ne sciante, kio estas tio, mi respondis, ke volonte mi klopodos fari tion. Ili ridis kaj unu el la du diris al la alia: „Un vrai niais".... kaj ankoraŭ ion alian, kion mi ne memoras plu. Tiam la alia viro diris, ke li havas por mi laboron, se mi volus labori por li. „Ho, volonte — respondis mi, — se mi nur povus plenumi tiun laboron".

Li diris:

— Vi bezonas nur fajfi.

Tion mi tute ne komprenis, kaj li klarigis:

— Ni estas du kontrolistoj, tio estas: oficistoj, kiuj devas kontroli, ĉu policanoj dece deĵoras, aŭ dece plenumas sian oficon. Vi devas stari kvaronhoron aŭ duonhoron sur loko, kiun mi indikos al vi en diversaj stratoj de la urbo, kaj ĉiufoje, kiam venas policano, vi fajfu kaj samtempe foriru, poste vi ĉiam venu ĉi tien en la hotelon kaj atendu nian revenon, por, se necese, ricevi novan komision. Ĉi tio estas tre simpla kaj facila; via taga salajro estos du dolaroj, kiuj sufiĉas por junulo, kia vi, por vivi en Delimono. Tiamaniere vi servos al ni ĉiutage dek horojn, dum la aliaj vi estos tute libera, kaj povos fari, kion vi mem deziras.

La propono ŝajnis al mi bonega kaj mi akceptis. Ili pagis al mi antaŭe kvar dolarojn por du tagoj kaj triope ni iris el la hotelo. Baldaŭ poste ni sidis en aŭtomobilo kaj veturis tra multaj stratoj, ĝis la veturilo haltis. Mi devis salti el la aŭto kaj unu el la du sinjoroj indikis al mi lokon, post kio ili forveturis. Fajfilo, kiun ili antaŭe donis al mi, estis en mia poŝo; do mi bezonis nur preni ĝin kaj fajfi, kiam proksimiĝas policano.

Mi rigardis la indikitan lokon, de kie la du viroj atendis policanon, sed neniu policano venis.

Tiel mi staris tutan horon kaj tiam revenis la aŭto.

La samaj viroj sidis en ĝi kaj malferminte la aŭtan pordeton, ili vokis min internen kaj veturis plu. Veninte antaŭ la Centran Hotelon, ili elirigis min, kaj diris, ke mi atendu en la hotelo ilian revenon. Kiam mi forlasis la veturilon kaj tre okaze rigardis la direktilon, mi vidis, ke sub ĝi kuŝas sako, kiu tie ne estis, kiam ni forveturis de la hotelo, sed ne pensante plu pri tio, mi eniris en la hotelon.

La du viroj ĉiam estis al mi tre ĝentilaj kaj eĉ amikaj; regule ili pagis mian salajron kaj ĉiutage ili eliris kun mi, ĉiam indikante lokon plej ofte apud stratangulo, kie mi devis atendi kun mia fajfilo, ĉu venos policano.

Estis strange, ke en pli ol monato tute ne venis policano; nur post tiu tempo en unu vespero, kiam la hele ronda luno staris sur la ĉielo, mi, ree starante apud stratangulo, subite vidis, ke policano proksimiĝas. Tuj mi rekonis lin pro la mallonga bastono, kiun li portis ĉe sia flanko, kaj, feliĉa, ke fine mi povis uzi mian fajfilon, mi laŭte fajfis kaj samtempe forlasis mian lokon. Antaŭ mi, mi aŭdis la malproksimiĝantan aŭtomobilon kaj malantaŭ mi la paŝojn de iu, kiu kriis:

— Haltu! . . . . haltu!!

Pensante, ke li vokis al mi, mi rigardis malantaŭen kaj jen, la policano kun sia bastono jam atingis min. Li kaptis mian brakon per unu mano, pripalpis min per la alia mano kaj fine trovis mian fajfilon.

— Ĉu vi fajfis? — demandis li.

Mi ne volis mensogi, ĉar ankoraŭ neniam mi mensogis. Vi scias, ke la insulanoj ne faras tion kaj eĉ ne pensas pri tio. Tial mi diris, ke mi estas la fajfinto, post kio li demandis, kie estas miaj kamaradoj.

— La inspektoroj? — demandis mi, kaj li ripetis:

— Inspektoroj!?

— Jes, — daŭrigis mi; — mi estas en ilia servo, kaj ĉiam....

— Nu jes, nature; vi estas; tial venu kun mi al la policejo.

— Ĉu vi havas por mi tie alian laboron?

— Vi spertos; nur venu kun mi!

— Sed, mi devas reiri al la Centra Hotelo....

— Vi havos alian hotelon ĉi-nokte.

— Alian hotelon?

— Ne moku min, sed tuj diru, kien iris viaj kamaradoj, kaj kiuj ili estas.

— Ili ĉiam venas al mi en la Centra Hotelo.

— Ho, nature, por priparoli kun vi la dumnoktajn aferojn, ĉu ne?

— Mi ne komprenas vin.

— Nature, vi ne komprenas min, sed komprenu, ke mi ne estas tia naivulo, por kiu vi min rigardas; sed nun silentu; la policestro faros al vi aliajn demandojn, kaj mi konsilas al vi, respondu ilin laŭ la vero.

Duope ni iris plu, ĝis ni atingis policejon, sed tute alian ol tiu apud mia unua restoracio.

La policestro faris ĉiajn demandojn pri miaj kunuloj kaj pri la ŝtelrompoj, kiujn triope ni jam plenumis en la lastaj noktoj; sed ĉar mi ne povis kontentigi lin per miaj respondoj, la policano min forkondukis kaj irinte tra du koridoroj, li malŝlosis specon de bestokaĝo, kian mi antaŭe vidis en la Zoologia Ĝardeno, kaj puŝis min internen, ŝlosis la pordon, kiu kiel la tuta kaĝo, konsistis el feraj dikaj stangoj, kaj foriris.

Mi rigardis ĉirkaŭ min kaj sur la tero vidis tri benkojn: du flanke de mi kaj unu antaŭ mi. Sur la benkoj kuŝis aŭ sidis kvin viroj. La unua, kiu kuŝis, laŭte ronkis kaj la dua, sidanta apud li, diris: „premio!" kaj li montris al la dormanto. La tria viro diris nenion, la kvara kaj la kvina kantetis kune kaj moke rigardis min, dirante:

— Sidiĝu, amiko kaj kantu kun ni, ĉar estas pli bone ĝoji kaj kanti ol malĝoji.

Mi sidiĝis kaj komence diris nenion; mi tute ne komprenis, kial oni ensĥlosis min en ĉi tiun kaĝon.

Post kelka tempo la kantantoj komencis paroli kun mi kaj demandis, kial mi estas ĉi tie.

— Eble pro atako? — demandis unu.

— Aŭ pro ŝtelrompo? — demandis lia kamarado.

Mi komprenis, ke ŝtelrompo estas ia krimo, ĉar pri tio parolis ankaŭ la policejestro, kaj subite iĝis al mi klare, ke miaj du kunuloj ne estas inspektoroj, sed krimuloj, kiuj uzis min kiel avertanton ĉe siaj dumnoktaj ŝtelrompoj.

Dum la tuta nokto mi sidis sur la benko, aŭskultante la ronkadon de la dormanto, la kantetojn de la du aliaj kaj ties babiladon. Tre interesa por mi estis tio, kion la babilantoj diris, kaj mi lernis en tiu nokto pri la maniero, en kiu la ŝtelistoj faras sian dumnoktan laboron; kiel oni priŝtelas promenantojn dumtage kaj pri multaj aliaj samspecaj krimoj, kiujn miaj fratoj ne komprenas, kaj pri kiuj nun estas pli bone ne rakonti.

Je la mateno mi iĝis dormema, kuŝiĝis sur mia benko kaj endormiĝis, ĝis mi estis vekata de fortaj puŝoj sur mia brako. Mi sidiĝis kaj vidis policanon, kiu ĉenligis min al unu el miaj samsortuloj; poste li ordonis, ke ni sekvu lin. Tion ni faris. Ekster la policejo staris al mi fremda veturilo sen fenestroj, sed kun nur unu kradpordeto en la malantaŭa flanko. Ni estis puŝataj tra la pordeta krado kaj ree sidiĝis unu flanke de la alia.

Post longa veturado ni devis iri el la veturilo, kaj akompanate de la policano, ni eniris en grandegan konstruaĵon, kiu estis tiel alta, ke mi preskaŭ ne vidis la supron. Ni trairis koridoron kaj devis paŝi poste en specon de kaĝo, kies antaŭa flanko konsistis el feraj dikaj stangoj. La policano premis sur butoneto el kupro, kiu brilis kiel oro, kaj subite ni kvazaŭ flugis supren.

Same subite la kaĝo haltis, la stangopordo malfermiĝis kaj triope ni elpaŝis por iri en grandan salonon kun multaj benkvicoj, sur kiuj sidis viroj kaj virinoj; dekstre mi vidis longan altaĵon, super kiu pendis dek-ok blankaj tabuletoj kun ciferoj. Tiam mi ne sciis, ke ili estas ciferoj, sed poste mi komprenis tion.

Ni iris preter la ciferoj kaj eniris en alian salonon, kie mi vidis aron de viroj kaj virinoj: kelkaj ne estis ligitaj unu al la alia, sed multaj aliaj same kiel mi, estis ĉenligitaj al samsortulo.

Mi ankoraŭ tute ne komprenis, kion tio signifas, sed pacience atendis.

Post mi eniris ankoraŭ kelkaj aliaj, kiuj eble ankaŭ venis el kaĝo, ĉar ilin akompanis policanoj. Kiam fine neniu plu venis, unu el la policanoj indikis kelkajn el ni kaj ordonis, ke ni eniru en la salonon, kie mi antaŭe vidis la altaĵon kun la ciferoj.

Dek-du-ope ni en vico ekstaris sub la ciferoj, post kio la policestro komencis pridemandi nin unu post alia. Al mi, kiu staris antaŭe kaj tial estis numero unu, li demandis:

— Via nomo?

— Unu-kvar-du.

— Kion !? — demandis li.

— Unu-kvar-du, sed ĉi tie oni nomas min Eduardo.

— Bone, do Eduardo, sed kio estas la familia nomo?

— Eble Unu-kvar-du, — respondis mi, ĉar mi tute ne sciis, kio estas familia nomo.

— Do vi nomiĝas Eduardo Unu-kvar-du?

— Sur mia insulo oni nomas min Unu-kvar-du, sed ĉi tie en la urbo oni kutime nomas min Eduardo.

— Kie vi naskiĝis?

— Sur la insulo.

— Kiu insulo?

— Nekonata insulo.

Nun ĉiuj laŭte ridis, sed la policestro tute ne ridis, kaj li diris iom kolere:

— Ne moku min, kaj ne agu kiel frenezulo, ree mi demandas la nomon de tiu insulo.

— Ĝi ne havas nomon, tion ja certigis la doktoro, kiu malkovris nian insulon.

— Ho! — subite diris la policestro, — vi do estas unu el tiuj blinduloj, pri kiuj doktoro Hartman skribis en la gazeto antaŭ kelkaj semajnoj?

— Mi estas.

— Bone; kiam vi naskiĝis?

— Du malbonajn sezonojn post mia plej aĝa frato.

— Alivorte, vi ne scias en kiu jaro?

— Mi ne scias.

— Bone, sed diru, kial vi nun estas tie ĉi?

— Eble, ĉar mi fajfis.

Ree ĉiuj laŭte ridis, kaj eĉ la policestro; li daŭrigis:

— Kiam vi fajfis kaj kial?

— Hieraŭ vespere, ĉar proksimiĝis policano.

— Jes, mi komprenas; vi volis averti viajn kamaradojn, ke alvenis tiu policano, ĉu ne?

— Jes!

— Sed Eduardo, aŭ, Unu-kvar-du el la nekonata insulo, ĉu vi ne sciis, ke vi hieraŭ ludis rolon de spiono?

— Neniam mi aŭdis pri spiono; mi ne scias, kio estas spiono, sur mia insulo ne estas spionoj.

— Kiuj estis tiuj kunuloj, por kiuj vi fajfis, kiam alvenis tiu policano?

— Mi konas ilin nur de mallonga tempo. Ili pagis al mi ĉiutage du dolarojn por mia fajfado; mi kredis, ke ili estas bonaj viroj, ĉar al mi ili estis ĝentilaj kaj amikaj, kaj inter si ili diris, ke mi estas: U n v r a i n i a i s, sed mi ne komprenis, kion per tio ili celis.

— Tio estas franca frazeto, signifanta: Vera stultulo, aŭ vera naivulo; kaj mi kredas, ke ili pravis, sed sufiĉas, — kaj sin

turnante al la viro staranta flanke de mi sub la numero du, li demandis:

— Via nomo?

— John....; mi ne memoras plu la familian nomon, tial mi nun ne povas ripeti ĝin; la policestro tiam daŭrigis:

— Kie vi naskiĝis, kaj kial vi staras tie? — post kio numero du respondis, kiam li naskiĝis kaj ke li staras tie pro atako.

Sinsekve la policestro faris la samajn demandojn al ĉiuj numeroj. Mi ne memoras plu, kion ĉiu respondis, sed pri unu el ili mi memoras, ke li estis dande vestita persono, kiu diris, ke li priŝtelis sian patron kaj fordibočis la ŝtelitan monon.

Inter la dek-du tiel publike elmetitaj personoj estis ankaŭ kelkaj virinoj, kiuj konfesis, ke ili ŝtelis en butikoj.

Preskaŭ ĉiuj certigis, ke ili krimis ne havante laboron aŭ monon, por aĉeti manĝaĵon aŭ vestojn.

Kiam ĉiuj estis pridemanditaj, la policestro demandis al la rigardantoj, kiuj sidis antaŭ ni, kiel vizitantoj en kinoteatro, ĉu iu el ili rekonas unu aŭ kelkajn el ni, post kiam unu el la rigardantoj ekstaris kaj diris:

— Jes, mi rekonas numeron sep.

Post tio la policestro invitis ŝin en la salonon, el kiu ni antaŭe venis. Mi kaj la aliaj ankaŭ devis eniri en tiun salonon kaj finiĝis la publika montrado de arestitoj, kio ĉiutage okazis en la sama horo.

Mi nun komprenis esti en societo de krimuloj kaj mi hontis, sed min konsolis la ideo, ke mi estas senkulpa kaj tion ankaŭ poste diris al mi la policestro, kiu forsendis min, admonante ne fajfi plu.

Tion mi promesis kaj ree mi komencis vagadi kaj veturi per aŭtoj kaj tramoj, dormi en mia hotelo kaj ĉiutage pagi la luprezon al la hotelestro, ĝis kiam restis al mi nur dudek dolaroj.

Ju pli malpliiĝis mia mono, des pli serioze mi serĉis laboron, sed ne trovis. Iom post iom ekregis min maltrankvilo, ĉar sen

mono mi ne povos plu pagi al la hotelestro, kaj tiam li ne permesos al mi dormi en mia ĉambreto.

Tamen neatendite mi saviĝis el mia malagrabla stato, sed.... trafis en ankoraŭ pli malagrablan situacion. Mi nun rakontos, kiel tio okazis.

Mi iris preter iu manĝodomo, kiun oni nomas restoracio, kie staris kvin bilardoj, t.e. tabloj kun altaj randoj, kies suproj estas kovritaj de mola, verda drapo, sur kiu povas ruliĝi eburaj globetoj, puŝataj per longaj bastonoj. Mi aŭdis la tik-tadon de la globetoj kaj eniris por rigardi, kiel oni bilardludas. Mi sidiĝis sur seĝo. Unu el la vizitantoj demandis, ĉu mi volas ludi kun li, sed mi respondis, ke mi estas senlaborulo, serĉanta laboron kaj ke mi ne povas pagi, ĉar ĉiu ludo kostas kelkajn monerojn.

Viro, kiu staris malantaŭ larĝa, longa speco de magazena tablo, sur kiu estis vendotaj manĝaĵoj kaj trinkaĵoj, aŭdis, kion mi diris, kaj vokante min al si, proponis al mi laboron en la bilardejo. Mi diris, ke volonte mi volos labori, sed ne fajfante.

Li eble kredis, ke mi ŝercas, ĉar li ekridis kaj diris, ke ion tian li tute ne postulas de mi, sed nur ke mi helpu ĉe la bilardludado; mi nur bezonas ricevi la monon de la ludantoj kaj transdoni al li tiun monon. Volonte mi akceptis kaj servis en tiu domo dum kelkaj tagoj, ĝis kiam okazis io, kio igis min forkuri pro teruro. Iun vesperon, iom malfrue, kiam ĉirkaŭ ĉiuj ludotabloj sin amuzis vizitantoj kaj kviete mi staris ĉe unu el la bilardoj, dum kvin aŭ ses vizitantoj rigardis la ludadon, subite eniris tri viroj. La viro malantaŭ la manĝaĵa tablo ektimis, kiam li vidis la tri enirantojn kaj ne sen kaŭzo, ĉar ili iris al li demandante, ĉu li rekonas ilin!

Kun tremanta voĉo li diris ke jes, sed ke li estas senkulpa.

Nun du el la enirintoj sin turnis al la ludantoj kaj rigardantoj, do ankaŭ al mi, kaj ordonis, montrante po du revolverojn:

— Stariĝu vice antaŭ tiu muro kaj ne movu vin.

Tuj ĉiuj obeis. Poste unu el la trio diris al la tremanta viro:

— Vi certe ne pensis revidi nin post via perfido, ĉu ne?

— Mi tute ne perfidis vin, — diris la terurigita viro, — tion faris mia frato.

La alia diris:

— Via frato jam ricevis sian rekompencon, kaj nun via vico venis, ĉar perfiduloj, kien ajn ili forkuras, estas retroveblaj, kaj same vin ni retrovis.

Tion dirinte, li kviete per tri kugloj el la revolvero mortigis lin. Kiam la perfidulo senviva falis teren, la trio iris for kaj min ekregis tia teruro pro tia neatendita murdo, ke mi tuj kuris el la bilardejo kaj neniam revenis.

Mi serĉis malmultekostan hotelon; tio estis necesa pro la malmultiĝo de mia mono. Hoteloj abundas en Delimono kaj por ĉiaj homoj. Informiĝinte en deko da ili — ĉiuj tro multekostaj — mi iris en alian en flankstrato, kie la domoj estas pli malaltaj ol en la larĝaj stratoj, kaj kie ĉio estas pli kvieta kaj pli senbrua.

Irinte en la hotelon, kiu staras tie, la entreprenanto, kiu sidis malantaŭ montrotablo, diris al mi, ke li havas por mi liberan ĉambreton en la tria etaĝo, kaj ke mi povos uzi ĝin senpage, kondiĉe, ke mi laboros por li ĉiuvespere dum kvar horoj; krom tio li pagos al mi mian manĝaĵon, kiun li mem alportos al mi en la ĉambreton; sed mi ne parolu pri tio, por ne ĵaluzigi aliajn luantojn, kiuj devis pagi la kutiman sumon por sia ĉambro.

Mi diris, ke volonte mi akceptas, kondiĉe ke li ne postulas, ke mi fajfu.

Li miris pro mia kondiĉo, sed aŭdinte la motivon, li ridis kaj diris, ke mi ne bezonos fajfi; sed nur labori por li super speciala aparato, per kiu li faras trinkaĵon; ke mi ne devos trinki tiun trinkaĵon, ĉar ĝi estas destinita por doktoroj en malsanulejoj.

Mi akceptis kaj ni iris tuj al la tria etaĝo, kie troviĝis mia ĉambreto.

Ĝi aspektis tre alloge, enhavis bonan liton, tri komfortajn

seĝojn kaj unu tablon, sur kiu staris la menciita aparato.

Li klarigis al mi, kiel oni funkciigas ĝin kaj baldaŭ mi lernis tion.

En la aparaton li metis la bezonajn ingrediencojn, starigis lampeton sub ĝi kaj momenton poste el tubo, fiksita al la suba parto de la aparato, fluis en sitelon akvo-simila fluidaĵo kun akra, sed tre agrabla odoro. Nun mi bezonis nur forpreni la plenan sitelon, transversi la fluidaĵon en botelojn kaj porti la plenajn botelojn malsupren al la persono malantaŭ la montrotablo, kiu estis la entreprenanto de la hotelo mem, aŭ al iu alia, kiu anstataŭis lin.

Tuj mi komencis labori kaj la entreprenanto laŭdis mian kapablecon, sed antaŭ ol reiri malsupren, li indikis al mi elektran sonorileton en angulo de la plafono, kaj diris:

— Atentu bone tiun sonorileton. Se ĝi sonoras, kio nur malofte aŭ eble tute ne okazos, tuj ĉesu labori kaj foriru tra tiu pordo, kiu kondukas en alian ĉambron, el kiu vi povos malsupreniri sur ŝtuparo por forlasi la hotelon. Ĉiufoje, kiam post sonorado vi forlasos la ĉambron, restu kelkan tempon ekstere, faru tie promenadon kaj poste reiru al via ĉambro tra la fronta pordo de la hotelo.

Mi bone komprenis, kion li diris kaj promesis agi laŭ lia volo.

Mi laboris en la vesperoj, malsupren portis la plenigitajn botelojn kaj estis tre kontenta kaj feliĉa pro la trovita laboro.

Mian liberan tempon mi pasigis promenante aŭ vizitante kinoteatron.

Mia luiganto estis tre kontenta pri mi kaj donis al mi dolaron por ĉiuj dudek boteloj plenaj de la fluidaĵo, kiujn mi pretigis por li, kvankam antaŭe ni ne interkonsentis pri tio; mi do denove ŝparis kelkan monon por uzi, se neatendite mi estiĝos senlaborulo. Mi ĉiam pli kaj pli ŝatis mian vidkapablon, ne plu deziris reiri al la insulo kaj tre bedaŭris vian blindecon, kaj ankaŭ, ke la civilizo ankoraŭ ne atingis miajn blindajn fratojn.

Mi do promenadis en mia libera tempo, veturadis en aŭtomobiloj kaj tramoj, kaj nur vespere mi laboris, plenigante la botelojn kaj portante ilin malsupren.

Iun vesperon subite la elektra sonorilo laŭte kaj longe sonoris. Mi tuj agis laŭ la interkonsento kaj iris el mia ĉambro, fermis malantaŭ mi la pordon en la fundo kaj rapidis malsupren, al la mallarĝa strato, malantaŭ la domo. Mi trairis la tutan strateton; ĉe ĝia fino mi turnis min dekstren kaj post duhora promenado mi revenis al mia hotelo.

Jam de malproksime mi vidis, ke multaj homoj staras antaŭ la hotelo.

Tamen nenion suspektante, mi malrapide iris plu kaj haltis antaŭ la homamaso. Al viro, kiu staris tie, mi demandis, kial tiuj homoj ariĝis ĉi tie, kaj li respondis:

— Pro la policanoj, kiuj eniris; ŝajnas al mi, ke en tiu hotelo laboras kontrabandisto, kaj unu el la policanoj, rigardu nur, portas botelojn eksteren kaj metas ilin en sian veturilon.

Vole-nevole mi ekpensis pri la boteloj, kiujn mi regule portis malsupren, sed suspektante nenion malbonan, mi puŝis min tra la homamaso kaj eniris en la hotelon.

La posedanto estis for kaj sur lia loko sidis policano kun mia aparato kaj aro de boteloj antaŭ si.

Vidante min iri en la koridoron, li vokis:

— Haltu! haltu! .... Kien vi iras?

— Al mia ĉambro.

— Kiu ĉambro?

Mi montris mian ŝlosilon, ĉar pri la numeroj de la ĉambroj mi nenion sciis.

Li rigardis la kupran plateton, kiu estis fiksita al mia ŝlosilo, kaj diris:

— Ho, vi do estas la brandfaristo, la kunhelpanto de nia kontrabandisto?

— Mi estas nur lia servisto — respondis mi, kaj detale klar-

igis al li, kiel mi regule en la vesperoj laboris en mia ĉambro, kaj sub kiuj kondiĉoj, post kio li diris, ke mi estas vera naivulo, kaj li daŭrigis:

— Mi estas certa, mia amiko, ke vi eĉ ne supozas, kion vi faris, fabrikante tiun brandon; tial mi ne volas aresti vin, sed mi donos bonan konsilon: Neniam plu laboru per tia aparato, ĉar tion rajtas fari nur personoj, kies nomoj estas enskribitaj ĉe la polico; tiu brando, aŭ alkoholo, estas trinkaĵo, sur kiun la ŝtato metis altan imposton aŭ akcizon, kaj tiun akcizon via hotelisto volas mem enpoŝigi, pagante al vi, sia helpanto, hontindan salajron. Kun via hotelisto ni baldaŭ reguligos nian konton; li jam sidas en sia kaĝo por pripensi sian kontrabandon. Rilate al vi.... foriru, kaj ne plu revenu ĉi tien, serĉu aliloke laboron, sed ne plu per tia aparato.

Dirante tion, li frapetadis sur la aparaton antaŭ si, kiun li nomis distililo.

Mi iris for, decidante sekvi lian konsilon kaj denove serĉis laboron, sed ne trovis ĝin.

Mi luis alian ĉambreton en alia hotelo kaj poste eliris por iom promeni kaj pripensi la staton, en kiu mi estis.

Estis la oka en la vespero kaj vidante grandan kinoteatron mi eniris.

Jam ofte antaŭe mi vizitis ĝin, sed mi havis la impreson, ke en tiu vespero okazos io speciala.

Mi ricevis paperoslipeton kun numero kaj oni petis min iri al tablo, malantaŭ kiu sidis viro kun dika libro. Mi iris al li kaj li demandis, kiel mi nomiĝas.

Aŭdante, ke mia nomo estas Unu-kvar-du, li mirigite rigardis min, kaj demandis mian plenan nomon. Mi diris, ke ĝi estas Eduardo Unu-kvar-du. Li notis mian nomon kaj la numeron, kiu staris sur mia slipeto, kaj diris:

— Bone konservu tiun papereton; hodiaŭ vespere estas loteria vespero kaj unu el la ĉeestantoj gajnos altan premion,

nome dumil dolarojn.

Neniam antaŭe mi aŭdis pri loterioj, sed decidis zorge konservi mian papereton kaj eniris en la teatron. Oni prezentis en tiu vespero filmon pri krimuloj.

Mi vidis dum la ludado de tiu filmo, kiel oni senkulpe povas fali en la manojn de tiaj krimuloj; kaj kiaj estas la malbonaj rezultoj. Mi pensis pri mia fajfilo kaj pri la aparato, kaj decidis esti tre singarda pri ĉiaj laboroj, kiujn oni estonte proponos al mi.

En la paŭzo, tio estas: en la nelonga interrompo de la filmo, la teatro, alie en la mallumo, estis tute lumigata de lampoj, pendantaj de la plafono. Sur la scenejo staris speco de grandega horloĝo kun plato, sur kiu staris multaj ciferoj. Meze de la ciferplato longa montrilo povis moviĝi laŭlonge de tiuj ciferoj, kaj tio okazis, post kiam la klarigisto faris mallongan paroladon, per kiu li klarigis, ke ĉiu vizitanto atente komparu la numerojn de sia slipeto kun tiu, kiun montros la longa montrilo de la horloĝo. Kiam li finis la klarigon, oni aŭdis sonorilon kaj la montrilo komencis turniĝi. Ĝi post momento haltis super cifero, kaj la klarigisto laŭte vokis kaj notis ĝin sur nigra tabulo, kiu staris flanke de la horloĝo.

La montrilo ree turniĝis, ree indikis ciferon, kiun la klarigisto ankaŭ notis.

Post kelkaj tiaj notadoj la montrilo ĉesis turniĝi, kaj la klarigisto laŭte vokis, ke la numero...., mi ne memoras ĝin plu, gajnis la premion!

Ĉiuj rigardantoj ekzamenis sian numeron kaj ankaŭ mi, sed ĉar mi ne sciis legi, mia slipeto diris al mi nenion; tial mi rigardis ĉirkaŭen por vidi, kiu estas la feliĉa gajninto.

Ŝajnis, ke neniu gajnis, ĉar neniu ekstaris por voki, ke li estas la gajninto.

La klarigisto atendis momenton, poste li vokis:

— Ĉu neniu!?.... Bonvolu atente kompari vian numeron kun

tiu sur la nigra tabulo!

Ree li atendis, ree neniu ekstaris. Tiam fraŭlino, kiu sidis ĉe mia flanko, rigardis mian slipeton, kiun mi tenis antaŭ mi, kaj tuŝante mian brakon ŝi diris:

— Sinjoro, vi ja gajnis, rigardu do!.... Ekstaru kaj levu vian numeron!

Mi ekstaris kaj faris, kion ŝi diris al mi. Ĉiuj okuloj sin direktis al la loko, kie mi staris kaj viro flanke de la nigra tabulo ekkriis:

— Venu ĉi tien, mi petas!

Mi iris, dum ĉiuj rigardis min, kaj kiam mi staris antaŭ la horloĝo, la viro prenis mian slipeton, komparis la numeron kun tiu de la nigra tabulo kaj poste etendante al mi la manon, kiel signon de gratulo, laŭte sciigis, ke mi gajnis la premion; poste turnante sin al la rigardantoj, li diris:

— La premion gajnis ĉi tiu sinjoro, al kiu mi nun donos ĉekon, per kiu li jam morgaŭ povos ricevi la dumil dolarojn de la ĝenerala banko en la urbo.

Mi akceptis la ĉekon, la pruvon, ke mi estis la gajninto, al kiu la banko pagos la nomitan monsumon.

Laŭta aplaŭdo, nome laŭta manfrapado de la publiko sekvis por ankaŭ gratuli min.

Nun venis sur la scenejon fotografisto, kiu fotografis min, kaj la teatroĉefo petis min por la permeso en la sekvonta tago pendigi mian portreton kun mia subskribo en bela kadro ekstere antaŭ la teatro. La kadro kun blanka folio de papero, sur kiu la portreto devos esti gluata, estis jam pretigita, kaj la teatroĉefo frapetante per la fingro la malsupran lokon de la papero, petis min meti tien mian subskribon; samtempe li prezentis al mi plumon; sed mirigite li rigardis min, kiam mi diris, ke mi ne scias skribi, kaj petis al mi desegni kruceton sur la papero, kiel signon de mia subskribo. Volonte mi volis fari tion, kaj por la unua fojo en mia vivo mi uzis plumon; poste du sinjoroj

subskribis flanke de mia kruceto, per tio atestante, ke ĝi estas la mia.

Kun mia ĉeko mi nun reiris al mia sidloko.

La fraŭlino, sidanta ankoraŭ flanke de mia seĝo, ankaŭ gratulis min kaj komencis interparolon kun mi. Ŝi miris, ke mi ne scias skribi kaj certigis, ke eble mi estas la sola persono en la tuta teatro, kiu ne scias skribi; kaj ke en civilizitaj landoj ne estas plu analfabetoj, aŭ personoj ne sciantaj legi kaj skribi. Ŝi diris plu, ke ŝi estas instruistino de vespera lernejo, vizitata de personoj, kiuj volas perfektigi sian konon pri la angla lingvo kaj aliaj instrufakoj. Ŝi konsilis min viziti ŝian lernejon, por ke mi lernu skribi kaj legi. Ŝi nomis la straton, kie staris ŝia lernejo, kaj invitis min veni jam en la proksima vespero por komenci mian studadon.

Komprenante, ke mi, kiel loĝanto de civilizita lando, almenaŭ devas scii, kion eĉ infanoj scias, mi decidis sekvi la konsilon.

Mi estis tre feliĉa pro mia premio, ĉar per dumil dolaroj mi povos senzorge vivi dum longa tempo.

Post la fino de la filmo mi tuj serĉis novan hotelon, kaj jam la sekvintan tagon en la antaŭtagmezo mi iris al la ĝenerala banko. Mi memoris ankoraŭ bone, kie ĝi staris, ĉar tie mia kunvojaĝanto de la aŭtobuso ŝtelis mian monon.

Veninte en la bankon, mi montris la ĉekon kaj oficisto konsilis al mi preni ĉeklibreton. Tial mi ricevis la ĉeklibron kaj ree mi devis subskribi. Kiel en la kinoteatro, mi desegnis mian kruceton, du atestantoj subskribis ĉe ĝia flanko, kaj ricevinte informojn, kiel uzi mian ĉeklibreton, kiam mi bezonos monon, mi eliris el la banko.

Jam en tiu vespero mi iris al la lernejo kaj regule vizitis ĝin, ĝis mi sciis legi, skribi kaj eĉ iom kalkuli, ĉar la kalkulado estas unu el la ĉefaj aferoj en Inferio. Ju pli mi lernis, des pli mi sentis min jam civilizita, kaj ĉar mi havis monon, mi ne plu bedaŭris mian staton kaj ne deziris reiri al mia insulo. Tie mi ne povus

plu esti feliĉa, kiel antaŭe.

Dum longa tempo al mi okazis nenio rakontinda, mi studadis kaj eĉ tre volonte; mi promenadis, faris tiam kaj tiam ekskurson, dormis kviete en mia hotelo, iris al la banko, kiam mi tion bezonis, kaj mia vivo fluis tute laŭdezire, ĉar min plu ne turmentis la timo iĝi senlaborulo. Mi intencis iom post iom elspezi mian monon ĝis la tago por reflugi al mia insulo.

Pri prelegoj de la doktoro mi aŭdis aŭ legis plu nenion, ŝajne ili ne havis sufiĉan sukceson post la unuaj; sed kelkfoje mi aŭdis, ke multaj inferianoj rigardis la malkovron de mia insulo fantaziaĵo, kaj eĉ trompo, ĉar laŭ ili tiaj blinduloj ne povas ekzisti.

Mi faris progresojn en mia studado kaj post diligenta laboro mi estis eĉ kapabla fari mian ekzamenon por la Alta Lernejo.

Neniam mi forgesos pri tiu ekzameno, kaj pri la agrabla vespero, kiu ĝin sekvis.

La ekzameno mem, en kiu partoprenis pli ol cent studentoj, kiuj ĉiuj sukcesis, estis en la lernejaj ĉambroj, kaj la disdono de la atestoj pri nia kapableco okazis la sekvintan vesperon, solene kaj feste. Ĉeestis multaj familianoj de la sukcesintoj kaj ĉio okazis en granda teatro-aspektanta salono de la lernejo.

La ĉeestantoj sidis sur longaj benkoj, kaj antaŭ tiuj benkoj sur altaĵo staris seĝoj por la sukcesintoj, kiuj sinsekve venis el flanka salono, por sidiĝi kontraŭ la rigardantoj.

Inter tiuj rigardantoj kaj la altaĵo, kiu estis larĝa kaj longa, sidis muzikistoj, kiuj laŭte ludis dum kaj post la disdono de la atestoj. Ĉiufoje, kiam atesto estis transdonata, la orkestro fanfaris, tio estas: per kelkaj laŭtaj sonoj salutis kaj gratulis la atestricevinton.

Ankaŭ por mi ili tion faris, kaj kiam la direktoro laŭtlegis mian nomon, li aldonis la sciigon, ke mi, lernanto Eduardo Unu-kvardu, antaŭ tri jaroj venis de nekonata insulo, loĝata nur de necivilizitaj homoj. Li esprimis sian specialan admiron, deklarante, ke eĉ necivilizito kaj eksblindulo povas esti kapabla adaptiĝi

al la civilizado, kion li opiniis tre feliĉa fakto.

Post tiu deklaro la ĉeestantoj laŭte aplaŭdis, kaj la muzikistoj por la dua fojo fanfaris.

Mi estis fiera pro mia sukceso kaj tuj min kaptis la ideo daŭrigi mian studadon en la Alta Lernejo kaj tiun ideon mi parte plenumis, kion vi baldaŭ aŭdos.

Kiam ĉiuj sukcesintoj estis ricevintaj sian ateston, la direktoro faris longan paroladon pri la utileco de la lernejo kaj tuj poste estis ludata opero aŭ teatraĵo, kies teksto ne estas dirata, sed kantata, akompanata de muziko. Tiu opero estis laŭ mia opinio tre stranga; la temo estis pri piratoj aŭ maraj rabistoj, tio estas: speco de ŝtelistoj, kiuj kaptas la ŝipojn de malamika lando. La pirat-estro enamiĝis al knabino sur la marbordo kaj post multaj aventuroj ili fine geedziĝis. Plej strange estis, ke la opero ludis antaŭ ducent jaroj, kaj ke en ĝi partoprenis policanoj de la nuntempa Inferio.

Kiam mi esprimis mian miron pri tio al sukcesinto, kiu sidis ĉe mia flanko, li diris, ke la kompilinto de la opero uzis anakronismon aŭ eraron kontraŭ la kronologio aŭ scienco pri la historio. Kio ajn estis, ĉio estis tre amuza kaj mi kredas, ke el ĉiuj rigardantoj preskaŭ neniu rimarkis tiun anakronismon, malgraŭ la antikvaj kostumoj de la piratoj kaj la nuntempaj de la kunludantaj policanoj.

Ĉar mi nun iĝis studento de la Alta Lernejo, mi devis forte studadi.

En la mateno la kurshoroj komenciĝis per la kantado de la inferia popolhimno, kiu estas tre bela, sed kies vortojn preskaŭ neniu scias parkere, escepte de la unuaj linioj. Post tiu kantado la studentoj devis ekzerci la sporton, t.e. korpaj ekzercoj celantaj la disvolvon de fizika lerteco, kaj ankaŭ la piedpilkadon. En la piedpilkado samtempe partoprenas multaj personoj. La ludantoj tiel kuras kaj forpiedbatas la pilkon, ke ofte ili perdas la spiron. Mi ankoraŭ nun ne povas kompreni, al kio utilas tiu

ludo, sed eble mi ne estas sufiĉe civilizita por tion kompreni. Ankaŭ mi kunkuris, ankaŭ mi batadis kaj ofte post la fino de la ludo mi tiel laciĝis, ke mi preskaŭ ne povis stari sur la piedoj. Spite al tio, ĉiam piedpilkado okazas antaŭ la komenco de la kurshoroj.

Ne nur mi, sed ĉiuj studentoj post la piedpilkado estis tre lacaj, tiom pli, ĉar la iro al la lernejo ne estis facila pro la aro de dikaj libroj, kiujn ni devis kunporti al la lernejo.

Iam mi demandis al kunstudanto, al kio utilas ĉiuj tiuj pezaj libroj, ĉar ni studis el ili ne pli ol la dekonon. Li diris, ke dikaj, pezaj libroj montras ion gravan, pro kio oni enkondukis ilin en la altaj lernejoj.

Pri la fakoj, kiujn mi studis, mi ne volas ĉi tie paroli, ĉar vi ne-civilizitoj kaj blinduloj ne komprenus tion.

Nur unu jaron mi studis en la Alta Lernejo, ĉar post tiu tempo proksimiĝis mia reiro al la insulo.

Kiam mi reiros al Inferio, mi daŭrigos mian studadon. La doktoro promesis, se bezone, finance helpi al mi; tamen tio ne estos necesa, se mi povos trovi laboron. En Inferio multaj studentoj estas laboristoj en la tago, kaj studas nur vespere, vizitante tiam la universitaton.

Kun unu el ili mi tre amikiĝis, li multe instruis min pri kelkaj fakoj, precipe pri historio kaj geografio. Li interalie helpis al mi pri la inferia historio, kaj laŭ lia diro la plej famaj personoj en ĝi estis Guliver, Lincoln, Napoleono kaj Vilhelmo Tel. Li tre entuziasmiĝis pri Vilhelmo Tel, kiun li komparis kun Guliver. Tiu Vilhelmo Tel, la liberiginto de Svisujo, laŭ la certigo de mia amiko, estis tiel lerta, ke li pafis sagon tra pomo, dum li staris sur la kapo de sia filo. Tion mi ne komprenis, sed li diris, ke tio devenas de la fakto, ke mi ne sufiĉe studis la historion. Miriga estis tio, kion li instruis al mi pri Holando, aŭ la malaltaj landoj, ie en Germanujo. Tiu lando situas multajn metrojn sub la nivelo de la maro, sed altaj digoj, konstruitaj de la enloĝantoj,

protektas la tutan landon kontraŭ inundo aŭ subakviĝo. Tio sendube estas io tre interesa.

Al mi nun ne restas multe por rakonti. Nur pri unu dumtaga ŝtelrompo, kiun mi mem vidis, mi volas paroli; ankaŭ ĝi estas interesa pro la impertinenteco de la krimuloj en Inferio; aŭdu nur:

Kelkajn tagojn antaŭ mia reiro al ĉi tiu insulo, mi promenis en iu strato, apud kinoteatro. Kontraŭ tiu teatro ĉe la transa stratflanko estas granda magazeno de peltaj manteloj. Malantaŭ tre alta, dika fenestro de tiu magazeno ĉiam pendas multaj manteloj. Subite mi aŭdis bruegon kvazaŭ de rompiĝanta vitro; la bruego venis de la flanko de la magazeno kaj rigardante en tiu direkto mi vidis, ke juna viro paŝas tra la rompita fenestro kaj kun pelta mantelo sur la dorso, kuras al aŭto, kiu staris je kelka distanco.

La pordeto de la aŭto malfermiĝis, la viro ensaltis, la pordeto fermiĝis kaj la veturilo rapidis for, turniĝis malantaŭ stratangulo kaj malaperis.

Mi ne sciis, kion pensi pri tio, kaj mi estis konsternita pro miro; sed tuj poste el la magazeno kuris viro laŭte kriante:

— Haltigu.... haltigu la ŝteliston!!

Tamen estis jam tro malfrue; krome neniu el la promenantoj sur la trotuaro kuraĝus haltigi tian ŝteliston, ĉar ĉiam li estas armita per revolvero kaj li mortigus ĉiun, kiu volus kapti aŭ reteni lin. En mallonga tempo aro de scivoluloj staris antaŭ la rompita vitro kaj baldaŭ poste polica aŭtomobilo venis por, se eble, veture atingi kaj aresti la ŝtelistojn.

En tiu sama vespero mi legis en la ĵurnalo, ke la antaŭan tagon samspeca ŝtelrompo okazis en alia kvartalo de la urbo kaj ke ĉe tiu okazo la ŝtelistoj forveturis kun kvar multekostaj manteloj; neniam mi legis, ke la polico arestis la krimulojn.

Unu-kvar-du eksilentis kaj rigardis sian ĉefon. La ĉefo serioze staris sur la benko, ne movis sin kaj neniel montris, kia li

trovis la paroladon, kiun li ĵus aŭdis. Nun Unu-kvar-du rigardis la aliajn insulanojn; kelkaj flustris inter si, sed la parolinto ne povis aŭdi, kion ili flustris.

Poste Unu-kvar-du rigardis siajn kunvojaĝintojn. Unu-sep-du rapide ion diris al Sola-lasta-unu, kaj Unu-kvar-du aŭdis nur la vortojn:

— Mi.... as iom pli amuze....

La piloto diris nenion, la fotografisto signis al la doktoro, ke ĉi tiu parolu, kaj la doktoro diris:

— En la nomo de ĉiuj ĉeestantoj mi dankas Eduardon pro liaj paroloj, kaj mi estas certa, ke ili multe impresis liajn samgentanojn, kiuj nun sen ia dubo ricevis ĝustan aŭ sufiĉe bonan ideon pri nia lando kaj ĝia civilizado. Ni nun atendas la decidon de la ĉefo rilate al tio, ĉu Eduardo aŭ Unu-kvar-du restu sur la insulo kun siaj du civilizitaj fratoj, aŭ ke ili reiru kun ni al Inferio. Post du aŭ tri jaroj ili estos lernintaj sufiĉe, por ricevi ŝtatan oficon. Se ili reiros kun ni, ili certe sukcesos en tio, ĉar mi havas bonajn amikojn ĉe la registaro, kiuj povos zorgi pri tio.

Mi nun finas, esprimante mian deziron, ke Petro aŭ Unu-sep-du, kaj Karlo aŭ Sola-lasta-unu morgaŭ kaj postmorgaŭ amuzu vin per siaj aventuroj, kiuj estos pli gajaj ol tiuj de ilia frato Unu-kvar-du....

Petro volis daŭrigi, sed apenaŭ li diris tri vortojn, la ĉefo lin interrompis jene:

— Nia frato Unu-kvar-du longe parolis kaj li rakontis al ni multajn aventurojn, kiujn li mem spertis en la civilizita Inferio. Liaj paroloj montris, ke li multe lernis, ĉar li uzis tiom da vortoj, kiuj estas strangaj al nia insula lingvo, ke ofte estis al mi kaj tial ankaŭ al la aliaj insulanoj malfacile ĉion kompreni, kion li diris. Mi nun ne volas peti klarigon pri ĉiuj tiuj fremdaj kaj strangaj vortoj, ĉar estas jam tre malfrue. Mi tamen komprenis sufiĉon kaj precipe mi komprenis, ke la vortoj ŝtelrompo kaj aliaj samspecaj kunkreskas kun la civilizeco. Ankaŭ mi bone

komprenis, ke li fieras pro sia civilizeco kaj pro tio, kion li lernis en tiu malproksima lando; fine mi komprenis, ke mi povas iom fieri pri nia insulo, ĉar ĝuste pro tiu ne-civilizacio ĉe ni ne estas multaj infektaj malsanoj, kiuj svarmas en civilizita lando. Restas al mi la demando, ĉu mi toleros en nia insulo morojn kaj kutimojn, kiuj naskiĝis pro tiu civilizacio, sed la respondon mi konservos, ĝis la aliaj du fratoj, Unu-sep-du kaj Sola-lasta-unu, estos rakontintaj pri siaj spertoj kaj aventuroj.

Kore mi esperas, ke ili ne suferis pro la samaj teruraj malsanoj, kiuj infektis la loĝantojn de Inferio, ĉar tio tre malĝojigus min kaj ankaŭ miajn blindajn fratojn.

Post kiam la tria civilizita frato finos la rakonton pri siaj aventuroj, mi post longa pripensado diros mian opinion.

Morgaŭ en la vespero ni ree kunvenos ĉi tie en nia kabanego por aŭskulti al Unu-sep-du. Ni nun reiru al niaj kabanoj por dormi, kaj espereble miaj fratoj, kiuj kun mi aŭskultis la aventurojn de Unu-kvar-du, ne estos atakataj de teruraj sonĝoj aŭ inkubsonĝoj pro ĉio, kion ili aŭdis hodiaŭ vespere.

Al vi ĉiuj mi nun deziras kvietan nokton! —

Dirinte tion, la ĉefo iris el la kunvenkabano, kaj lin sekvis la plejaĝuloj kaj la aliaj insulanoj, kiuj ankoraŭ flustris unuj al aliaj, sed tiel mallaŭte, ke la inferiaj milionuloj ne povis aŭdi, kion ili diris.

Ili triope kun Unu-kvar-du, Unu-sep-du kaj Sola-lasta-unu restis ankoraŭ dum kelka tempo en la kabanego, kaj priparolis la efikon de la parolado de Eduardo.

La doktoro opiniis, ke la impreso, kiun la aventuroj de Eduardo postlasis ĉe la insulanoj, ne estas tre bona, kaj li tial konsilis al Petro ne multe paroli pri civilizacio kaj krimaferoj, sed pri specialaj amuzaj aventuroj, por ke la ĉefo kaj la insulanoj ne ricevu malbonan impreson pri la inferia civilizeco, kiun ili ja pro sia blindeco ne povas kompreni.



VII

PETRO, Aŭ UNU-SEP-DU staris antaŭ la insulanoj en la kabanego kaj rakontis.

— Ĉefo kaj fratoj!... Kiam frato Unu-kvar-du forveturis kun la doktoro, Sola-lasta-unu kaj mi postrestis sur la flugtereno kun la piloto Jung kaj la fotografisto Ingram.

Ni interkonsentis, ke Sola-lasta-unu iru kun sinjoro Ingram, kaj ke provizore mi restu ĉe la piloto Jung.

Per aŭtomobilo ni duope ankaŭ forveturis al la granda urbo Saidumo.

Mia frato Unu-kvar-du jam tre multe rakontis al vi pri tiu urbo kaj ĝiaj kutimoj; mi tial ne tuŝos plu tiun temon, kaj rakontos nur pri tio, kio al mi okazis en granda hotelo, kie sinjoro Jung havis siajn ĉambrojn; poste mi parolos pri tiu mirinda aparato, la reaperigilo, kaj fine, kiel mi dum marvojaĝo iĝis Inka, aŭ reĝo super ruĝhaŭtuloj sur la insulo Nova Teksupa, kiu situas, kiel ĉi tiu insulo, meze en la Granda Oceano.

Tio estis io tre stranga, kio indas esti rakontata, kaj sinjoro Jung priskribis tion en granda urba gazeto kaj per ĝi iĝis iom

fama inter la fabelistoj de sia lando; mi diras: fabelistoj, ĉar la redaktoro de tiu gazeto opiniis, ke ĉio, kion Jung skribis, estas nur fabeloj kaj fantaziaĵoj. Per tio ni povas konstati, ke eĉ redaktoro povas esti malprava.

La hotelo, kie sinjoro Jung havis siajn ĉambrojn, estis unu el la plej grandaj de la urbo, kaj liaj ĉambroj troviĝis sur la dua etaĝo. Mia ĉambreto, ĉar mi havis nur unu, kiu sufiĉis por mi, estis apud tiuj de sinjoro Jung. Mi ne bezonis labori la unuan monaton, sed devis konatiĝi kun la urbo, kaj tial mi multe eliris, same kiel mia frato Unu-kvar-du. Nur en la nokto mi devis esti en mia ĉambreto por iri en la dormejon de la piloto, kiam li vokos min per sonorileto, metita sur la plafono de mia ĉambreto. Komence mi tute ne komprenis, kiel en tiu maniero mi povus servi al sinjoro Jung, sed poste mi tion komprenis.

Li timis ŝtelrompistojn, kaj se eventuale ili penetrus en liajn ĉambrojn, mi post la signo de la sonorileto devus veni por, se bezone, helpi forpeli la krimulojn. Feliĉe, tio neniam okazis. Apud mia ĉambreto estis tiu de viro, kiun de la komenco mi rigardis strangulo. Estante en sia ĉambreto, li ofte legis kaj volonte li parolis kun mi.

Post kelkaj tagoj ni amikiĝis, kaj kiam li aŭdis, kiu mi estas, kaj ke mi estas ankoraŭ senlaborulo, kaj eĉ, ke mi ne lernis metion, li antaŭdiris, ke neniam mi trovos taŭgan oficon aŭ laboron en Inferio. Ankaŭ li tion ne povis. Li nun diris, ke li estas germano, kiu antaŭe studis por fariĝi kuracisto, sed neniam sukcesis plene en siaj ekzamenoj. Forlasinte sian patrujon li servis kelkajn monatojn kiel maristo, kaj fine veninte en Inferion, perlaboris sian panon kiel almozulo. Vi baldaŭ aŭdos, kio estas almozuloj, kiujn vi ne konas en nia insulo.

Mi tre miris, aŭdante tion, kaj kredis, ke li mokas min, aŭ ke li ŝercas. Tiam li montris al mi kartonon, sur kiu estis gluita blanka folio de papero kun la surskribo: — „Mi nenion petas — Kompatu malfeliĉulon!" — Ĉar mi ne sciis legi, li klarigis

al mi, kio staras sur la folio, sed ankoraŭ tiam mi ne komprenis lin.

Li demandis, ĉu mi scias, kie estas la granda kinoteatro en la apudeco de la hotelo.

Mi respondis, ke mi scias tion.

— Nu, — daŭrigis li, — iru al tiu teatro hodiaŭ vespere kaj rigardu bone, tiam vi plene komprenos min, ĉar ankaŭ tie ĉiuvespere sidas tia almozulo, kia mi estas.

En la sama vespero mi iris tien, kaj apud la teatro sur trotuaro mi vidis viron, kiu sidis tie. Li estis tute kurbiĝinta, tremetis, rigardis neniun kaj diris nenion. Sur la dorso pendis papero kun surskribo. Mi rigardis pli atente kaj vidis, ke de tempo al tempo preterpasantoj ĵetis al li moneron, kiun li tuj kaptis kaj metis en la ĉapon sur siaj genuoj. Pli ol horon mi restis sur la sama loko por observi la almozulon, kaj fine reiris hejmen.

Je la noktomezo mia najbaro, la almozulo, ankaŭ venis hejmen, sed tra malantaŭa pordo.

Mi tuj rekonis la almozulon, li montris sian ĉapon, kiu estis plena de moneroj.

Ridetante li frapetadis mian ŝultron kaj konsilis al mi:

— Agu kiel mi, kaj vi perlaboros pli multe, ol aro de viroj kun bona ofico.

Tamen mi ne ŝatis tiun manieron por perlabori monon, kaj kiam mi kun sinjoro Jung parolis pri la almozulo, li diris, ke tiaj viroj loĝas multaj en la grandaj urboj de Inferio, pro kio mi tre miris. Poste, kiam mi sciis, ke tiu maniero por multaj viroj estas la sole ebla, mi ne miris plu, sed decidis ne sekvi ilian ekzemplon.

La almozulo, mia najbaro, „laboris" nur tri vesperojn ĉiusemajne, la ceteran tempon li estis kvazaŭ sinjoro, kaj promenis kaj eliris kiel mi mem povis fari, dank' al la financa helpo de sinjoro Jung.

Pasiginte tutan monaton en la hotelo, mi diris, ke mi dezirus

mem perlabori mian ĉiutagan panon kaj sinjoro Jung konsilis al mi fari tion kiel maristo sur unu el la vaporboatoj, kies kapitanon li bone konis. Jam antaŭe mi vidis vaporŝipojn dum mia transflugo al Saidumo, kaj tiam ekregis min jam la deziro rigardi de proksime tian veturilon, kiu kvazaŭ per si mem kaj sen helpo, moviĝis antaŭen, sur la ondoj de la Oceano.

La ideo de sinjoro Jung tre plaĉis al mi, kaj mi deziris tuj realigi ĝin, sed mi devis atendi, ĝis la celita vaporboato revenis de longa vojaĝo.

Mi tial pacience atendis, sed ĉar la promenadoj kaj la nenionfarado jam tedis min, sinjoro Jung irigis min al unu el siaj amikoj, kiu loĝis ekster la urbo en bela vilao kun granda ĝardeno.

Mi do laboris tie kun la ĝardenisto, kies nomo estis Huksli.

Li estis viro, kiu en la vespero, kiam lia laboro finiĝis, dediĉis sin al io tre speciala, pri kio mi nun parolos.

En iu vespero li vokis min en sian ĉambron, aŭ verdire en sian laborejon en la fundo de ĝardena domo. Tie mi vidis strangan aparaton.

Li nomis ĝin „reaperigilo" kaj certigis, ke li mem eltrovis ĝin kaj ke li laboris ses jarojn por pretigi ĝin.

— Per tiu aparato, — diris li, — ni povas ĉion vidi, kio okazis, indiferente, antaŭ kiom da jaroj.

Mi demandis, ĉu ĝi estas tia kino, kian mi jam vidis en kinoteatroj. Li diris:

— Ĝi estas tia, sed tute diferenca; la kino, kiun oni vidas en la teatro, montras nur la bildojn de io, kio okazis dum la fotografado; ĉi tiu tamen montras la bildojn de io, kio okazis antaŭ nedifinita tempo. Nur mi havas ĉi tiun aparaton kaj vi estas la unua, al kiu mi montras ĝin. Ekzemple: se mi volas montri epizodon el la inferia interna milito, kiu okazis antaŭ sepdek jaroj pro la liberigo de la sklavoj en Inferio; aŭ pri la milito de la liberigo, kiu okazis ankoraŭ pli frue, mi devas nur

iri kun ĉi tiu reaperigilo al la loko, kie oni batalis en tiuj militoj; kaj kiam mi akurate alĝustigas mian aparaton kaj funkciigas ĝin tiel, ke la bildoj aperas sur la skreno, ni vidas precize, kion ni vere vidus, se antaŭ jarcento ni ĉeestus tiujn okazintaĵojn.

Tiamaniere mi povas montri, kiel en la jaro 1777 apud Princetown Washington komandis en la milito kontraŭ la potenca Anglujo; kiel en 1865 Lincoln estis murdata de la aktoro Booth en la teatro; mi povas montri, kiel Napoleono komandis dum la batalo apud Waterloo; kiel Kristoforo Kolombo malkovris Amerikon. Mi nur bezonas iri al unu el la lokoj, kie tio okazis, funkciigi mian reaperigilon, kaj vi vidos ĉion. Tio estas io tre natura kaj mi klarigos tion.

Ĉio en la universo moviĝas sen halto. La radioj de la suno venas al mi kaj trarapidas tra longega vojo, ĝis kiam ili atingas la teron. Tie ili penetras en ĝin kaj la varmo, kiun havigas al ni la karboj, estas la enpenetrintaj sunradioj de antaŭ miloj kaj miloj da jaroj. La etero kondukas kun si en la senfinon ĉiujn bildojn, ĉiujn sonojn de ĉiuj tempoj. Senfine ili flugas plu.... ĉiam plu.... Mi eltrovis aparaton, mian reaperigilon, por tiri returne tiujn bildojn kaj sonojn, sed la daŭro de la reapero dependas de la tempo, kiam ili estiĝis kaj tial la bildoj kaj sonoj de antaŭ cent jaroj postulas pli longan tempon por reveni al mi, ol tiuj de la pasinta semajno. Tamen mi povas tiel rapide funkciigi la aparaton, ke la longaj distancoj iĝas mallongaj, kaj per speciala reguligilo mi povas fiksi mem la tempon, en kiu iu ajn bildo aŭ sono revenos de la senfino. Estas tamen necese precize tie funkciigi la reaperigilon, kie la sonoj kaj bildoj antaŭe estiĝis. Ĉar en la plej multaj okazoj ni scias la ĝustan lokon, mi sen peno povas montri ĉion, kion oni volas revidi aŭ reaŭdi el kiu ajn epoko.

Mia reaperigilo povos esti utila al la polico, same kiel la sistemo de la premsignoj de krimuloj, sed mi tre timas, ke la aplikado ne estos konsentata de la aŭtoritato, ĉar inter la aŭto-

ritatanoj, eĉ inter la plej eminentaj, estas kelkaj, kiuj timas la reaperigilon, kiu ja povos aperigi okazintaĵojn, kiuj metos ilin en malagrablan situacion. La aŭtoritatanoj aŭ aliaj potenculoj sur politika kaj ekonomia terenoj jam ofte malaperigis eltrovaĵojn, ĉar tiuj eltrovaĵoj endanĝerigis ilian potencon aŭ ilian kapitalon.

Mi konis junulon, li inventis maŝinon, kiu povus anstataŭi la nunajn motorojn de la aŭtomobiloj. Per malgranda kvanto da benzino kaj oleo li veturis per sia aŭto kaj sia eltrovita maŝino pli multajn tagojn, ol ordinara aŭtomobilo povas veturi en same multaj semajnoj. Per tiu eltrovaĵo tamen la posedantoj de oleofontoj estis minacataj, kaj iun tagon subite kaj mistere malaperis ne nur la nova maŝino, sed samtempe la eltrovinto, kaj poste neniam oni plu aŭdis pri ili.

Tial mi endanĝerigus min sendube, se mi publikigus mian eltrovaĵon; tial mi estas prudenta kaj singarda, kaj parolos pri ĝi nur en favora tempo. Mi estos pli singarda, ol tiu malaperinta eltrovinto, pri kiu mi ĵus parolis; krom tio, mi ne estos la sola, kiu posedos mian aparaton, pro kio mia subita malapero ne povos neniigi mian eltrovon. —

Mi demandis lin, kiel li povis inventi tian miraklan aparaton, kaj ĉu antaŭe li eble estis io alia ol ĝardenisto. Li respondis, ke li ne estas inferiano, ke antaŭe li studis en universitato de alia lando, sed ke li pro politikaj cirkonstancoj devis forlasi sian landon. Poste en Inferio li ĉiamaniere perlaboris sian panon kaj fine li fariĝis ĝardenisto, speciale ĉar li nun povas labori ekster la urbo, kaj vespere kviete perfektigi sian reaperigilon.

Kiam mi petis lin, funkciigi sian aparaton, li diris, ke baldaŭ mi vidos tion antaŭ la tribunalo, kie li per sia inventaĵo esperas helpi al senkulpulo, kiu nun suferas en malliberejo pro krimo, kiun iu alia plenumis.

Pacience, ni, insulanoj, ĉiam estas pacienculoj, mi atendis la venon de la momento, kiam mi vidos, ke ĉio, kion Huksli diris

pri sia inventaĵo, estas vera kaj ne fabelo. Tiu tago baldaŭ venis kaj mi rakontos, kiel tio okazis.

Ĉe la alia flanko de la urbo, ankaŭ en granda vilao, loĝis jam dum multaj jaroj iu Johano Hart, posedanto de granda fabrikejo; li estis kvindekjara fraŭlo, ne havis familianojn kaj vivis en sia vilao kun unu servistino-kuiristino kaj du servistoj.

La vivo de Johano Hart fluis kviete plu; ĉiumatene li iris al la oficejo de sia fabrikejo kaj regule revenis hejmen je la sesa en la posttagmezo. Neniu sciis, kiel li pasigis sian ceteran tempon, kaj nek la servistino, nek la servistoj volis doni sciigon pri tio.

Hart tute ne okupis sin pri politiko; li nur laboris en sia oficejo, estis kontenta, kiam liaj aferoj bone marŝis, kaj ŝajne nenio ekster liaj vilao, ofico kaj fabrikejo tuŝis lin.

Neniu parolis pri li, sed subite neatendita okazintaĵo estis la kaŭzo, ke ĉiuj ĵurnaloj dediĉis longajn artikolojn pri la kvieta, ĝis tiam preskaŭ nekonata fabrikanto Hart.

Io terura kaj eksterordinara subite okazis en la vilao de Johano Hart. Kiel estinta blindulo, mi havas fortan memoron kaj tial preskaŭ ĉion memoras, kio en tiu vespero staris en la ĵurnaloj de la urbo. En ili staris: Hieraŭ vespere inter la oka kaj la dek-dua horo ŝtelisto aŭ ŝtelistoj penetris perforte en la vilaon de la fabrikanto Johano Hart. La vilao staras kvaronhoron ekster la urbo apud la vojo al...., la nomon de la celita vilaĝeto mi ne memoras plu. La krimuloj, eble apartenantaj al iu bando de malbonfaristoj, eniris tra la malantaŭa pordo de la vilao, pafmortigis en la koridoro unu el la du servistoj, kaj batis teren la fabrikanton. Je noktomezo la alia servisto kaj la servistino-kuiristino trovis la murditan serviston kaj la fabrikanton; la lasta kuŝis senkonscia apud la pordo, kiu kondukas al la ĝardeno malantaŭ la vilao.

La reveninta servisto tuj telefonis al la polico, kiu jam duonan

horon poste venis por ekzameni la ŝtelrompon kaj mortigon de la servisto.

Sajne la ŝtelistoj forkuris ĉe la veno de la dua servisto kaj servistino, ĉar ĉio en la vilao restis netuŝita, kaj ĝis nun nenio mankas al la inventaro, nek al la oro kaj arĝento; eĉ neniu ŝranko estis perforte malfermita. Nur la monujo de la fabrikanto estis ŝtelita el ties poŝo kaj retrovita ĉe persono, kiu venis el la direkto de la vilao sur la vojo al la urbo. Tiu persono, ne konata de la polico, estis arestata kaj enŝlosita en la malliberejo. Li certigas, ke li havas neniun kulpon je la krimo kaj ke li trovis la monujon sur la vojo apud la pordeto de la latbarilo, kiu ĉirkaŭas la ĝardenon antaŭ la vilao de Johano Hart. Ĉe la arestito oni ne trovis revolveron, nek bastonon; eble li forĵetis ilin ĉe la proksimiĝo de la polica aŭtomobilo. La dua servisto kaj la kuiristino estis submetitaj al severa pridemandado, sed ĉio montris, ke ili ne kunlaboris en la krimo. Unu horon post la veno de la policanoj la fabrikanto rekonsciiĝis, sed li povis doni nur suprajan priskribon pri la okazintaĵo, kaj tion li faris flustre, ĉar ŝajne pro la suferita granda emocio li perdis sian voĉon. Li ne estis vundita; eble la atakanto nur senkonsciigis lin per forta bato sur la kapon, tamen postsignoj de bato ne estis troveblaj. La tuta afero estas mistero, kaj la polico nun faras sian eblon solvi ĝin. Ni povas aldoni la sciigon, ke la fabrikanto publike promesis mil dolarojn al tiu, kiu povas klarigi la dramon. La ĝardenisto Huksli, kiu voĉlegis al mi tiun krim-artikolon, dum kelka tempo atente rigardis antaŭ sin, poste, enpoŝigante la ĵurnalon, li diris, ke eble li povos perlabori tiujn mil dolarojn pere de sia reaperigilo, kaj li petis mian helpon.

Jam la sekvintan matenon li iris al la polica komisaro kaj longe parolis kun li pri sia intenco; li silentis tamen pri sia aparato, sed petis la permeson fotografi la lokon, kie okazis la krimo; se necese, li fotografos en ĉeesto de policano.

La komisaro unue ne volis plenumi la peton, sed kiam li

aŭdis, ke la ĝardenisto estas certa, ke li havos sukceson kaj ke sen ia dubo li solvos la tutan misteron de la mortigo, la ĉeestonta policano estis indikata, kaj ni triope: la ĝardenisto, la policano kaj mi, iris al la vilao de Hart.

Huksli kvazaŭ fotografis per sia aparato, unue sur la vojo antaŭ la vilao, poste sur la aleo kondukanta al la malantaŭo de la konstruaĵo, kaj fine antaŭ la pordo kaj en la koridoro, kie la krimo okazis.

Li faris pli ol cent fotografaĵojn kaj fininte, dankis la policanon kaj reiris kun mi al nia vilao.

Pasis tuta semajno, en kiu Huksli ĉiuvespre diligente laboris super sia aparato.

Li ne volis montri al mi la rezulton de sia fotografado kaj diris, ke mi baldaŭ vidos, ke lia eltrovaĵo estos rigardata kiel io tute nova kaj kiel io, kio povos kaŭzi grandan ŝanĝon en la praktikado de kriminalaĵoj.

— Sed, — tiel li daŭrigis, — mi timas, ke la ŝtato neniam enkondukos en siajn tribunalojn aparaton, kiu povus en la nuna tempo iĝi danĝera por multaj el la juĝistoj mem kaj ankaŭ por multaj aliaj eminentuloj en la lando.

Kiam mi diris, ke mi ne komprenas tion, li respondis:

— Ĉiu scias, ke inter la eminentuloj de nia ŝtato troviĝas kelkaj, kiuj malgraŭ siaj riĉeco kaj bone pagataj oficoj, jam de longe devus sidi en la malliberejo, se estus eble pruvi iliajn intrigojn, nejustaĵojn kaj eĉ krimojn. Multaj eraroj, faritaj de la tribunalo, estonte estus tute neeblaj, se oni nur volus uzi mian reaperigilon. Sed mi atendos kaj vidos, kion oni faros, post kiam per mia aparato mi nerefuteble montris, kiu estas la murdinto de Johano Hart kaj de ties servisto. Mia reaperigilo mirigis min mem, kaj mi estas certa, ke la ĵurnaloj dediĉos ankoraŭ pli longajn artikolojn, ol antaŭe, al la krimafero „Johano Hart". Sed mi devas esti singarda, tion mi jam diris, kaj tion mi sentas des pli forte, kiam mi pensas pri la sekvo, kiun kaŭzos

mia aparato, kiam mi funkciigos ĝin antaŭ la tribunalo.

Unu monaton poste oni pritraktis la murdaferon en la granda juĝejo de la urbo.

Jam frue en la mateno aro de scivoluloj staris antaŭ la konstruaĵo, por ĉeesti la proceson kontraŭ la arestito, la kulpigita kaj ŝajna murdisto de Johano Hart. Huksli kaj mi estis inter la scivoluloj, sed nek li nek mi estis vokita por iel atesti en la afero.

Kiam la proceduro komenciĝis, ĉiuj sidlokoj por la rigardantoj estis okupitaj, kaj eĉ la starloko malantaŭ la sidantaj rigardantoj estis plen-plena de viroj kaj virinoj.

Ĉiuj scivoliĝis pri la fino de la mistera murdafero, tiom pli, ĉar ĉiuvespere la ĵurnaloj parolis pri ĝi, sciigante, ke la arestito ankoraŭ ne konfesis kaj ke neniu nova signo estas trovita de la polico por iel lumigi la sensacian krimon. La teren batita Hart ankoraŭ ĉiam nur flustre parolis; evidente li ne reakiros sian voĉon.

Hart mem ĉeestis la juĝan kunsidon. Kun streĉita atento oni aŭskultis la prelegadon de la prezidanto, lian akuzon pro la trovita monujo, la defendon de la advokato kaj la certigon de la kulpigito, ke li havas neniun aferon kun la murdo, nek kun la teren batado de la fabrikanto. La akuzito ripetis, ke li trovis la monujon apud la pordeto de la latbarilo antaŭ la vilaa ĝardeno; ke li intencis deponi la trovitan monujon ĉe la policejo, sed ke li estis arestita antaŭ ol realigi tiun decidon.

Hart deklaris, ke li ne rekonas la arestiton, ĉar la atako de la krimulo okazis tiel neatendite, ke li eĉ ne havis tempon antaŭe atente rigardi la murdiston de sia servisto, kiu volis malhelpi la ŝteliston eniri en la vilaon. La afero fariĝis pli kaj pli implikita; fine la juĝistaro retiriĝis, kaj kiam ĝi post duona horo revenis, la prezidanto klarigis, ke la arestito estas kondamnita al morto.

La kompatinda viro falis senkonscie teren, kiam li aŭdis tion, kaj la tuta salono ekbolis.

De la rigardantoj sonis krioj de protesto, sed la prezidanto silentigis ilin, dum li minacis amase elirigi la publikon, se pluaj protestkrioj estus aŭdataj. Kiam fine ĉio kvietiĝis kaj la kulpigito ree estis akirinta sian konscion, la prezidanto demandis, ĉu en la juĝejo estas iu, kiu povas doni klarigon en la murdafero de Johano Hart.

Tuj Huksli levis la manon ekkriante:

— Mi povas!

Ĉiuj okuloj sin direktis al la neatendita atestanto, kaj mi vidis, ke Johano Hart ektimis kaj paliĝis.

La akuzito tamen montris per sia tuta sintenado, ke lin ekregis subita espero pri savo. Li stariĝis, ree sidiĝis kaj etendis la manojn al Huksli, kiu jam proksimiĝis al la prezidanto por ĵuri.

Post la kutimaj demandoj kaj respondoj de la prezidanto kaj la ĵurinto, la nova atestanto diris:

— Sinjoro prezidanto, sinjoroj juĝistoj! .... mi ne nur povas ĵeti lumon sur ĉi tiun aferon; mi eĉ povas pruvi, ke la viro, kies kondamnon al morto postulis la prezidanto, estas senkulpa; ke li efektive trovis tiun monujon ekster la vilao, ke li tute ne penetris en la koridoron kaj ne murdis la serviston, nek batis la fabrikanton Johanon Hart.

Denove la tuta salono ekbolis; la deklaro de la tiel neatendita atestanto estis tiel decidvoĉa, ke neniu dubis pri liaj paroloj.

La fabrikanto mem sidis senmove, pli pala ol antaŭe, kaj poste proteste leviĝis, kiam Huksli parolis plu:

— Mi eĉ povas pruvi, ke la tie sidanta flustrulo ne estas la fabrikanto Johano Hart, sed nur lia similulo aŭ duulo, kiu en ruza kaj krima maniero alproprigis al si la tutan posedaĵon de la malaperinta Johano Hart, kies kadavron vi povas trovi malantaŭ la vilao en angulo de la ĝardeno, kie la flustrulo post la murdo enterigis lin.... Mi povas plue pruvi, ke tiu falsa Johano

Hart murdis la serviston, kaj ke li nun ŝarĝas sian konsciencon, se konsciencon li havas, per nova murdo, nome per oficiala murdo de la tribunalo, kiu ĵus provizore mortkondamnis ĉi tiun viron, kiu sidas tie kiel akuzito pri ĉiuj krimoj, kiujn ne li, sed la falsa Hart, tie antaŭ vi, plenumis.

Tria ekbolo, sed pli granda ol la du antaŭaj, eksplodis en la juĝejo, kaj la prezidanto devis ripete batadi per la martelo, antaŭ ol la kvieteco revenis.

La prezidanto nun leviĝis kaj demandis al Huksli:

— Ĉu, atestanto Huksli, vi povas pruvi ĉion, kion vi ĵus diris?

Huksli respondis, ree decidvoĉe:

— Mi povas; bonvolu nur ordoni tiel kovri ĉiujn fenestrojn per la kurtenoj, ke la lumstrioj ne povos enpenetri, kaj mi funkciigos mian „reaperigilon", per kiu mi pruvos ĉion, kion mi diris.

Oni aŭdis ridadon en la salono, kaj la prezidanto mirigite demandis:

— Vi do ne filmis la krimon?

Huksli kviete respondis:

— Mia aparato, kiun mi nomas reaperigilo, estas speco de kinoaparato, sed ĝi diferencas de ĝi en la ĉefa afero. La aparato en la teatroj montras la bildojn de tiuj aferoj, kiuj okazis en la momento de la filmado. Sed mia aparato, male, povas fotografi ĉion, kio antaŭ longa tempo okazis. Kiam mi funkciigis mian aparaton, tiam la murdo jam estis okazinta, same kiel ĉio, kion mi nun montros al vi. Mi nun ne klarigos tion pli detale; rigardu mem kaj vi vidos, ke mi ne fantazias, ne rakontas fabelon, sed nur faktojn.

— Kie do estas tiu mirakla aparato? — iomete moke demandis la prezidanto.

Ree oni aŭdis ridadon en la salono, tamen Huksli ne atentis tion; li malfermis kofreton, elprenis elŝoveblan piedestalon aŭ tripiedon kaj starigis sur ĝi la aparaton; poste li trankvile diris:

— Jen mia aparato, sinjoro prezidanto; mi funkciigos ĝin tuj kiam vi mallumigos la salonon.

Post mallonga diskuto la juĝistaro konsentis la peton de Huksli, kaj post kiam la kurtenoj de la juĝejo estis mallevitaj, kaj ĉie regis plena mallumo, kiel en kinoteatro, Huksli diris:

— Nun mi petas la prezidanton, ke li ordonu al la servisto kaj al la servistino de sinjoro Johano Hart, ke ili detale rakontu, kiam kaj kiel ili iris el la vilao en la vespero de la krimo.

La prezidanto faris tion kaj la servisto diris:

— Je la oka horo vespere la kuiristino kaj mi eliris; nin volis postkuri la hundo de mia mastro, sed mi pelis ĝin reen; la hundo kuris en la malantaŭan ĝardenon, kie staras la hundejo, en kiu ĉiunokte ĝi dormas....

— Sufiĉas! — diris Huksli. — Nun atentu kaj rigardu la muron antaŭ la juĝistaro; mi uzos ĝin kiel skrenon.

La aparato nun komencis mallaŭte zumadi; hela lumocirklo falis sur la indikitan lokon, kiun ĉiuj ĉeestantoj en la juĝejo kun streĉita atento rigardis; minuton poste oni vidis la antaŭaĵon de la vilao, iom lumigitan de la luno. Tuj poste la pordo de la vilao malfermiĝis kaj aperis la kuiristino kun la servisto, sekvataj de la hundo. La servisto fermis la pordon kaj ekiris kun la kuiristino sur la vojeton, kondukantan al la granda vojo. Kiam li rimarkis la hundon, li haltis kaj per ordona mangesto repelis ĝin. La hundo tuj obeis kaj rekuris en la direkto, kiun Huksli antaŭe citis. La geservistoj duope iris plu, la lumcirklo malaperis kaj ree absoluta mallumo regis en la juĝejo.

Dum unu minuto mi ne aŭdis eĉ la plej etan bruon; ĉiu estis mirigita kaj surprizita; tiam subite mi aŭdis fortajn aplaŭdojn, sed la prezidanto per sia martelo frapetante, ekkriis:

— Eksilentu, ne aplaŭdu; ni ne estas en kinoteatro, sed en juĝejo por pritrakti gravan aferon!

Kaj al Huksli li parolis plu:

— Daŭrigu vian filmadon!

La lumcirklo reaperis kaj oni vidis la vojon, kiu kuŝas antaŭ la vilao. El la proksimo venis viro.... post mallonga tempo ĉiu vidis, ke tiu viro estas Johano Hart. Li prenis ion el la poŝo kaj faligis ĝin sur la vojon; poste li malfermis la pordeton de la kradbarilo antaŭ la ĝardeno, kaj direktis sin al la vilao. Li ĉirkaŭiris la vilaon kaj haltis antaŭ la pordo de la koridoro ĉe la malantaŭa domflanko. Tie li haltis momenton, rigardis internen, kaj metante la dekstran manon en la dekstran poŝon de la surtuto, li per la alia mano sonorigis. Post kelkaj momentoj la pordo estis malfermata de unu el la servistoj. Hart rapide lin preteriris kaj fermis post si la pordon. Sekvis mallonga diskuto; subite en la koridoro kaj el la interno de la vilao aperis alia viro, nome Johano Hart mem, kiu eble venis por peti klarigon pri la diskuto. Nun la enirinta viro tiris el sia dekstra poŝo la manon, en kiu estas revolvero. Reirante unu paŝon, li unue pafis al la servisto kaj poste al Johano Hart; ili ambaŭ falis. Ŝajne la du trafitoj estis tuj mortigitaj, ĉar baldaŭ ili ne donis plu signon de vivo kaj kuŝis senmove sur la planko en la koridoro. Rapide la murdisto malfermis la pordon kaj trenis la korpon de Hart en angulon de la ĝardeno. Li rapidis al ĝardena dometo, eniris en ĝin, revenis kun fosilo kaj tiel enterigis la kadavron, ke postsignoj ne restis; poste li reportis la fosilon en la ĝardendometon, reiris al la vilao, eniris en la koridoron kaj tie kuŝiĝis sur la planko, evidente, por ke la aliaj geservistoj lin trovu poste.

Ĉi tion tamen la rigardantoj ne vidis, ĉar post kiam la murdisto kuŝiĝis, la lumcirklo malaperis kaj Huksli diris:

— Sinjoroj juĝistoj, mi esperas, ke mia aparato montris al vi sufiĉe klare, kaj eĉ pruvis, kiu estas la murdisto de sinjoro Johano Hart.

— Lumigu la ĉambron! — ekkriis la prezidanto.

La kurtenoj antaŭ la fenestroj ŝoviĝis supren kaj ree la hela taglumo penetris en la juĝosalonon. Ĉies okuloj sin direktis al la loko, kie staris la flustrulo, la falsa Hart, sed li estis malaper-

inta. Li jam uzis la okazon por nerimarkate forŝteliĝi, kiam ĉies atento estis strečita pro la agadoj de la murdisto.

Krioj de surprizo.... murmurado de voĉoj.... ekbolo en la tuta juĝejo.... kaj fine la prezidanto vokis al si policanon, dirante:

— Sekvu la forkurinton kaj tuj oni iru al la ĝardeno por ekzameni, ĉu vere tie kuŝas la kadavro de la fabrikanto.

Intertempe Huksli jam metis sian reaperigilon en la kofreton kaj puŝis sin tra la rigardantoj al la akuzito, kiu kun ĝojlarmoj en la okuloj etendis al li la manon, por danki lin pro tiu neatendita servo, kiu savis lin de certa morto.

Horon poste du policanoj eniris kun brankardo, sur kiu kuŝis la elterigita kadavro de la fabrikanto.

La arestito tuj reakiris la liberecon kaj la policanoj jam estis survoje por serĉi la forkurintan murdiston, sed en tio ili ne sukcesis; li malaperis kaj neniam mi aŭdis, ke oni retrovis lin.

Huksli kaj mi reiris hejmen, li estis feliĉa pro sia sukceso, sed li neniam ricevis la promesitajn mil dolarojn, kiujn promesis la falsa fabrikanto.

Mi ne scias, kio poste okazis, rilate al tiu stranga aparato, kaj mi ne povas diri, ĉu la ŝtato uzos ĝin por klarigi multajn krimaferojn, kiuj ĝis tiam ankoraŭ ne estis klarigitaj, ĉar unu monaton poste mi staris sur granda vaporŝipo, por fari per ĝi, laŭ la promeso de sinjoro Jung, longan vojaĝon trans la Grandan Oceanon.

Pri tiu vojaĝo mi povas rakonti preskaŭ nenion, kio indas je atento; sed iun nokton, kiam mi staris sur la ferdeko por rigardi la stelojn, kiuj tre lumis kaj kiujn mi ĉiam tre admiris, mi aŭdis suspektindan interparolon inter la kapitano kaj unu el liaj oficiroj.

Ili ne vidis min, ĉar inter ili kaj mi leviĝis la ronda, dika aertubo, kiu ellasas la malfreŝan aeron el la ŝipo.

Ili parolis pri la alta asekuro de la vaporŝipo, pri la asekura

kompanio kaj pri eventuala ŝipopereo, kiu kaŭzas altegan profiton al la ŝipoposedantoj, kaj al la pereigantoj.

Mi jam antaŭe aŭdis, ke ofte oni intence pereigis malnovajn ŝipojn, por akiri la altan asekursumon, kiu ĉiam superas la valoron de la ŝipo. Suspektante, ke mia kapitano kaj lia oficiro intencis havigi al si grandan rekompencon per la pereigo de la ŝipo, mi atente aŭskultis kaj baldaŭ sciiĝis, ke vere la duo intencis pereigi la ŝipon inter la insulo Tasmanio kaj Aŭstralio, nome apud Melburno, la plej suda urbo de Viktorio. Mi ne sciis, kie situas tiu urbo, sed memoras, ke la kapitano ĝin nomis.

Supozante, ke tiu pereigo de ŝipo ĉiam estas danĝera entrepreno por la maristoj, mi deziris jam forlasi la ŝipon antaŭ ol ĝi atingis tiun urbon, sed kiel? Mi sciis nenion pri la insuloj inter Saidumo kaj Aŭstralio, nek ĉu la ŝipo albordiĝos ie ĉe unu el tiuj insuloj; tial mi maltrankviliĝis kaj ofte pensis pri la danĝero, kiu eble minacos min post kelkaj tagoj. Feliĉe baldaŭ prezentiĝis al mi la okazo forlasi la ŝipon jam ĉe la insulo Oahu, sur kiu situas la urbo Honolulu. Unu el la pasaĝeroj, kiu kunvojaĝis ĝis tiu urbo, estis aviadisto. Li havis kontrakton kun flugmaŝina fabrikanto en Honolulu por fari kelkajn flugojn per aeroplanoj faritaj de tiu fabrikanto.

Dum tiuj flugoj falŝirmiloj devis esti uzataj por montri ilian taŭgecon. La pasaĝero proponis al mi akompani lin dum la flugoj kaj ĉe tiuj okazoj esti lia falŝirmisto. Li certigis, ke salto kun falŝirmilo tute ne estas danĝera, se oni nur lerte kaj atente manipulas la ŝirmilon. Opiniante, ke ŝipopereo estas pli danĝera ol manipuli falŝirmilon, mi decidis fariĝi lia kunvojaĝanto, kaj ni interkonsentis, ke mi albordiĝos kun li apud Honolulu.

Neatendite mi do fariĝis falŝirmil-saltisto, kaj tiu nova ofico havigis al mi tiel strangajn sekvojn, ke mi detale devas rakonti ilin.

Albordiĝinte apud Honolulu, mi iris kun mia kunvojaĝanto en

hotelon, kie ni loĝis dum kelkaj semajnoj antaŭ ol komenciĝos niaj flugadoj.

Iun vesperon la aviadisto montris al mi ĵurnalon, en kiu staris longa artikolo pri la pereo de granda vaporŝipo apud Melburno. Ĉe tiu ŝipopereo dronis kelkaj maristoj kaj du pasaĝeroj, sed la kapitano kun la oficiroj kaj kelkaj maristoj kaj pasaĝeroj povis savi sin en savboatoj. La kapitano kaj lia helpanto do gajnis altan monsumon, al la firmo, kiu posedis la pereintan ŝipon, estis pagata la alta asekurmono, sed deko da homoj perdis sian vivon.

Kiam mi rakontis al la aviadisto, kion mi antaŭe aŭdis sur la ŝipo, li konsilis al mi neniam paroli pri tiu afero, ĉar tio povus fariĝi danĝera por mi.

Pasiginte tri monatojn en Honolulu, ni entreprenis nian unuan flugadon, kiu estis ankaŭ la lasta.

Kun mia falŝirmilo sur la dorso, mi sidis en la aeroplano kaj multe ĝuis la belan panoramon sub mi, kiam subite ekbrulis la flugmaŝino. Tio tiel neatendite okazis, kaj tiel rapide, ke mi ne havis la tempon longe pripensi mian situacion. Mi vidis mian kunulon, kiu rekte sidis sur sia seĝo, sed mi kredis, ke li jam estas senviva, eble lin trafis peco de la eksplodinta motoro; li diris nenion, eĉ ne rigardis malantaŭen por averti min salti malsupren. Sed tiu averto ne estis necesa; mi levis min, rampis sur la randon de la kesto de la flugmaŝino kaj saltis.

Mi ne sciis, kien mi iros, sed tuj antaŭ la eksplodo de la motoro mi vidis sub mi insuleton kun multaj arboj. Rigardante sub min, mi ĝin vidis ankoraŭ. Feliĉe mia falŝirmilo tuj malfermiĝis kaj mi ŝvebis malsupren.

Intertempe la peza aeroplano ankoraŭ tute en flamoj, falis en la maron, kie ĝi estingiĝis kaj tuj poste malaperis kun la aviadisto sub la ondojn.

Ĉio tio okazis tiel rapide, ke mi eĉ ne estis kaptita de teruro,

kaj kiam fine mi bone sciiĝis, kio al mi okazis, mi jam preskaŭ atingis la teron.

Malrapide mi ŝvebis malsupren; sub mi etendiĝis vasta kvarangulforma tereno, limigita de kvar vicoj de kabanoj. Ĉirkaŭ tiuj kabanoj kreskis arbaro, kiu etendiĝis ĉiuflanken ĝis la randoj de la insulo. La norda flanko konsistis el ture altaj rokoj kun suproj elstarantaj super la maro.

La sorto por la dua fojo estis al mi favora; la unuan fojon mi saviĝis de ŝipopereo, kaj ĉi tiun duan fojon mi ne estis konsumita de fajro aŭ akvo, sed trafis sendifekte sur molan teron, dum mia falŝirmilo kiel baldakeno etendiĝis super mi; tuj poste ĝi falis kaj tute kovris min.

Jen mi kuŝis kiel birdo sub reto, sed mi sentis min feliĉa pro la bona finiĝo de tiu aventuro.

Mi sidiĝis por forŝovi de mi la falŝirmilon, sed tio ne estis necesa, eĉ neebla, ĉar la ŝirmilo estis kaptita de kvardeko da manoj, kiujn mi vidis klare ĉirkaŭ mi sur la tero.

Mi miris, de kie tiel subite venis tiuj ruĝaj manoj, ĉar tiaj ili estis; sed mia miro ŝanĝiĝis en konsternon, kiam la ŝirmilo estis levata de la tero kaj kiam dudeko da kapoj aperis super la manoj. Tiuj kapoj estis ankaŭ ruĝaj kun nigraj strioj de la okuloj ĝis la mentonoj, dum tra la nigraj haroj estis ŝovitaj tiom da multkoloraj birdoplumoj, ke neniam mi povus kalkuli ilin. El tiuj kapoj min rigardis larĝe malfermitaj brunaj okuloj kaj ilia esprimo estis tia, ke miaj haroj stariĝis sur mia kapo.

Pli alten leviĝis la falŝirmilo kaj ĉirkaŭ mi staris aro de ruĝhaŭtuloj, preskaŭ tute nudaj, kun pafarkoj sur la ŝultroj kaj sagujoj sur la koksoj. Mi falis sur la ventron, ĉar la manoj tiel alte sin levis, ke mi perdis la ekvilibron kaj kvazaŭ pendis je la ŝnuroj de mia ŝirmilo.

La ruĝhaŭtuloj nun eligis laŭtajn kriojn kaj kiel eble plej rapide mi malligis la bukojn, per kiuj mia korpo estis ligita al la ŝirmilo, kaj jen mi ree staris sur la piedoj. Mi nun estis senigita

de mia ŝarĝo kaj denove rigardis la virojn ĉirkaŭ mi. Ili tenis mian ŝirmilon ankoraŭ en la manoj kaj kurbigante min, mi rampis de sub la brakoj de du el la ruĝhaŭtuloj por forkuri, sed estante certa, ke tio estas neebla, mi haltis, restis staranta kaj atendis, kion oni faros kun mi.

La insulanoj ellasis la falŝirmilon, kaj rapide, kiel la fulmo, ree ĉirkaŭis min.

En Saidumo mi antaŭ monatoj ĉeestis la diservon en unu el la preĝejoj, kaj mi aŭdis tiam, ke la pastro predikis pri la diablo. Subite mi memoris tiun predikon kaj speciale la imagon, kiun tiam mi ricevis pri tiu infera estaĵo. Mi mem kredis min ĉirkaŭita de aro de tiaj diabloj kaj jam kredis min tuj murdota, sed post kelka tempo iĝis al mi klare, ke mia vivo provizore tute ne estas en danĝero. La ruĝhaŭtuloj komencis dancadi ĉirkaŭ mi, dum ili reciproke sin tenis je la manoj, formante tiamaniere rondon, en kies mezo mi staris!

Dancinte kelkajn momentojn kaj eligante la plej strangajn kriojn, ili fine rompis la ĉenon, se ĉeno mi povas nomi tiun rondon, kaj unu el la dancintoj, eble la ĉefo, venis al mi, nudigis mian bruston kaj atente aŭskultis la batadon de mia koro, dum la aliaj insulanoj kun streĉita atento min rigardis. Aŭskultinte sufiĉe longe, la ĉefo etendis ambaŭ brakojn al la suno kaj laŭte ekkriis kelkajn por mi nekompreneblajn vortojn, inter kiuj ripete mi distingis la vorton „inka", kiun la aliaj ruĝhaŭtuloj laŭtvoĉe ripetis.

Post tiu ripetita krio la sintenado de la sovaĝuloj iĝis tute alia. Ili montris signon de granda ĝojo, salutis min per strangaj gestoj kaj poste du el ili levis min sur la ŝultrojn kaj la tuta aro kun mi en la fronto, ekmarŝis antaŭen renkonte al la tuta insula popolo, kunigita en angulo de la tendaro.

Le ĉefo alparolis la popolon, kaj kvankam mi komprenis nenion el lia parolado, mi konkludis, ke oni elektis min inkao de la insulo.

Tiam mi tute ne sciis, kion signifas tiu titolo, sed post kiam mi loĝis unu jaron inter miaj subuloj, ĉio iĝis al mi klara.

Vidante min kvazaŭ fali el la ĉielo, aŭ el la suno, la indiĝenoj opiniis, ke mi estas unu el la hispanaj generaloj, kiuj post la malkovro de Ameriko konkeris Meksiklandon, kaj post sia morto supreniris al la suno kaj nun revenis por regi super ili. Hazarde la antaŭa inkao mortis antaŭ kelkaj tagoj, pro kio la trono iĝis vakanta. Tial mi estis salutata kiel bonvena posteulo de la mortinto, kaj subite mi vidis min de simpla falŝirm-saltanto rangaltigita kiel inkao de insulo en la Granda Oceano.

Poste mi sciiĝis plu, ke la indiĝenoj, inter kiuj mi nun vivis, estas idoj aŭ posteuloj de granda aro de aztekoj, kiuj pro la severa traktado de la hispanoj elmigris, por serĉi aliloke novan patrujon. Post longa migrado en multaj boatoj sur la maro ili fine albordiĝis ĉe ĉi tiu insulo, kiun de tiu tempo ili nomis Nova Teksupa.

Mi do estis inkao Unu-sep-du Unua de Nova Teksupa, aŭ simple inkao Petro Unua; tiun titolon mi en la komenco trovis iom ridinda, sed poste mi fieris pro ĝi. Kvankam mia popolo aspektis kiel diablaro, mi devas konfesi, ke ĝi estis la plej bonkora, kiun mi povus nur deziri.

Post la parolado de la ĉefo oni foriris kun mi de la kabanoj, portis min plu tra la arbaro kaj post marŝo de kelkaj minutoj haltis antaŭ senarba spaco, kie staris nur unu alta, granda kabano: la palaco de la inkao.

Oni portis min en la palacon kaj singarde sidigis sur specon de trono: alta larĝa benko, super kiu etendiĝis baldakeno el folioj kaj papagoplumoj.

Nur deko el miaj novaj subuloj, eble la plej eminentaj, sekvis miajn portantojn en ĉi tiun mian novan loĝejon. Ĝi tre plaĉis al mi, ĉar ĉio en ĝia interno estis oportune aranĝita, kaj la tuta ĉirkaŭaĵo estis belege ornamita. La muroj konsistis el longaj palisoj kaj arbofolioj, lerte kunigitaj. Tiel dense estis kun-

plektitaj la folioj, ke la tuto ŝajnis esti nature faritaj muroj, sur kiuj brilis floroj ĉiukoloraj. Tie kaj tie inter la folioj mi vidis mallongajn elstarantajn bastonetojn, sur kiuj sidis kaj kriadis la plej belaj papagoj. Post mia alveno ili kvazaŭ por amuzi min flugis de bastoneto al bastoneto kaj faris la imageblajn plej strangajn movojn.

Ĉio ŝajnis al mi rava sonĝo, sed sonĝo ĝi ne estis; mi vere sidis sur mia trono en tiu tera paradizo, kaj antaŭ mi staris miaj fidelaj ruĝaj subuloj, kiuj faris sian eblon por plenumi miajn dezirojn.

Kredante, ke mi ĵus faris longan vojaĝon de la suno al ilia insulo, kaj ke mi nepre estas tre soifa kaj malsata, ili oferis al mi la plej dolĉajn trinkaĵojn kaj manĝaĵojn.

Unuj venis kun pladoj, sur kiuj staris tasoj kun oranĝosuko aŭ kokoslakto, aliaj proponis fruktojn, kiujn antaŭe mi neniam vidis kaj kies ekziston mi tute ne imagis; aliaj karesadis al mi la vangojn kaj tuŝetadis la lokon sur mia brusto, kie ili povis senti la batadon de mia koro, kaj aŭdante ĝin batadi, la bonuloj eligis ĝojajn krietojn kaj levis supren la okulojn, el kio mi komprenis, ke mia koro iel havas aferon kun ilia dio, la suno.

Kiam mi estis trinkinta kaj manĝinta, la insulanoj foriris de mi kaj malproksimiĝante dorsdirekte de mia trono, ili forlasis la palacon, lasante min tie feliĉa kaj fiera pro la scio,ke mi estas inkao de tiuj diable malbelaj sed anĝele bonkoraj homoj, la posteuloj de la lando, kie antaŭ jarcentoj regis ankoraŭ pli famaj inkaoj, ol kia iam mi estos.

Min fierigis ankaŭ la penso, ke ili rigardis min antaŭa hispano, veninta el la suno por nun fari sian eblon regi juste kaj igi ĉi tiun naivan popolon feliĉa kaj prospera.

Mi do tie sidis tute sola kaj ĉirkaŭrigardis.

La papagoj flugis tien kaj reen, kriadis raŭke, sed iliaj kriegoj sonis agrable en miajn orelojn, ĉar ili rompis la silenton, kiu regis en la tuta ĉirkaŭaĵo.

Mi ne memoras plu, kiel longe mi tiel sidis, meditante pri mia subita neatendita feliĉo, kiam eniris du plume vestitaj knabinoj, portantaj kun si larĝan mantelon el papagoplumoj kaj kotono. Ili diris nenion, sed signe komprenigis al mi, ke mi kuŝiĝu sur mia trono.

Mi obeis, post kio kvar belformaj, ruĝaj manoj sternis sur min tiun belan mantelon, kiu estis mia dumnokta mantelo.

Timante plu nenion malbonan aŭ malicon, mi fermis la okulojn, sed tuj poste ree malfermis ilin por rigardi la du knabinojn, kiuj per ventumiloj forpelis de mia kapo la kulojn kaj moskitojn, kiuj minacis ĝeni min en mia dormo. Tamen eĉ sen tiuj pikemaj insektoj mi ne povis endormiĝi, ĉar estis hela tago kaj mi tute ne sentis min dormema; tamen mi denove fermis la okulojn kaj pripensis mian staton, mian feliĉon kaj mian estontecon, kiu sendube estos same ĉarma, kiel la unua tago de mia regado kiel inkao Unu-sep-du Unua de Nova Teksupa.

La titolo subite ŝajnis al mi belega, kaj mi tute ne havis plu la ideon, ke mi ne estis inda je ĝi. Tiam kaj tiam dum momento mi malfermis la okulojn por rigardi, kion faras la du knabinoj ĉe mia flanko, sed ili faris nenion krom forpeli la insektojn, kiuj ŝajne estis tre sangavidaj. Post ĉirkaŭ unu horo mi ne povis plu elteni kuŝi sur mia benko, kiu ne estis tre mola, kaj mi sidiĝis. La ventumantaj knabinoj ne interrompis sian laboron, ĉar la insektoj ne ĉesis ataki min, tiel ili sopiris mian sangon.

Post kelkaj momentoj eniris du aliaj knabinoj kun korboj plenaj de larĝaj folioj kaj floroj. Nenion dirante, ili kaŭris antaŭ mi kaj komencis plekti girlandojn. Mi komprenis, ke ili plektis ilin por speciala ceremonio kaj mia supozo veriĝis en la sekvinta tago, kion vi aŭdos nun.

Kiam mi pasigis la nokton kaj min levis la sekvintan matenon, mi vidis, ke knabinoj sidas ankoraŭ ĉe miaj flankoj, por forpeli la insektojn, sed ili ne estis la samaj, kiuj servis min en la unua

tago. Ŝajne en la nokto la unuaj knabinoj estis anstataŭigitaj de aliaj; kaj tio regule okazis dum mia tuta regado.

La girlandoj estis fine pretaj kaj nun mi komprenis, ke ili servos por mia kronado.

Jam en tiu dua tago okazis tiu grava ceremonio; unue mi opiniis ĝin ridinda, sed poste tre natura, kaj io, kion mi plene indas kaj meritas.

La ceremonio komenciĝis en la mateno kaj daŭris la tutan tagon. Unue envenis tri ruĝhaŭtuloj, kiuj sin nomis „kakiko" aŭ ĉefo. Ilin sekvis kelkaj subkakikoj kaj lakeoj, kaj baldaŭ mi vidis, ke ankaŭ sur ĉi tiu insulo de naivuloj regis la kutimo pri diversaj rangoj. En Inferio tio komence al mi ŝajnis tre ridinda kaj malsaĝa; poste mi trovis ĝin ne nur natura, sed eĉ necesa pro la monsistemo tie reganta, kiu kaŭzis la grandan diferencon inter riĉuloj kaj malriĉuloj de tiu lando.

La festo do komenciĝis kaj antaŭ ol mi sciiĝis, kio al mi okazis, mi sentis min levita de la tero; tio okazis tiel subite kaj rapide, ke mi falis flanken, preskaŭ en la brakojn de unu el la ventumantaj knabinoj. Tamen tuj mi eksidis rekte kaj la lakeoj, la portantoj de mia trono, komencis marŝi kun mi, kaj la tri kakikoj nin sekvis. Kiam mi estis ekstere, aro de insulanoj, viroj kun pafarkoj kaj lancoj sekvis. Malantaŭ ili venis muzikistoj, kiuj en terura maniero ludis sur muzikiloj tute fremdaj al mi; eble ili estis tiuj samaj, kiujn la konkerantoj la unuan fojon aŭdis, kiam ili triumfe enmarŝis en la ĉefurbon de Meksiklando.

Alte sidante sur mia trono mi povis travidi la tutan procesion, kies fino konsistis el knaboj kaj knabinoj, kiuj portis flagetojn el birdoplumoj diverskoloraj.

La marŝado de la procesio daŭris nur kelkajn minutojn. La tuta popolo ariĝis ambaŭflanke de la vojo, kiun sekvis la trono de la nova inkao.

Ĉiuj ŝajnis esti en bona humoro, ĉiuj laŭte aplaŭdis min dum la solenaĵo, kaj unu momenton mi pensis, ke tiu honorigo estas

stranga kaj ridinda, ĉar neniu min konis, mi ja estis fremdulo, kiu ankoraŭ neniam faris ion bonan aŭ utilan al kiu ajn en la insulo Nova Teksupa, sed post tiu aplaŭdado kaj la respekto, kiun oni al mi montris, ĉio al mi ŝajnis tre natura kaj necesa; mi ja intencis nur la feliĉon de mia popolo, kaj mia tuta eksterajo klare tion pruvis.

Fine la procesio haltis kaj la lakeoj metis mian tronon teren.

La kakikoj venis al mi, ornamis min per girlandoj, metis kronon sur mian kapon kaj unu el la eminentuloj, (la kakikoj estis post mi la unuaj eminentuloj) faris al mi longan paroladon, kiun mi tute ne komprenis, sed en kiu mi ofte aŭdis la nomon de Montezuma.

Ĉe la fino de la parolado la kakiko, kiu estis la unua ministro, alparolis la popolon, kaj fininte ĝin li tuŝis mian bruston kaj etendis ambaŭ brakojn al la suno, post kio eksplodis tia bruado de aplaŭdo, ke mi ankoraŭ nun miras, ke miaj oreloj ne krevis. Ili tamen eltenis la bruadon kaj kiam ĝi ĉesis, la unua ministro deklaris min solene la nova inkao de la insulo Nova Teksupa.

Ree la aplaŭdoj estis aŭdataj, iom malpli laŭte, kaj tuj poste mia trono ree leviĝis; ĉi tiun fojon mi tion atentis kaj restis rekte sidanta, kiel decas al vera inkao, kaj la procesio returne marŝis al mia palaco.

Mi devas konfesi, ke mi estis kortuŝita post tiuj publikaj montroj de honoro de tiuj, kiujn unue mi rigardis kiel diablojn, kaj kiuj nun pruvis esti naivaj bonaj homoj, kiuj sentis veran amon al sia nova inkao. Mi eĉ sentis riproĉojn de mia konscienco kaj honton pro miaj unuaj malbonaj supozoj kontraŭ ili, kaj se mi estus povinta paroli la lingvon de la insulanoj, mi certe estus petinta pardonon.

Feliĉe la naivuloj ne konjektis miajn sentojn; ili vidis, ke mi estas kontenta, kaj tio jam feliĉigis ilin.

La ministroj nun foriris kaj mi restis sola kun la du ventumantaj knabinoj.

Miaj ministroj ŝajnis al mi saĝaj viroj, sendube ili sciis, ke la enuo estas la plej granda malamiko de la homa feliĉo, tial ili zorgis, ke pri enuo mi neniam bezonis plendi.

Post kiam ili montris al mi la tutan insulon, kaj mi jam manĝis kaj trinkis kaj iom ripozis pro la spertitaj emocioj kaj lacego de la kronado, mi ricevis instruiston. Li devis instrui al mi la lingvon de la ruĝhaŭtuloj, sed tiu tasko feliĉe ne estis tre granda, pro la simpleco kaj naiveco de la lingvo.

En malmultaj tagoj mi povis flue paroli kun miaj subuloj kaj volonte mi parolis kun ili.

Ofte mi promenis en akompano de mia instruisto, al kiu mi baldaŭ forte amikiĝis pro liaj ĝentileco kaj bonvoleco, per kiuj li servis al mi.

Lia nomo estis Klakarl. Li multe parolis pri la ministroj, kiuj nomiĝis Ikstilmocin, Okslokcin kaj Guatamocin. Tiu sufikso „cin" signifas proksimume tion saman, kion signifas la vorto „duko", pro kio ni povas ankaŭ nomi la ministrojn: La cino Ikstilmo kaj tiel plu.

Precipe la ministro Guatamocin havis grandan influon ĉe la popolo; li nomis sin laŭ la cino, kiu post Montezuma estis la lasta inkao de la aztekoj.

Komence mi miris pri tiuj nobelaj titoloj kaj deziris forigi ilin, sed la ministroj forte kontraŭstaris tiun mian intencon dirante, ke la popolo postulas kaj bezonas superrulojn kun alta titolo. Tial mi rezignis kaj poste eĉ komprenis kaj certiĝis, ke la ministroj pravas.

Iun tagon, kiam mi promenis kun Klakarl, li demandis, ĉu mi estas kontenta pri miaj ventumistinoj. Mi respondis, ke mi estas, sed ke ŝajnas al mi, ke ili ne povas aŭ ne kuraĝas paroli en mia ĉeesto, ĉar ankoraŭ neniam ili diris eĉ unu vorton.

Klakarl diris, ke ili estas surdmutaj kaj taŭgaj nur por laŭvice servi al mi per sia ventumado.

Ofte mi promenis tute sola kaj ĉe tiuj okazoj vizitis miajn

subulojn, kiuj ĉiam tre ĝojis pro la honoro, kiun per mia vizito mi montris al ili. Tuj post mia eniro en iliajn kabanojn, ili sidigis min sur la honorlokon kaj proponis trinkaĵojn kaj manĝaĵojn, kaj la plej granda honoro, kiun ili ĝuis, estis, ke per la mano ili povis tuŝi mian bruston, tio estas: tiun lokon, sub kiu batas mia koro.

Iun posttagmezon mi eniris en la kabanon de mia instruisto. Li tre ĝojis, sidigis min kaj post kiam mi parolis kelkan tempon kun li, Klakarl diris, ke li havas specialan peton por fari al mi; li nome volis demandi, ĉu ne estas eble, ke mi faru el li ian eminentulon, tio estas: ĉu mi ne povus doni al li la titolon, kiun havis ankaŭ la ministroj, por ke estonte la insulanoj ne plu nomu lin Klakarl, sed la cino Klakarl aŭ Klakarlcin.

Mi respondis, ke eble mi povus plenumi lian deziron kaj ke mi parolos pri tio kun la ministroj.

— Ho — diris li, — tion ne faru, ĉar laŭ la leĝo nur tri cinoj povas esti sur la insulo, kaj la ministroj ja ne konsentus abdiki, por fari plezuron al la instruisto de la inkao. Estas nur unu rimedo elekti min aŭ elektigi min cino, — diris li, — nome ke unu el la aliaj cinoj aŭ unu el la ministroj malaperu.

Tion dirante, li mistere rigardis min kaj poste la pordon, ĉar iu povus stari apud ĝi por subaŭskulti nian interparolon.

Mi estis mirigita pro la stranga respondo de mia instruisto, kiu tiel arde sopiris al titolo, sed li certigis, ke ankaŭ la aliaj ministroj akiris ĝin en la sama maniero.

Mi petis klarigon, kaj Klakarl diris, ke antaŭ du jaroj subite malaperis la ministro Maksiksocin, kiu poste estis anstataŭigita de Ikstilmocin.

Mi demandis, kiel tiu ministro malaperis, kaj Klakarl respondis tre kviete:

— La elstarantaj rokoj ĉe la norda parto de la insulo estas altaj kaj unu puŝego sufiĉas por faligi de sur ili tiun, kiu devas malaperi.

— Ĉu oni mortigis lin? — demandis mi.

— Ho ne, nur faligis en la maron, kie li dronis.

— Kiel vi scias, ke li mortis tie?

— Mi mem tion vidis, sed mi ne donis al li tiun puŝegon, tion faris la tiama Iksilmo, nun la cino Iksilmo, aŭ Iksilmocin.

— Ĉu vi ne denuncis lin?

— Kial do? Li promesis al mi titolon, se mi silentos, kaj diris, ke li poste helpos malaperigi unu el la du aliaj cinoj.

— Ĉu vere li volus tion?

— Kial ne? Okslokmocin jam de sufiĉe longe estas ministro; krom tio, li ne estas amata de la popolo, kiu tre ĝojus pro la malapero.... Se la inkao volus helpi al mi.... tiam ni duope povus malaperigi lin.

— En kia maniero?

— Ho, tre simple!.... Ni invitos lin al promenado; ni triope iru al tiu sama elstaranta roko, de kiu falis ankaŭ la cino Maksiko. La inkao eĉ ne bezonos vidi tion, kiel mi puŝos de la rokopinto la malamatan ministron. Ni poste diros, ke li falis kaj ke ni ne povis helpi al li....

Mi estis muta de miro kaj indigno, sed tion tute ne montris, ĉar kun ruza, malica krimulo oni devas ruze agi; tial mi diris, ke mi pripensos lian proponon, kaj ke mi poste sciigos al li mian respondon.

Tiam mi foriris de li kaj post tiu tempo kiel eble plej multe evitis lian renkonton, sed al mi iĝis klare, ke ankaŭ sur mia insulo regas intrigoj, kaj tio tre malĝojigis mian koron; mi ne rigardis plu miajn subulojn tiaj naivuloj, kiel antaŭe, kaj komprenis, ke ankaŭ inter ili estis kelkaj infektitaj de la malsano de la ambicio, kion mi tre bedaŭris.

Ĉiufoje ĉe plena luno mi sidis ekster mia palaco; tiam la enloĝantoj de la insulo venis por saluti kaj amuzi min per siaj muziko kaj dancado. La muziko estis terura, sed mi jam kutimiĝis al ĝi; kaj fine eĉ trovis ĝin sufiĉe agrabla. La dancado

estis iom sovaĝa, sed regula; tiu, kiu povis plej alte salti, estis rigardata kiel vera artisto. Inter la dancantoj ĉiam estis mia instruisto; li superis ĉiujn per siaj altaj saltoj. Vidante lin, mi vole-nevole admiris liajn muskolojn, sed pensante pri lia intrigo rilate al la malaperigo de unu el la ministroj, mi rigardis lin kun abomeno. Kiajn puŝegojn tiu fortulo povus doni por faligi iun de alta rokpinto en la maron!!

Mi tremis pensante pri tio, kaj iom post iom mi malamis tiun viron, kiu eĉ per murdo volis kontentigi sian ambicion.

Tamen neniam plu li parolis al mi pri siaj sekretoj, malicaj intencoj; li nur penis akiri mian simpation per siaj altaj saltoj, kiuj vere estis mirindaj kaj indaj al la plej lerta klaŭno en cirklo. Neniam mi povis al li pardoni la maltrankvilon, per kiu li ŝarĝis mian animon; ofte mi pensis, ke ĝis nun li estas la sola el miaj subuloj, kiu proponis al mi ion kriman kaj abomenan; mi ĝojis, ke mia popolo ne estis dividita en partiojn, kaj ke la politiko ne ludis rolon en mia insulo, kiel en Inferio.

Tamen en unu vespero, kiam kviete mi sidis sur mia trono en societo de miaj du ventumistinoj, kiuj pro sia surdmuteco neniam al mi ion diris, mi subite ricevis alian opinion pri la konkordo inter la insulanoj. Aŭdu, kiel tio okazis:

Tiun vesperon do, rigardante sencele antaŭ min, subite mi rimarkis, ke unu el la knabinoj ne plu forpelis la moskitojn, svarmantajn super mia kapo. Mi kredis, ke ŝi dormas, ĉar ŝia kapo ripozis sur la dorsapogilo de mia trono.

Mi volis veki ŝin, sed la alia knabino, vidante mian intencon, retenis kaj.... tre mirigis min, kiam neatendite ŝi flustris....

— Ŝi dormas, lasu ŝin dormi....

— Ĉu vi ne estas mutulino? — demandis mi.

— Tute ne; ni estas mutaj nur en via ĉeesto, por des pli bone povi aŭskulti ĉion, kion vi diras al nedeziratai vizitantoj, kaj por poste sciigi al la ministroj, kion vi priparolis kun tiuj vizitantoj.

— Do vi estas spionino! — indigne mi ekkriis.

— Ne parolu tiel laŭte — ŝi diris; — ankaŭ ŝi povas aŭdi kaj paroli, sed nun ŝi dormas kaj tial mi senĝene povas al vi diri, kion jam longe mi volis diri, sed ne povis pro ŝia ĉeesto.

Mia miro pligrandiĝis pli kaj pli. Mi do estis ĉirkaŭita de spionoj!!

La knabino daŭrigis:

— Mi ne scias, kio estas spiono; mi scias nur, ke al ni estas severe malpermesate paroli al vi kaj tial vi kredis nin surdaj kaj mutaj, sed malprave. Vi ĉiam estis al mi tiel bona, ke fine mia kompatinda koro sin klinis al vi kaj ĝi flustris al mi, ke mi avertu la inkaon pri la danĝero, kiu lin minacas flanke de la ministroj.

— Ĉu danĝero minacas min?.... Parolu kaj diru, kiu danĝero!

— La ministroj fine decidis kontentigi la popolon, oferante la inkaon al la suno, nia dio....

Mi tiel konsterniĝis kaj tia angoro subite min ekregis, ke mi salte leviĝis, sed la knabino flustris plu....

— Estu kvieta, ne faru bruon kaj ne veku mian fratinon, por ke ŝi ne perfidu min al la ministroj. Ili jam kelkan tempon disputis kaj kverelis pri la tago, kiam okazos tiu solena afero, sed la partio de la ĉefa ministro estas la plej potenca, kaj fine la ministroj interkonsentis, ke post du tagoj la ofero de la inkao okazos.

— Ĉu estas partioj ĉi tie?

— Jes, tri partioj; ĉiu ministro havas siajn partianojn kaj eĉ Klakarl faris sian eblon varbi partianojn por si; li estas viro, kiu jam longe aspiris ankaŭ iĝi ministro, post kiam unu el la tri aliaj estos mortinta.

Mi estis muta pro angoro; la antaŭvido esti viva oferata al la Sundio, starigis la harojn sur mia kapo. Mi volis paroli, sed malforta movo de la dormanta ventumistino vekis mian specialan atenton. Mi flustris:

— Eble ŝi ne dormis...., kion fari, se ŝi ne dormis?....

— Ni atendu; se ŝi ne dormis, ŝi perfidos min, ĉar ŝi estas jaluza pro la favoro, kiun la inkao montris al mi. Ni tamen esperas, ke ŝi dormis, alie mi estas perdita.

— Kion tiam oni faros kun vi?

— Tiam ankaŭ min oni oferos al la Sundio.

— Mi ne sciis, ke ĉi tie ekzistas ankoraŭ homoferoj.

— Ili ĉiam ekzistis kaj ekzistos; niaj praavoj enkondukis ankaŭ ĉi tien tiun kutimon, kiu apartenas al nia religio, kaj ĉiujare okazas tiaj oferoj, se viktimoj estas troveblaj.

— Kiuj estas tiuj malfeliĉuloj, tiuj viktimoj?

— Ordinare ili estas malbonfarintoj, aŭ la inkao mem, se li estas fremdulo.

— Ĉu tial oni tiel amike min traktis, por poste povi oferi min al sia Sundio!?.... Sed mi ordonos, ke oni ĉesigu tiun abomenan kutimon!.... Mi kredis, ke ĉi tie estas pacema bonmora insulo sen tiaj abomenaĵoj, sen disputoj, sen kvereloj.... eble sen militoj.

— Militoj tre ofte okazis. La unua ministro estas tre militema; li ofte militis kontraŭ la aliaj partioj, sed ĉiam venkis; tial oni lin timas; neniu lin amas, ĉar li estas avidulo, amanta nur sin mem, li amasigas ĉion, kion li povas; li laborigas aliulojn, sed mem estas granda nenionfaranto kun multaj sklavoj, al kiuj li estas tre severa kaj kruela; li ne oferas ilin, ĉar tio kaŭzus al li malprofiton.

— Ĉu la popolo ne povas lin eksigi aŭ forpeli?

— La popolo mem devige elektis lin unua ministro, ĉar ĝi ne povis agi alimaniere pro timo al li. Per siaj militistoj li povas ĉion, eĉ militi, kvankam la tuta popolo ne ŝatas la militon, sed pli volonte vivas en paco.

— Ĉu do la inkao ne povas eksigi aŭ forpeli lin?

— La inkao povas nenion!

— Ĉu mi povas nenion? Kial do oni faris min inkao?

— Nur por esti oferata. La inkao havas sanan koron, la Sundio deziras nur sanajn korojn....

— Kaj se mia koro ne estus sana?

— Tiam la oferado ne okazus.

— Kiel ĝi okazos?.... Mi volas diri: la oferado?

— La unua ministro, kiu estas ankaŭ ĉefpastro, per akra ŝtono malfermos vian bruston, elŝiros el ĝi vian koron kaj ĵetos ĝin antaŭ la ŝtonan dion Huitzil.

— Kie estas tiu ŝtona dio?

— En la templo sub la plej alta roko de nia insulo, sed folioj de arboj ĝin kaŝas antaŭ la okuloj.

— Sed mi eĉ ne sciis, ke vi havas templon.

— La inkao scias nenion; nur la ministroj!

La knabino pravis, mi povis nenion kaj mi sciis nenion. Mi levis min de mia trono kaj iris el la palaco por libere pripensi mian sorton.

La luno hele lumis, kaj mi povis fari promenadon, kio alie estas neebla, ĉar la publika lumigo sur la insulo estis en tre primitiva stato; lanternoj ne ekzistis, kaj kiam la luno ne staris sur la ĉielo, ĉiu estis devigata resti hejme.

La angoro, kiu regis min, pelis min al tiu mistera templo, kiun spite al mia alta rango, mi ne konis kaj pri kies ekzisto neniu al mi parolis antaŭe.

La distanco inter mia palaco kaj la celita rokpinto ne estis granda kaj post kvaronhoro mi ĝin atingis. Mi baldaŭ trovis la folian kovraĵon, kiun antaŭe mi neniam rimarkis, kaj ŝovinte flanken la kunplektitajn girlandojn el folioj, kiuj pendis unuj flanke de la aliaj, miaj tremantaj manoj renkontis specon de pordo, kiu estis ŝlosita. Mi ne povis eniri en la kaŝitan templon kaj volis reiri hejmen, kiam el la mallumo subite aperis antaŭ mi la figuro de mia instruisto.

Se mi estus renkontinta lin en tiu momento sur la supro de la roko, tiam sendube mi estus doninta al li tian puŝegon, kian li

destinis al mia unua ministro, sed ĉi tie mi povis nenion fari.

Li dolĉtone demandis, kion mi serĉas en tiu nokta horo tiel malproksime de mia palaco. Mi respondis, ke mi estas malsana, ke mia koro ne estas en ordo kaj ke tial mi per promenadoj klopodis resanigi ĝin. Mi elpensis tiun mensogon por kredigi al li, ke vere mi estas malsana, sciante, ke nur sanaj viktimoj taŭgas por la oferado; tion ĵus diris al mi la ventumistino.

La instruisto, ne divenante mian ruzaĵon, tuj ekzamenis mian bruston kaj atente aŭskultis la batadon de mia koro. Feliĉe kaj ne sen kaŭzo, ĝi batadis tro rapide pro la suferitaj emocioj, kaj aŭdante tiun neeksterordinaran kormovon, li diris:

— Nu, eble la koro de nia inkao baldaŭ resaniĝos, sed la malsano ne estas tre grava; la inkao bezonas ripozon, mi kondukos lin hejmen, por ke li dormu.

Li kaptis mian manon kaj duope ni promenis returne al mia palaco. Mi eniris, kuŝiĝis sur mia trono, sed mi ne povis dormi.

La du knabinoj, kiel kutime, sidis ĉe miaj flankoj, forpelante la moskitojn, sed ju pli rapide ili svingis la ventumilojn, des pli granda iĝis mia angoro, ĉar ĉiu svingo plimallongigis la distancon inter mi kaj la oferŝtono, sur kiu oni etendos min, por ke la ĉefa ministro kaj ĉefpastro povu malfermi mian bruston kaj elŝiri mian oferotan koron.

La nokto ŝajnis daŭri tutan semajnon; mi sentis kapdoloron, sed spite al tio mi cerbumis por elpensi rimedojn por forkuri.

Sed kiel forkuri? La insulo estis malgranda kaj tuj la ruĝhaŭtaj diabloj rekaptos min. Mia sola espero estis eventuala helpo de la knabino, sidanta sur mia benko, kiu jam konfesis, ke ŝia koro kliniĝas al mi. Sed kiel ŝi helpos? Mi cerbumis, cerbumadis, sed vane. Neniu povus kaj volus helpi al mi, escepte ĉi tiu malforta knabino; ĉiuj aliaj montriĝis esti mizeraj kreitaĵoj, kiuj por plaĉi al sia falsa dio, deziris nur, ke mi, kiel viktimo mortu la plej teruran morton.

Ho, kia malsaĝulo mi do estis! . . . . Kia vantulo, opiniante kaj

firme kredante, ke ĉi tiu popolo de diabloj min amas kaj honoras nur pro mi mem!!

Mi sentis en mi la inklinon detrui mian palacon kun ĉio, kio estis en ĝi, sed al kio tio utilus?

Fine mi kuŝiĝis sur mia trono kaj laŭte eksplodis en larmojn...

Tie mi kuŝis.... mi: inkao Unu-sep-du la Unua de Nova Teksupa!.... mi: la plej granda malsaĝulo, kiu iam vivis!!....

Tiel venis la mateno; la du knabinoj foriris kaj venis du aliaj por ventumi min. Mi ne volis manĝi, nek trinki, kaj plendis, ke mia koro kaŭzis al mi tiun doloron.

Unu, du, tri horoj pasis kaj mi volis eliri por distri min en la libera aero, sed apenaŭ mi faris du paŝojn ekster mia palaco, min ĉirkaŭis kelkaj armitaj ruĝhaŭtuloj por akompani min. Mi tuj konjektis, ke la dormanta knabino perfidis sian kunulinon, kaj ke la ministroj scias, ke ilia sekreto por mi ne estas plu sekreto. Do ili ankaŭ ne kredos pri mia malsana koro kaj ne prokrastos la oferadon.

Malantaŭ mi iris mia instruisto; mi signe vokis lin al mi kaj mallaŭte diris:

— Amiko Klakarl, el kiu volonte mi volas fari Klakarlcin, mi scias, kiu sorto atendas min...., ĉu vi ne konas iun rimedon por savi min?.... Se vi povos, mi faros vin mia unua ministro kaj konsentos, ke vi puŝu lin en la maron.

La ruĝhaŭtulo mistere ridetis, okulumis al mi kaj flustre respondis:

— Mi jam scias, ke la koro de la inkao estas inklina al mi, sed tiu puŝego nun ne estas plu ebla.

— Mi do estos senkompate murdata!?

— Ne murdata.... nur oferata al nia Sundio, kiu volonte ĝin akceptos.

— Sed kion diras pri tio mia popolo, kiu tiel min ŝatas kaj ĉiam tiel min honoris?

— La popolo jam pagis sufiĉe por nutri la inkaon, la popolo

volas sian plezuron; tiu plezuro konsistas en la brila oficiala kaj publika festo, kiu morgaŭ okazos, kiam la inkao estos oferata al nia Sundio.

— Ĉu la popolo ne pli multe ŝatus havi honestajn ministrojn?

— La popolo ŝatas nur sian plezuron; al la popolo la inkao estas io tute indiferenta; la popolo estas aro de stultuloj; la popolo lasas sin regi de ruzuloj kaj tiuj ruzuloj estas la potencaj ministroj; sciu do, ho inkao, ke estas nur kvar saĝaj viroj en la tuta insulo: ili estas la tri ministroj kaj mi mem.

— Kio do estas mi, kara Klakarl?

La ruĝhaŭtulo ree mistere kaj samtempe malice min rigardis kaj flustris al mi:

— La inkao pardonu al mi, sed li estas la plej granda stultulo el ĉiuj insulanoj.

Mi kvazaŭ ricevis bategon sur la koron; mi mutiĝis pro kolero kaj indigno; dum momento mi tute forgesis pri la terura stato, en kiu mi troviĝis. Baldaŭ tamen ĝi memorigis al mi pri mia morgaŭa sorto kaj malespere, tute ne atendante plu helpon, mi promenis plu, atente gardata de la min ĉirkaŭantaj sovaĝuloj.

Mi revenis en mian kabanon, sidiĝis sur mian tronon, ripozigis la kapon sur la manoj kaj diris plu nenion. Tiel pasis la lasta nokto kaj proksimiĝis la fatala tago de mia oferado.

Dum tiu lasta nokto sidis ĉe mia flanko nur la perfida knabino por ventumadi min; la alia knabino ne revenis, kaj vole-nevole mi pensis pri la sorto, kiu atendis ankaŭ ŝin.... Kompatinda knabino!!....

Jam antaŭ la sunleviĝo komenciĝis la preparoj de la festo. Mi aŭdis laŭtajn bruojn ekstere, kaj iris al la pordo de mia kabano por rigardi, kio okazas. Longa vico de sovaĝuloj trenis antaŭen malaltan ĉareton, sur kiu kuŝis giganta ŝtono, la oferŝtono.

La tirantoj iris en la direkto al la alta roko, la sama roko, de kiu mia instruisto volis puŝi la ministron en la maron. Tie do mi estos oferata!

Mi volis eliri, sed gardistoj repuŝis min en la kabanon; mi do estis malliberulo!....

Ree mi sidiĝis, atendante kaj cerbumante pri savrimedoj...

Tiel mi sidis ĝis tagmezo, kiam subite ideo trakuris mian kapon.

Mia espero revenis, kvankam ĝi estis nur malgranda.

Mi prenis mian falŝirmilon, kiu kunvolvita kuŝis sub mia trono; mi ĝin ligis sur mian dorson. Mi havis miajn planojn. Ĉiukaze estis pli bone droni en la maro, ol esti buĉata de ruĝhaŭta ĉefpastro. Mia falŝirmilo malhelpos tro rapidan falon en la ondojn. Ree mi atendis, ĝis la ministroj venis en la kabanon. Ili signodonis al mi sekvi ilin, kaj mi obeis, ĉar malobei estus io neebla. Inter du densaj homamasoj ni iris sur la vojo al la alta roko; poste iris la tuta popolo de la insulo.... kaj baldaŭ ĉiuj miaj subuloj staris ĉirkaŭ la oferŝtono por atendi la spektaklon, kiun jam tiel longe ili sopiris.

Flanke de la oferŝtono staris abomena idolo, ankaŭ tien trenita, verŝajne pli frue ol la oferŝtono, ĉar pri ĝia transportado mi antaŭe nenion rimarkis. La ministroj atente rigardis al la suno por vidi, ĉu ĝi atingas sian plej altan lokon sur la ĉielo. Nur tiam mi estos ĵetata sur la oferŝtonon, kie kvar viroj firme min tenos, dum la ĉefpastro plenumos sian abomenan laboron.

Li jam nudigis sian brakon kaj en lia dekstra mano mi vidis la akran ŝtonon, per kiu li malfermos mian bruston.

La suno ankoraŭ ne atingis sian plej altan lokon, kaj mi kaptis la okazon por ekagi.

La ruĝhaŭtuloj ne tenis min plu ĉe la brako, kaj mi staris libera. Subite mi komencis dancadi...., ĉiuj kun miro min rigardis.

Mi dancadis, saltadis tiel alte, ke mi ĵaluzigis eĉ mian instruiston. Mi saltis kaj dancis tien kaj reen, ĉirkaŭ la idolo kaj poste ĉirkaŭ la oferŝtono. Mi agis kvazaŭ mi kiel estinta sunido per mia dancado honorus kaj salutus mian patrinon, la

sunon, kaj kun ĉiam kreskanta miro ĉiuj rigardis tiun al ili tute nekonatan ceremonion.

Dum mia saltado kaj dancado mi vidis, ke sur la roko, cent paŝojn dekstre de la homamaso, brulis alta fajro. Ĝiaj flamoj estis pli ol dek metrojn altaj, kaj sendube videblaj sur la maro, do ankaŭ sur ŝipoj, okaze tie troviĝantaj.

Mi baldaŭ sciiĝis, ke tiuj flamoj altiris al si jam la atenton de vaporŝipo, kiu en tiu momento preteriris la insulon.

La suno nun preskaŭ atingis sian plej altan lokon kaj antaŭ ol tio okazis, mi dancis kaj saltis en la direkto al la maro, puŝis flanken la ĉefpastron kaj kurinte al la elstaraĵo de la roko, saltis en la abismon.

Sub mi etendiĝis la maro kaj malantaŭ mi sur la rokpinto la ruĝhaŭtuloj subite estis la atestantoj de la plej granda miraklo, kiun iam ili sonĝis. Mia falŝirmilo malfermiĝis kaj kiel papaga plumo ŝvebis malsupren.

Ili vidis, ke sub tiu stranga ŝvebanta objekto pendas je multaj ŝnuroj ilia inkao, kiu jam proksimiĝis al la ondoj.

Laŭtaj krioj kaj hurladoj atingis miajn orelojn, sed ili ne plu timigis min. La kriantoj ne povis plu oferi min, ĉar neatendite, mi vidis sub mi boateton kun kvar remantaj maristoj, kaj pli malproksime grandan vaporŝipon, sur kies ferdeko aperis aro de scivoluloj, kiuj kun mirego rigardis min, ne sciante, de kie tiel subite mi venis.

Minuton poste ok manoj kaptis miajn piedojn kaj. . . . mi staris en la boato.

Rapide mi malligis la rimenojn de mia falŝirmilo, kaj kunfaldinte ĝin, kore dankis miajn savantojn. Ili multe miris, aŭdante, ke ilia savita sovaĝulo, ĉar mi estis vestita kiel ruĝhaŭtulo, en mallonga pantaloneto, dankis en la angla, ilia propra lingvo.

Per iom da marakvo mi forviŝis la ruĝan koloron, kiu kovris mian haŭton, mi forigis la nigrajn striojn sur mia vizaĝo, kaj

tiel en unu minuto plenumis la metamorfozon aŭ transformiĝon de ruĝhaŭtulo en blankulon.

Apenaŭ mi staris sur la ferdeko de la vaporŝipo, la savboato por la dua fojo eniris en la maron en la direkto al persono, naĝanta de la insulo al la vaporŝipo.

Tiu naĝanto estis mia ventumistino. Timante, ke ankaŭ ŝi estos oferata, ŝi estis forkurinta el mia palaco, kaŝinta sin sub la elstaranta roko, kaj kiam ŝi vidis ŝipon, ŝi ekbruligis fajro-signalon. Savante sian vivon, ŝi savis ankaŭ la mian.

Unu el la pasaĝeroj, inferiana sinjorino, akceptis la knabinon kiel servistinon, kaj kunprenis ŝin al sia domo.

Mi estis la heroo de la tago kaj en tiu vespero mi en mia kripligita angla lingvo devis al ĉiuj sur la vaporboato rakonti la saman aventuron, kiun mi nun rakontas al vi.

La vaporŝipo, kiu tiel mirakle savis min, estis angla pasaĝer-ŝipo survoje al Saidumo, kie mi alvenis post agrabla vojaĝo.

En Inferio mi poste spertis nenion, kio valoras la penon rakonti.

Mi estis feliĉa, kiam la tempo de mia returna vojaĝo al ĉi tiu insulo venis.

Mi findiris kaj volonte cedas la parolvicon al mia frato Sola-lasta-unu por....

La ĉefo interrompis dirante:

— Ni kun atento aŭskultis la aventurojn de Unu-sep-du, kaj mi diros poste, kion mi pensas pri ĉio. Li rakontis multe kaj interese, sed li uzis tiom da strangaj kaj al ni fremdaj vortoj, ke mi ne ĉion komprenis; tamen mi komprenis sufiĉe por formi al mi ĝustan ideon pri la enhavo.... Estas nun tre malfrue, kaj ni iros hejmen. Morgaŭ vespere Sola-lasta-unu havos la okazon rakonti, kion li spertis post sia foresto de nia insulo. Mi esperas, ke li ne estos tiel larĝparola, kiel liaj du fratoj, ĉar ofte mal-multaj paroloj sufiĉas por detale rakonti, kion oni havas por diri. Tial.... bonan nokton!....

Dirinte tion, li forlasis la kunven-kabanon kaj ĉiuj lin sekvis, la insulanoj por dormi kaj la fremduloj kun la civilizitaj insulanoj por rigardi la maron kaj por priparoli la impreson, kiun kaŭzis la aventuroj de Petro, la forkurinta inkao Unu-sep-du Unua de Nova Teksupa.

VIII

LA VESPERO, EN KIU Sola-lasta-unu parolos al la insulanoj venis. Lian paroladon tamen ne aŭdis la du vidantaj kaj civilizitaj fratoj, nek la tri inferiaj milionuloj, ĉar ili sciis, ke Karlo aŭ Sola-lasta-unu spertis tiom malmulte en la civilizita Inferio, ke liaj aventuroj reale estas nur simplaj ĉiutagaj aferoj, ne indaj por esti aŭdataj.

Tial kvinope ili iris promeni sur la montoj kaj montetoj de la insulo, kiam Sola-lasta-unu sin direktis al la kunventendo, kie lin atendis ĉiuj insulanoj kun sia ĉefo.

Starante antaŭ ili, li momenton rigardis al la aŭdantaro, poste al la ĉefo kaj komencis jene:

— Mia ĉefo, miaj fratoj! Vi venis por aŭdi, kion mi spertis en la lando de la civilizitoj, sed mi havas nur malmulton por rakonti.

Mi vivis nur dum unu semajno, tio estas sep tagoj, en Saidumo, kaj aŭdante post tiu tempo, ke mi povas elekti, kion fari por konatiĝi kun la lando, mi diris al mia sinjoro Ingram:

— En mia insulo mi konstante laboris en la ĝardenoj, kaj mi

ankaŭ nun dezirus tion fari por sperti, kion la civilizitoj faras kun la rikoltitaj fruktoj; kiel ili prizorgas siajn ĝardenojn kaj kampojn.

Aŭdinte tion, sinjoro Ingram tuj kun sia aeroplano flugis kun mi al alia parto de Inferio, ĉar tie loĝas multaj terkulturistoj kaj kamparanoj.

Li mem havas tie farmejon apud la urbo Kalumbos, kaj tiu farmejo estas prizorgata de viroj kaj virinoj, kies koloro estas tute nigra.

Vidante en Saidumo kelkajn tiajn homojn, mi ne sciis, ke ankaŭ en aliaj inferiaj ŝtatoj ili loĝas, kaj tial mi tre miris, vidante en la ĉirkaŭaĵo de la farmejo de Ingram nur nigrajn homojn, kiuj faras nenion krom kulturi.

Mi ekloĝis en speco de kabano, aŭ dometo inter aliaj pli grandaj, kaj estis feliĉa, ke mi povis labori la tutan tagon ĝis la subiro de la suno. Mi plugis, mi erpis, semis, rikoltis, mi falĉis kaj fojnis, kaj ĉio tio okazis per mirindaj maŝinoj, kiuj povas plenumi, ĉiu por si, pli multe, ol cent homoj kune.

Mi spertis, ke tio estas utila kaj agrabla.

La aliaj laboristoj estis al mi tre ĝentilaj, kaj jam en la unua tago mi amikiĝis al la loĝantoj de du dometoj, kiuj staris dekstre kaj maldekstre de la mia.

Ili de tiu tempo ofte min vizitis en la vesperoj post la laboro, kaj ofte mi vizitis ilin; sed mi parolis nur kriple la lingvon de la lando, ĉar la nigraj homoj de tiu regiono interrilatis nur malmulte kun la civilizitoj de la lando. Ankaŭ tial mi ne parolas tiel bone, tiel larĝe kaj flue, kiel miaj du civilizitaj fratoj.

Plej ofte parolis al mi iu nigre vestita blanka viro, loĝanta en la proksimo de niaj kabanoj; kaj el libro, kiun li al mi donacis, mi iom lernis la lingvon de la civilizitoj.

Tiu viro ĉiam estis serioza kaj parolis nur pri gravaj aferoj, precipe pri venontaj aferoj en la postviva mondo, pri kio mi tamen nur malmulte komprenis.

Li instruis al mi la legarton kaj donante la celitan libron, li diris, ke ĝi estas la plej bona el ĉiuj kaj ke oni ĝin nomas: la „libro de la libroj".

Nun okazis, ke en la vesperoj mi multe legis kaj tio faris al mi grandan plezuron.

Tiel legante mi lernis paroli laŭ la maniero de tiu libro.

Kelkfoje la nigre vestita sinjoro faris longajn paroladojn en bela ŝtona domo, kaj ĉiam dum liaj paroloj mi estis tie por aŭskulti.

Li multe parolis tiam pri nia devo, pri nia amo al niaj proksimuloj, kaj diris, ke estas pli feliĉe doni, ol ricevi, kaj ke ĉiuj homoj estas fratoj, kiuj devas helpi unuj al la aliaj.

Tion mi ŝatis, ĉar tion saman mi antaŭe lernis ankaŭ sur mia insulo, kie ĉiam regas nur paco kaj harmonio.

Loĝinte kelkajn semajnojn inter la viroj kaj virinoj de la farmejo, mi sciiĝis, ke la filo de mia dekstra najbaro enamiĝis al la filino de mia maldekstra najbaro, kaj ke ŝi reciproke amas lin.

Ambaŭ estis bonkoraj kaj honestaj kaj tial mi ĝojis pro ilia reciproka feliĉo.

Okazis tamen, ke tiu feliĉo ne estis plena, ĉar laŭ la moroj kaj kutimoj de tiu lando, neniu povas edziĝi, se li ne posedas sufiĉan monon por aĉeti meblojn kaj aliajn bezonaĵojn de geedziĝintaj homoj. Ili posedis nenion krom kelkaj eluzitaj vestoj, kaj iliaj gepatroj ankaŭ ne povis donaci al la paro pro sia malriĉeco. Ĉiuj estis en granda embaraso kaj en aflikteco kaj ankaŭ mi malĝojis kun ili.

Ĉar la nigre vestita sinjoro antaŭe faris paroladon pri tio, ke estas pli bone doni ol ricevi, mi longe meditis pri tio kaj fine decidis helpi al la paro per la mono, kiun antaŭe donacis al mi sinjoro Ingram. En tiu sama tempo sur la larĝa longa vojo antaŭ niaj kabanoj okazis akcidento. Riĉa viro, kiu loĝis kelkajn mejlojn de nia farmejo, renversiĝis kun sia aŭto kaj la aŭto jam staris en flamoj, kiam la du geamantoj rapidis por helpi al li,

kaj ili savis al li la vivon. Li estis tre kontenta kaj lasante sur la vojo la duone forbrulintan veturilon, li iris piede hejmen. Antaŭe li promesis, ke li helpos al la paro, kiu savis lian vivon; baldaŭ ili spertos, en kiu maniero li tion faros.

Nun okazis, ke tiu sinjoro post tiu akcidento ĉiutage en la vespero promenis preter niaj kabanoj, por reakiri sian sanon, kaj la sekvintan tagon post la akcidento la enamiĝinta knabo trovis sur la sojlo de sia kabanpordo pakaĵeton kun la surskribo: „Por mia helpinto", kaj en la pakaĵo estis dekdolara monbileto.

La knabo estis tre feliĉa, sed diris pri tio nenion al sia amatino.

La postan tagon la knabo ree trovis la saman donacon, kaj tiel plu dum multaj sinsekvaj tagoj.

Sed li ne estis la sola rekompencito, ĉar ankaŭ la knabino ĉiutage trovis tian monbileton; sed ankaŭ ŝi diris nenion pri tio.

Tiel pasis cent tagoj kaj la centan tagon la knabo en la vespero diris al sia amatino:

— Kara amatino, mi pensas, ke la tempo de nia plej granda feliĉo venis, — kaj ŝi ridis pensante pri la ricevitaj pakaĵetoj.

Kaj la knabo diris:

— Jam dum cent tagoj vi ricevis po dek dolarojn, kaj per tiu mono ni povas aĉeti, kion ni bezonas por nia geedziĝo.

La knabino mirigite rigardis la knabon, kaj pripensinte momenton ŝi diris:

— Estas vi, kiu jam dum cent tagoj ricevis po dek dolarojn, kaj tial vi nun posedas mil dolarojn.

Sed la knabo ne komprenis la knabinon kaj ĉi tiu reciproke ne komprenis lin.

Ili rigardis unu la alian kaj fine la knabo diris:

— Tiu riĉa sinjoro sendis al mi ĉiutage dek dolarojn kaj por surprizi kaj feliĉigi vin, mi ĉiufoje sendis ilin al vi.

Nun la knabino, malfermante larĝe la okulojn diris:

— Ho, rigardu kaj komprenu: mi ĉiutage sendis al vi po dek

dolarojn por feliĉigi vin kaj nun restas al mi ne pli ol dek dolaroj, kiujn hieraŭ mi ricevis.

La knabo tre embarasiĝis kaj afliktiĝis; nun subite li komprenis, ke ne tiu sinjoro sendis la monon al li, sed lia amatino, kaj montrante monbileton, li diris: nur ĉi tiun monon mi havas.... ĉar ĉiutage mi sendis al vi, kion mi ricevis. Do tiu sinjoro donacis nur unufoje al ĉiu el la paro.

Kaj okazis, ke mi ĉeestis kaj aŭdis, kion diris la paro, kaj mia koro pleniĝis de malĝojo kaj ĉagreno, kaj pensante al la nigre vestita sinjoro, kiu en tiu ŝtona domo diris al la aŭskultanta aro, ke estas pli feliĉe donaci ol ricevi, mi diris al la geamantoj:

— Aŭdu min, miaj geamikoj; vi posedas kune nur dudek dolarojn kaj kredis posedi dumil; ne plu malĝoju: baldaŭ venos la tago, kiam vi kune havos okcent dolarojn. Mi antaŭdiras al vi, ke unu tagon post mia foriro de ĉi tiu farmejo, vi jam posedos tiun monsumon.

Kaj la geamantoj, ne supozante mian intencon, ĝojis pro la antaŭvido; ili ĉirkaŭbrakis unu la alian kaj mi estis kortuŝita pro ilia amo, kaj mi ploris.

Kaj unu tagon antaŭ mia foriro de la farmejo mi metis okcent dolarojn en la kabanon de la knabo, petante lin uzi tiun monon por la geedziĝo.

Tio estis la unua aventuro, kiu al mi okazis en la lando de la civilizitoj.

Iun tagon post la laboro, sidante kun miaj amikoj en mia kabano, ni vidis, ke sur la larĝa vojo viro sin direktis al ni. Li estis soldate vestita kaj havis sur la kapo ĉapon, al kiu estis fiksitaj multaj medaloj, aspektantaj kiel ormoneroj el kupro kaj arĝento.

Li iris rekte kun levita brusto, havis promenbastonon en la mano, kaj veninte al la pordo de mia kabano, li soldate salutis kaj diris:

— Mi salutas vin, bravaj homoj, kaj petas de vi kelkan

trinkaĵon kaj manĝaĵon, ĉar mi faris longan promenadon kaj malsatas kaj soifas.

Kompreneble ni invitis lin eniri kaj li eniris kaj sidiĝis.

La knabino donis al li por trinki kaj manĝi, kaj avide li trinkis kaj manĝis, dume li senhalte parolis pri si mem kaj pri sia heroaĵo, kiun li montris en la granda mond-milito.

Kaj frapetante sian pantalonpoŝon li diris:

— Jen, en ĉi tiu mia poŝo estas la rekompenco de mia heroeco, en ĝi estas mia premio, kiun hieraŭ mi ricevis en la urbo Kolambas, kaj kiun mi uzos nur por fari vojaĝon kaj por diboĉi. Mi iros al la teatroj, al dancejoj, mi loĝos en hoteloj kaj faros nenion, ĝis la tuta premio estos fordiboĉita; nur poste mi ree eklaboros.

Ree li manĝis kaj trinkis, dirante plu:

— Mi estas konata en mia tuta regimento, kiel la plej bona pafisto; per mia pafilo mi mortigis pli ol dudek malamikojn kaj vundis pli ol dudek. Pro tio mi ĉe Verduno akiris specialan medalon, kiu tre fierigis min kaj kiun mi kudris sur mian ĉapon. Tio estis vera batalo, tia, kian Napoleono eĉ ne ĝisvivis, nek Aleksandro Granda, nek Cezaro, nek Washington, kiu estis la plej fama el ĉiuj....

— Se denove milito eksplodos, mi tuj partoprenos, eble mi iĝos ĝeneralo!.... tial vivu la milito!!

— Milito estas la plej granda konkuro, kiu ekzistas; konkuro por la plej alta potenco en la mondo. Ho, mi ĉeestis militon; mi ĉeestis batalojn apud la franca urbo Verduno kaj apud multaj aliaj urboj kaj vilaĝoj, kies nomojn mi eĉ ne memoras plu. Mi estis en la tranĉeoj, tio estas fosaĵoj por kuri, por kaŝi sin sur la batalejo; mi estis en ili kun miloj da inferiaj soldatoj. La kugloj de la malamikoj flugis siblante al ni, kiel hajleroj, kaj multaj el miaj kamaradoj estis vundataj aŭ mortigataj, kelkaj eĉ ŝirataj en pecojn, kaj ĉio tio por la honoro de la patrujo!!.... Mi ricevis tri vundojn: unu en la kapo: jen rigardu; vi povas

ankoraŭ vidi la cikatron; unu en la maldekstra brako.... jen rigardu!!.... pafila kuglo trairis ĝin, kaj la trian vundon, la plej gravan, mi ricevis en la flanko....

— Ho! mi vidas ankoraŭ antaŭ mi la pruson, kiu rapidis al mi kun sia pafilo kaj bajoneto.... Mi ĵus per mia bajoneto trapikis malamikon, sed ne sufiĉe rapide povis eltiri el lia ventro mian bajoneton, kiam tiu malbeninda pruso jam staris antaŭ mi. Li puŝis sian bajoneton ĉi tie en mian flankon kaj tiel forte, ke la pinto aperis ĉe la alia flanko. Sveninte mi falis teren kaj rekonsciiĝinte mi kuŝis sur la operacia tablo, kie la kuracisto diris al mi:

— Mi gratulas vin, amiko!.... la bajoneto pasis la danĝeran zonon en via ventro: granda miraklo savis vin de certa morto, ĉar se la bajoneto estus puŝita unu centimetron pli alte, tiam vi kuŝus apud viaj mortigitaj kamaradoj.

— Mi do estis savita kaj fieras pro miaj vundoj! Ili atestas pri mia kuraĝo kaj pro mia kuraĝo mi akiris la medalon, kiun poste mi kudris sur mian ĉapon. Ho, mi rediras: la milito estas io glora; en la milito oni povas morti por la patrujo, kaj laŭ la soldatoj de Cezaro tio estas la plej glora, kion oni povas al si imagi, tial liaj soldatoj skribis sur la standardojn la devizon: „Morti por la patrujo estas agrable!"

— Sed laŭ mia opinio, la plej agrabla estas: morti kiel la nekonata soldato. Ho! mi dezirus esti la nekonata soldato!!.... Mi vidis lian tombon en Parizo sub la Triumfa Arkaĵo, nomata „L'arc de Triomphe"....

— Imperiestroj, reĝoj, generaloj, soldatoj kaj eĉ la diplomatoj lin salutas kun granda respekto!! Ĉiam brulas super li neestingebla fajro. Neniu scias, kiu li estas: li povas esti ĉio, kion vi volas, sed li estas la simbolo de la milito, de la kuraĝo, de la amo al la patrujo; li estas la plej eminenta en ĉiuj landoj, escepte en Inferio, kie oni ne havas la nekonatan soldaton. Ho! mi volus esti la nekonata soldato de Inferio; tamen kvankam mi ne estas

la nekonata soldato, mi estas kontenta: mi ricevis miajn vundojn, mi mortigis miajn malamikojn, mi akiris miajn medalojn kaj fine la premion, kiun mi nun fordibocas!....

En granda konsterno ni rigardis la militiston, kiu mortigis tiom da homoj; ni rigardis lin kaj miris, ke la inferia ŝtato donis rekompencon pro la faroj, kiujn li plenumis. Sed eble ni ne estis sufiĉe civilizitaj por kompreni tion, kaj tial ni respondis nenion je la fanfaronaĵoj de tiu iama militisto.

Trinkinte kaj manĝinte, li fine sin levis, soldate salutis kaj foriris el mia kabano. Konsternite ni postrigardis lin, ĝis li malaperis sur la granda vojo.

Kiam li jam estis for, venis al ni la nigre vestita sinjoro, kaj ni parolis kun li pri tiu ĵus foririnta viro. Nia amiko dum kelka tempo pripensis, rigardis la ĉielon, kaj poste li diris mildtone:

— Tiu viro estas unu el la soldatoj de la granda mondmilito kaj tial li estas degenerita, kaj preskaŭ ĉiuj, kiuj partoprenis en tiu milito, estas kiel li. Tiu viro tute ne komprenas la „libron de la libroj", kiun mi donacis al vi. En tiu libro ja staras: „Ne mortigu!.... Kiu eltiras la glavon, tiu pereos per la glavo!...." Sed ne koleru je tiu viro: li ne scias, kion li faris; ne juĝu kontraŭ li, li estas nur kompatindulo; kaj pri la ŝtatoj, kiuj rekompencas tiajn virojn, mi tute ne parolos. Kiu semas ion bonan, tiu ricevos bonan rikolton. Tial mi diras al vi: Pardonu tiun viron kaj liajn vojojn ne sekvu, ĉar ili kondukos al la pereo....

Longe mi pripensis la parolojn de la nigre vestita sinjoro, kiu estis ĉies amiko kaj konsilanto; kaj kiam mi pensis al mia insulo de blinduloj, mia koro pleniĝis de ĝojo, ke tie ankoraŭ ne regas kaj neniam regos la civilizeco, sed nur amikeco kaj konkordo, sen mizeroj de malriĉeco, kiel en la lando, kien la aviadistoj kondukis min per sia flugmaŝino.

Ankaŭ la junaj geamantoj longe silentis. Kviete ili sidis unu flanke de la alia, sin tenante reciproke je la manoj, kaj pensante

pri la feliĉo, kiun ili ĝuos post mia foriro de la farmejo....

Tio estis mia dua aventuro.

La trian mi spertis post kelkaj semajnoj.

Tiu aventuro estis tia, ke vi eble ĝin ne kredos vera, sed vi ja scias, ke la blinduloj neniam mensogas....

En iu mateno, dum ni rikoltis sur la kampo, venis aro de viroj el la urbo, kaj unu el ili, la ĉefo, diris al mi:

— Haltu, kaj faru, kion mi al vi ordonos en la nomo de la plej alta ĉefo de la ŝtato.

Ni metis teren la laborilojn kaj mi demandis, kio estas tiu ordono, kaj li respondis:

— La plej alta ĉefo, opiniante, ke la rikolto en ĉi tiu jaro estos tro granda, ordonis, ke ni neniigu la duonon de ĉio, kion vi rikoltis; tial montru al ni la lokon, kie vi kolektis vian rikoltaĵon, por ke ni plenumu tiun ordonon.

Granda konsterno ekregis nian koron, la nigraj laboristoj eksploris, sed mi regis min, kaj diris al la neniiganto:

— Ĉi tiu rikolto ne apartenas al ĉi tiuj bonaj homoj, nek al mi; ni estas nur laboristoj, laborantaj por iu sinjoro Ingram, kiu loĝas en Saidumo; kial do ni povos konsenti, ke lia propraĵo estos de vi neniigata? Iru kun via ordono al li kaj lasu nin kvietaj.

Dirinte tion, mi volis rekomenci mian laboron, sed unu el liaj kunuloj retenis min kaj demandis:

— Ĉu vi ne volas obei la ordonon de nia ĉefo? Se vi persistos, ni forkondukos vin en la malliberejon.

Mi respondis, ke tiu malliberejo min ne timigas kaj ke mi devas defendi la propraĵon de mia sinjoro, pri kiu ĵus mi parolis.

Nun la ĉefo de la fremduloj ekridis kaj diris al la viro, kiu retenis min:

— Lasu lin kvieta —, kaj turnante sin al unu el la nigraj laboristoj, li ordonis:

— Konduku nin al la loko, kie estas konservata via rikolto...

Kaj la nigrulo obeis kaj kondukis ilin al tiu loko.

Kaj okazis, ke la duona rikolto, super kiu ni kune tiel diligente laboris, estis forbruligata de la viroj, kiuj agis laŭ la ordono de la plej alta ĉefo de la ŝtato.

Ni staris apude kaj ne povis kontraŭstari tiun neniigon, sed nia koro ploris kaj nia menso komprenis nenion pri tiu ago de homoj, loĝantaj en civilizita lando.

Mi tiel malĝojis, ke mi sopiris tuj foriri, sed mi atendis ankoraŭ tutan semajnon por konsoli miajn nigrajn amikojn.

Kaj kiam tiu semajno pasis, mi en la mateno jam frue metis la promesitan monon en la kabanon de la juna amanto, kaj piediris al la urbo Kalumbos, kie mi serĉis okazon por reiri al Saidumo; tien mi veturis per aŭtobuso, ĉar la vojaĝo estis tro longa por fari ĝin piede.

Veninte al sinjoro Ingram mi rakontis al li pri la neniigo de lia rikolto; sed kiel mi miris, kiam ridante li diris, ke tiu neniigo estas bona, ekonomia afero. Li ne povis klarigi tion al blindulo. Efektive mi estis ankoraŭ blindulo, ĉar mi ne estis civilizita, kiel miaj du fratoj, kiuj loĝis en granda urbo por tie sperti, kio estis la civilizeco....

Aŭdante tion, mi diris plu nenion, sed petis, ke li flugu kun mi al mia insulo.

La tempo de tiu reflugado estis proksima, kaj jen mi revenis...

Mi nun finis mian trian aventuron kaj mi havas plu nenion por rakonti; mi volas nur diri, ke mi deziras estonte vivi ĉi tie sur mia insulo, kiun mi ŝatas ankoraŭ pli ol antaŭe; precipe ĉar en ĝin ankoraŭ ne penetris kutimoj kaj moroj kunkreskintaj al la civilizeco....

Sola-lasta-unu eksilentis, kaj la ĉefo, kiu estis kortušita, ĉirkaŭbrakis lin dirante:

— Restu ĉe ni, ho mia filo, vin solan ankoraŭ ne infektis tiuj malsanoj, kiuj regas la fremdulojn kaj eĉ, ho ve!... viajn du fratojn....

Fortega tondro interrompis la ĉefon, tiel forta, ke ĝi tremigis la tutan kabanegon, kaj ĉiuj en ĝi konsterniĝis pro teruro.

Samtempe la pordo malfermiĝis kaj enkuris la inferianoj kaj la du civilizitaj insulanoj.

Dum sia promenado ili estis surprizataj de pluvego, kiu irigis ilin returne al la kabanego, por serĉi refuĝejon kontraŭ la minacanta fulmotondro, kiu subite kaj neatendite eksplodis.

La tondrobato aŭdiĝis tuj post hela fulmobrilo, kiu lumigis la tutan internon de la konstruaĵo, kie alie regis malforta mallumo, pro la manko de fenestroj.

La kvin enirantoj vidis, ke la ĉefo ĉirkaŭbrakis Karlon, kaj ili ne sciis, kion tio signifas, ĉar Karlo estis la unua el la tri saminsulanoj, al kiu li montris tiun honoron.

La mallumo post la fulmobrilo tuj revenis kaj pasis momento, en kiu ĉiu senparole atendis, kio sekvos.

Dua fulmobrilo kaj dua tondrobato sekvis, kaj eĉ tria kaj kvara; poste subite la malbona vetero ĉesis furiozi; la pluvo falis ankoraŭ, sed ne plu rivere, kaj baldaŭ ankaŭ ĝi ĉesis.

Nun la ĉefo sin direktis al la ĉeestantoj kaj diris:



IX

CIVILIZITAJ FREMDULOJ

kaj blindaj fratoj....; ni aŭdis, kion al ni rakontis niaj fratoj: Unu-kvar-du, Unu-sep-du, kaj Sola-lasta-unu, kaj vere mi bedaŭras, ke la fremdaj gastoj, kiuj revenis hodiaŭ vespere post la unua tondrobato, ne povis aŭdi la aventurojn de Sola-lasta-unu, ĉar ili povus esti por ili la pruvo, al kio povas konduki la tiel nomata civilizacio....

Sed per malmultaj paroloj mi ripetos, kion rakontis niaj tri saminsulanoj, kaj poste mi faros komparon inter blindeco aŭ necivilizeco kaj vidkapableco aŭ civilizeco, kaj vi miros: ne pro miaj paroloj, sed pro la granda diferenco, kiu ekzistas inter ili....

Vi al ni venis per via flugmaŝino, kaj tio estis io mirinda; via veno sciigis al ni, ke homoj kapablas flugi kiel birdo, kaj pri io tia ni neniam pensis aŭ sonĝis.

La aventuroj rakontitaj al ni pruvas krome, ke la civilizitoj kapablas multon, kion ne kapablas la blinduloj.

Vi povas moviĝi, ne piedirante, ĉar vi havas tramojn, aŭtobusojn, ŝipojn kaj aliajn veturilojn, ĉe ni tute nekonatajn. Vi povas rikolti per maŝinoj, kapablaj plenumi la laboron de miloj

da homoj. Vi povas konstrui altegajn domojn el materialo, kiun ni eĉ ne konas; vi povas ĉion.... ĉion, kaj ni povas nur tre malmulte, preskaŭ nenion kompare kun vi!

Sed ĉu tio pligrandigis vian feliĉon? Mi tre dubas pri ĝi. Mi aŭdis, ke multaj el vi posedas riĉaĵojn, kaj ke multe pli multaj posedas tute nenion. Eĉ okazas ĉe vi, ke unu viro posedas, kion eĉ mil aliaj kune ankoraŭ ne havas, kaj tio okazas, se bone mi komprenis, pro la ekonomio, kiu regas en via lando.

Pere de viaj maŝinoj vi povas rikolti centfoje pli multe ol ni, sed strange estas, ke vi post la rikolto neniigas la duonon de tiu rikolto, dum multaj viroj kaj virinoj en via lando ne havas monon por aĉeti manĝaĵojn aŭ trinkaĵojn.

Mi demandas al vi: Ĉu vi ne hontas!?....

Ĉu ne estas honto, ke unu homo havas cent mantelojn, dum lia kunhomo devas iri nudkorpe?....

Ĉe ni neniu posedas pli, ol lia najbaro; neniu volus posedi pli multe, kaj ĉiu ĉe ni hontus, se li posedus, kion ne povas posedi la alia....

Ĉe vi la ŝtato rekompencas la militistojn, kaj plej multe ĝi rekompencas tiujn, kiuj mortigas la plej multajn, tiel nomatajn malamikojn.

Ion tian eble farus ĉe ni nur la frenezuloj, sed ĝis nun eĉ tio neniam okazis. Mi demandas al vi: Kio estas malamiko!?....

Ĉu ĉe vi ne rondiras nigre vestitaj viroj, kiuj instruas el la „libro de la libroj", ke ĉiuj homoj estas fratoj?.... ke vi ne mortigu, ke doni estas pli bone ol ricevi?.... Ĉe vi kelkaj homoj kolektas posedaĵojn nur por ilin posedi, kaj kiam nenionhavanto venas al via pordo, por peti pecon da pano, vi senhonte forsendas lin, donante al li nenion.

Mi ripetas: Ĉu vi ne hontas!?....

Al ni, laŭ via opinio, multo mankas: nome mono, maŝinoj, altaj ŝtonaj domoj kaj aliaj eble tre utilaj objektoj.... sed mi diras: Al vi mankas honto, kaj amo al via proksimulo!....

Kiuj estas pli feliĉaj, pli kontentaj: vi aŭ ni? ....

Vi per via mono kaj per viaj maŝinoj batalas unuj kontraŭ aliaj, kaj nur por esti la plej eminentaj el ĉiuj! Multaj el vi neniam laboras, sed sin banas en abundo, dum aliaj forte kaj pene laborante, ne posedas sufiĉe eĉ por havigi al si tion, kio estas necesa por amantoj, kiuj volas geedziĝi....

Ĉe vi oni boksas, ŝtelas, murdas, atakas kaj fiagas preskaŭ ĉiurilate kaj ĉiumaniere, kaj ĉio plejparte nur pro la strangaj ekonomiaj cirkonstancoj, kiujn ni ne povas kompreni....

Ĉe ni tute ne estas ekonomio; ni neniam aŭdis pri ĝi. Ĉe ni ĉiuj homoj laboras: ĉiuj estas egalaj, neniu boksas, militas aŭ ŝtelas; spite al tio, ĉe ni ĉiu sin sentas feliĉa kaj kontenta, ĉar ni helpas al ni reciproke ĉiam kaj sub ĉiuj cirkonstancoj.

Mi kore bedaŭras, ke en tia brila ŝtato, kia estas via patrujo, kie la homoj povas ĉion, regas tiom da malicaj infektaj malsanoj, ke pro tio la vera feliĉo estas ekzilita, por fari lokon al ĝenerala mizero.

Unu el via lando inventas mirindan reaperigilon, kiu povus esti la sola kuracilo de multaj ĉe vi regantaj malsanoj, sed ho ve!.... aliaj homoj venas por neniigi ĝin.... Ĉu tio ne estas freneza, same kiel estas freneze, ke unuflanke intence unuj amase mortigas aŭ vundas siajn proksimulojn eĉ per abomenaj maŝinoj, dum aliflanke aliaj homoj kuracas tiujn vundojn sur la operacia tablo!....

Io tia estas tiel freneza, ke por ĝi eĉ ne ekzistas nomo aŭ vorto.... Komparante nian simplan insulon kun via civilizita ŝtato de mirindaĵoj, mi kuraĝas diri, ke tie ĉi regas konstanta feliĉo nur dank' al nia simpleco, kaj mia koro dankas la misterajn fortojn, kiuj regas super kaj ĉirkaŭ ni, ke ĝis nun neniu el ni estas infektita de la malsanoj, kiuj mizerigas la loĝantojn de civilizitaj ŝtatoj; ĉar mizera devas esti tiu, kiu suferas pro malsato kaj soifo, kaj pli mizera devas esti tiu, kiu estas la atestanto, ke lia najbaro suferas, kaj duoble mizera tiu, kiu, kvankam

posedanto de riĉaĵoj, ne propravole helpas al mizera najbaro, por ke al tiu ne manku tio, kion nepre li, kiel homo, bezonas. Mi bedaŭras, ke du el niaj saminsulanoj jam infektiĝis de la civilizeco kaj eĉ tiel, ke ili povus ankaŭ infekti la simplulojn de nia insulo. Tial mi decidis, kaj tion decidos ankaŭ miaj blindaj fratoj, ke Unu-kvar-du kaj Unu-sep-du ne povas resti ĉi tie, sed ke ili reiru kun la fremduloj al ties civilizita lando kaj ke nur Sola-lasta-unu restu ĉe ni. Li lernis ion, kio estas utila, li lernis, kiel plibonigi nian terkulturon, kaj li helpos al ni apliki la bonajn ilojn por la bono de ni ĉiuj.

Sed mi certigas al vi, ke neniam venos en nian kapon la ideo, neniigi la duonon de nia rikolto, pro kiu ajn ekonomia neceseco!....

Mi tial petas, ho fremduloj: Reiru kun Unu-kvar-du kaj Unu-sep-du al via lando, kaj lasu nin kvietaj en niaj blindeco kaj simpleco, kaj neniam plu revenu por enkonduki ĉi tien la tiel nomatan civilizecon, kiun ni tute ne ŝatas!....

La ĉefo eksilentis, per sia bastoneto tuŝis sian ĉapon, kiel signon de saluto, iris al la pordo de la kabanego, malfermis ĝin kaj foriris....

— — — — — — — — — — — —

La sekvintan matenon la inferiaj milionuloj kaj la du civilizitaj insulanoj ekflugis returne al Saidumo, kaj neniu aŭdis plu pri ili, nek pri la stranga insulo, kie dank' al ĝia necivilizeco regis nur paco, feliĉo kaj vera prospero.

TABELO DE ENHAVO

Ĉapitro		Paĝo
I	La nekonata insulo. *(Bildo: La insulo estas malkovrata.)*	7
II	La insulanoj, iliaj kutimoj kaj tiel plu. *(Bildo: Sur la insulo.)*	17
III	La doktoro parolas al la insulanoj. La operacio. *(Bildo: La suno anstataŭ la ĉapelo.)*	28
IV	La novaj viduloj, kaj kion ili spertis. Ilia forveturo. *(Bildo: Vidi anstataŭ senti. La ombro de la civilizo.)*	41
V	Unu-kvar-du, Unu-sep-du kaj Sola-lasta-unu revenas al sia insulo. *(Bildo: La legendo de la civilizo venas al la insulo.)*	47
VI	Unu-kvar-du rakontas pri siaj aventuroj en civilizita lando. *(Bildo: La mond-urbo.)*	50
VII	Unu-sep-du rakontas pri la plej nova eltrovaĵo: la reaperigilo, kaj pri amuzaj aventuroj. *(Bildo: La reaperigilo, kies montriloj revivigas la pasintajn tempojn.)*	95
VIII	Sola-lasta-unu rakontas, kion li spertis en la civilizita Inferio. *(Bildo: La tombo de la civilizo.)*	133
IX	La ĉefo parolas. *(Bildo: Loko sen civilizacio. Trankvilo.)*	144